



María Nazaré Laroca



© John Huang Photography

Jenja (Yevgeniya) Amis

LITERATURA VIVO



Numero 005

Novembro 2025

Enhavo

- Vortoj al la legantoj (Erika Godó/John Huang) 4
- Intervjuo kun Maria Nazaré Laroca (Erika Godó) 5
- Aldravio (Maria Nazaré Laroca) 8
- Pluen (Maria Nazaré Laroca) 9
- Intervjuo kun Ĵenja (Yevgeniya) Amis (Erika Godó) 10
- La puzlo kun mankantaj pecoj (Ĵenja Amis) 14
- Amo de Mulo kaj Ĉevalo (Wally du Temple) 16
- Oktobro (Erika Godó) 20
- Novembro (Erika Godó) 21
- Naciaj trajtoj de la diboĉado (Laimundas Abromas) 22
- MoVeMo (Bobelarto) 24
- Poemo pri MoVeMo (Erika Godó) 25
- Kredi je io (Erika Godó) 26
- Kálmán Kalocsay Literatura Konkurso (Erika Godó) 27
- Aŭtunaj momentoj (Lilaketo) 28
- En songo (Lenke Szász) 29
- Forlasita (Emil Gârleanu / Lenke Szász trad.) 30
- La tablo (Stanislao M Esposito) 32
- Sub la griza vualo de pluvo (Stanislao M Esposito) 33
- La pluv', silento kaj sopiro (Rita Mkrtychyan) 34
- La unua konkurso de Aldravista Poezio (Maria Terezinha de Carvalho Sardinha) 35
- Ok Tagoj de Unu jaro! (Rita Mkrtychyan / Meri Tiracujan) 36
- Malbona, vi...! (Donika Dabishevci / Bardhyl Adem Selimi trad.) 39
- La Bubo (Ivaniĉka Maĝarova) 41
- Aŭtuna ploro (Jadranka Miric) 43
- Vivo, Unu Komuna Afero (Marguerite Audoux / Roland Platteau trad.) 44
- La Pianistino (Ivaniĉka Maĝarova) 46
- Petrelo kaj Aglo (Li Weilun) 50
- Ĉio malhelas, amo (Angel Arquillos Lopez) 51
- Dua viro (Helga Plötner) 52
- Anasetoj (Helga Plötner) 55
- Vento orienta – Vento okcidenta (6) (Pearl S Buck / Detlef Karthaus trad.) 56
- Sopiro en l' aŭtunmezo (Yi Qiao) 59
- Kiam ni estos sole (Manel Sales) 60
- Jaga (7) (Maksim Boĉkarev / Sergei Isakov trad.) 61
- Ho, mia apendicito (Yin Jiaxin) 68
- Anonco pri verkokonkurso de la radio IRo (Tjero Johanego) 70
- Profesoro Lju (Ĉielismo) 71
- La Memoro pri Dronado (GONG Xiaofeng) 75

- Cicio Mar, neniam forgesita (GONG Xiaofeng) 77
- Ario de juneco (Yin Jiabin) 84
- Rekta Fumo (Qin Bazi / Minosun trad.) 90
- Ŝvebanta Veturado (Jado) 92
- Fora vojaĝo (Jado) 93
- Sur la ebenaĵo de Orienta Afriko (John Huang) 94
- La Mesaĝisto de la Tero (Ranja Zafinifotsy) 95
- En Zagrebo, Kroatio (Zhang Changsheng) 97
- La dento (Zhang Changsheng) 100
- Bonfaro Ŝanĝas Sorton (Zhang Changsheng, Miao Hui) 101
- Iom pri Miaohui (Miao Hui) 104
- Aŭtuno (Gajo) 105
- VIVO (Gajo) 106
- Memore al mia amiko sro Petro De Smedt el Belgujo (Gajo) 107
- Sayonara (Xu Zhimo / Gajo kaj Minosun trad.) 110
- Al Ŝajonara – Adiaŭa Notturmo (Xu Zhimo / Batalanto trad.) 111
- Ĉuĝiang-Kantiko – Luma Luno Brilas (He Weijia, Yuan Qi / Batalanto trad.) 112
- Reflektoj pri la vivo (Chen Fan / Yang Haichun trad.) 114
- Momenteto (Luo Shuigen) 117
- Birdo Jingwei Plenigas la Maron (Arbsemo) 120
- Esperanto, ne nur lingvo (Fabina Yu Ximei) 121
- Granato (Viktoria) 124
- Dueto sur la tegmento (Viktoria) 124
- Ŝanĝitaj kaj malaj (Lu Jixin) 125
- Hazada renkontiĝo (Lu Jixin) 126
- La patrino amo (Kelly Muteke) 127
- Esperanto (Kelly Muteke) 128
- La milita kontinento (Jean de Dieu Kikako) 129
- Tempo (Malekera bonne idée, Ĵumbo) 130
- Infaneco, ponto de la futuro (Malekera bonne idée, Ĵumbo) 131
- Mia lanugo (Malekera bonne idée, Ĵumbo) 132
- Preter la silento (Jeroubbesheth Banyanga) 133
- La Vilaĝo je Tagmezo (Jeroubbesheth Banyanga) 136
- Amo kaj ĝeno (S-ro Long / John Huang trad.) 137
- Rakonto de Georgo (John Huang) 138
- Komikso pri Pipi (John Huang) 139
- Taglibro de Pipi (Pipi) 141
- Flora (Pipi) 142
- Ĉarma buŝeto (Pipi) 143
- La Aŭtunmeza Festo (Pipi) 145
- Lunkuko (Pipi / Semio) 147

Kovril foto: Ĵenja (Yevgeniya) Amis (foto de [John Huang](#)), artikolo je p.11

La bildoj kiuj akompanas la tekstojn en ĉi tiu numero, estis inspiritaj kaj prilaboritaj de [John Huang](#) pere de Al.

Vortoj al la legantoj



Erika Godo



John Huang

Karaj legantoj!

Kun granda ĝojo ni prezentas al vi la kvinan numeron de Literatura Vivo – numeron plena je diverseco, profundo kaj homa varmo.

En ĉi tiu eldono vi renkontos rakontojn pri amo kaj fideleco, kiel la tuŝanta "Amo de Mulo kaj Ĉevalo" de Wally du Temple, kie besta amikeco transcendas morton mem. Vi trovos poemojn pri la aŭtuna beleco kaj tempo de rememoroj – de la melankoliaj versoj de Erika Godó ĝis la nostalgia voĉo de Maria Nazaré Laroca. Ni prezentas interesajn intervjuojn kun elstaraj verkistoj kiel Ĵenja Amis, kiu dividas kun ni sian literaturan vojaĝon kaj teatran sukceson, kaj Maria Nazaré Laroca, kies poezio kaj traduklaboro ekbrilis en du lingvoj.

Specialan lokon en ĉi tiu numero okupas la daŭrigo de la romano "Ario de juneco" de Yin Jiaxin kaj la aventura "Jaga (7)" de Maksim Boĉkarev. Ankaŭ vi trovos novelojn de ĉinaj verkistoj kiel GONG Xiaofeng, Ĉielismo Wang kaj aliaj.

La internacia karaktero de nia revuo brilas tra kontribuoj el Ĉinio, Hungario, Italio, Kongo, Madagaskaro, Litovo, Albano, Kanado kaj aliaj landoj. Ni fieras prezenti verkojn de konataj aŭtoroj kiel Laimundas Abromas, Stanislawo M Esposito, kaj la posteulojn de Xu Zhimo, kies "Sayonara" aperas en du malsamaj Esperantaj tradukoj.

Aparte tuŝas nin la memoraĵoj: Gajo skribas pri sia forpasinta amiko Petro De Smedt, esperantisto el Belgio; Pipi dividas kun ni siajn taglibronotojn pri la hunda amikino Flora; kaj Zhang Changsheng rememoras pri la Aŭtunmeza Festo kun profunda sento.

Ni ankaŭ ĝojas prezenti la unuan rezulton de la Aldravista Poezio-konkurso organizita de TEK-Taguatinga, kaj inviti vin al nia propra Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay, kiu celas honori la grandan hungaran poeton kaj tradukiston.

Literatura Vivo fariĝas ponto inter generacioj kaj kontinentoj – de la saĝeco de maljunuloj ĝis junaj poetoj el Afriko, de klasikaj tradukoj ĝis novstilaj verkoj. Ni esperas, ke ĉi tiu revuo inspiru vin kaj riĉigu vian literaturan sperton. Viaj opinioj, kontribuoj kaj sugestoj ĉiam estas bonvenaj. Pro niaj limigitaj kapabloj, ni humile petas vian konsilon kaj kritikon.

Dankon pro via fidelo kaj kunlaboro. Ĝuu la legadon!

Kun amikecaj salutoj,

A handwritten signature in black ink that reads "Erika Godo".

Erika Godo

A handwritten signature in black ink that reads "John Huang".

John Huang

Retejo: www.literaturavivo.com

Retpoŝta adreso: info@literaturavivo.com

Intervjuo kun Maria Nazaré Laroca

Erika Godó



Maria Nazaré Laroca

Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mi kredas, ke legado de bonaj libroj instigis min interesiĝi pri literaturo ekde fruaj jaraĝoj. Menciinda estas la magia kaj alloga porinfanaj verkaro de la brazila verkisto Monteiro Lobato, kies mirindaj rakontoj feliĉigis mian infanaĝon.

Kiam vi verkis vian unuan rakonton kaj poemojn?

Se mi bone memoras, mia unua poemo en elementa lernejo celis omaĝon al patrinoj okaze de La Tago de Patrinoj, en 1958. Mi preferas verki poemojn ol rakontojn, tial la titolo de mia dulingva blogo estas Babile kun verso kaj iu prozo (Conversando com verso e alguma prosa). Tiun blogon mi kreis en la jaro 2012:

<https://nazarelaroca.blogspot.com/>

En la jaro 2012 mi verkis alian rakonton, nome “En la regno de l’ senfinaj mil unu vortoj”, publikigitan de Beletra Almanako, n° 13.

De tempo al tempo plaĉas al mi verki mikrorakontojn; unu el ili estis aperigita en “Ĉiuj steloj etas nokte”. Mikronovelaj kaj aliaj mikrorakontoj. Pluraj aŭtoroj. Novjorko: Mondial, 2021.

Kio estas la fonto de via inspiro por verki rakontojn aŭ poemojn?

Mia inspiro ekestas en l’ animo, en miaj bruaj silentoj kaj (mal)trankvilecoj, en la fluo de la ĉiutagaj ĝojoj kaj doloroj. Kaj sendube Naturo estas mia plej granda fonto de inspiro.

Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Filozofiaj, spiritaj, ekologiaj temoj min allogas, precipe transcenda misteroj de vivo.

Ĉu vi povus rakonti al la legantoj iom pri vi mem?

Mia nomo estas Maria Nazaré de Carvalho Laroca. Mi naskiĝis en la urbo Juiz de Fora, ŝtato Minas-Ĵerajso, Brazilo.

Mi estas emerita profesoro de Federacia Universitato de Juiz de Fora. Aŭtoro de kelkaj libroj pri gramatiko kaj lingvistiko; kunaŭtoro de metodo pri instruado de la portugala al eksterlandanoj:

“Aprendendo português do Brasil; Um curso para estrangeiros.” 1992. (“Lernu la brazilan portugalan; kurso por eksterlandanoj”). Ekde 2021 mi estas membro de la Beletra Akademio de Juiz de Fora.

Mi frekventis kursojn ĉe NASK: Nordamerika Somera Kursaro de Esperanto, en Universitato William Peace, Raleigh, Norda Karolino, Usono, en 2013 kaj 2016.

Esperanton mi eklernis en la jaro 2003, kaj mia amo al la lingvo internacia plu kreskis ne nur pro ĝia magio, sed ankaŭ pro ĝia ideologio de paco kaj kunfratiĝo inter la homaro. Per Esperanto mi amikiĝis tra la tuta mondo!

Magraŭ komencanto, en 2005, mi decidis doktoriĝi pri Lingvistiko por pli profunde studi Esperanton, kaj do ĝin prezenti al la brazila universitata medio.

Mi verkis tezon portugallingve pri la temo “La nominalverba karaktero de la aspekto en Esperanto”. (Federacia Fluminense Universitato, Niterojo, Rio-de-Janeiro, 2009).

Mia ĉefa agadkampo estas literaturo, instruado, kaj antaŭ la pandemio mi ofte prelegis dum pluraj brazilaj esperantaj kongresoj kaj inkluzive dum la UK en Bonaero, 2014.

Mi aktivas ĉe mia dulingva poemblogo: Babile kun verso kaj iu prozo “Conversando com verso e alguma prosa”: <http://www.nazarelaroca.blogspot.com.br/>

Mi publikigis plurajn poemplibrojn portugallingve, nome *Sem cerimônia* (1985), *Poemas sem endereço* (2000), *Travessia do poema* (2012), *esperante: Penseroj* (Wechsler Editora de livros Ltda: Kampino, 2013. Antaŭpalolo de Paulo Sergio Viana; *Birda grundo /Chão de pássaros* (Lorenz: Rio de Janeiro, 2017. Antaŭparolo de Paulo Nascentes).

Ĉijare okazis la lanĉo de mia unua traduko de spiritisma verko, nome *Mi revenis*, el la portugala *Voltei / diktita de la Spirito Frato Jakobo*; [psikografiita de] Francisco Cândido Xavier; el la portugallingva originalo tradukis Maria Nazaré Laroca. Brasília: FEB; Rio de Janeiro:Lorenz, 2025.

Partopreno en esperantaj antologioj: *Brazila Esperanta Parnaso*. Org. Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo. Rio de Janeiro, Ed. Oportuno 2007.

Beletra Almanako n° 13. Eldonejo Mondial: Novjorko, Usono, 2012.

Ĉiuj steloj etas nokte. Mikronovelaj kaj aliaj mikrorakontoj. Pluraj aŭtoroj. Novjorko: Mondial, 2021.

Kanizsai Antológia 19. Nagykaniza, 2018. En tiu hungara antologio aperas naŭ poemoj miaj tradukitaj el Esperanto en la hungaran de la karmemora amiko kaj spiritisma hungara esperantisto Szabadi Tibor J. Krome, li tradukis miajn du esperantajn poemarojn en la hungaran.

Esperanto por mi. Ploetner, Helga. Gunma, Japanio. Eldonejo Horizonte, 2022. Mi estis portretita de la famkonata germana pentristino Helga Ploetner.

[Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?](#)

La plej grava afero en la vivo por mi estas fariĝi pli frata kaj amema persono je ĉiu tago.

[Ĉu vi iam partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premiojn?](#)

Jes, precipe en kelkaj brazilaj literaturaj konkursoj. La esperanta video-poemo, nome Ami (laŭtleĝita de mi) estis premiita dualoke) kadre de la arta programero de la 9-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato Sanpaŭlo (Brazilo), okazinta inter la tagoj 10-a kaj 12a de oktobro 2015, en la fervoja vilaĝo Paranapiacaba, ŝtato San-Paŭlo.
<https://www.youtube.com/watch?v=cYd41d62JS0>

Laŭ mi estas kiel honoraj premioj la elekto kaj aperigo de iuj poemoj, rakontoj, kantoj en esperantaj antologioj, nome Brazila Esperanta Parnaso; Beletra Almanako n° 13; Ĉiuj steloj etas nokte; Esperanto por mi. Ankaŭ menciinda estas la hungara antologio, nome Kanizsai Antológia 19.

Mi komponis du kantojn, nome Dankon, Zamenhof! kaj Ne krokodilu! Tiuj komponaĵoj troviĝas en la bela retejo Brazila Kolekto:
<https://www.brazilakolekto.com/p/maria-nazare-laroca.html>

Mi ankaŭ partoprenis en la Galerio de gepoetoj: (BK-Amikoj kaj Esperanto Viva). Mi laŭtleĝis la jenajn poemojn:

Kajto kaj La semanto: https://youtu.be/ZSO_oXFafHk

[Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?](#)

Pro mia nuna delikata sanstato mi ankoraŭ ne havas estontajn planojn, sed mi forte esperas, ke la traduko Mi revenis plaĉos al la bonvenaj legantoj.

Mia varma deziro estas, ke la publikaĵo veku la intereson de la esperantistaro pri la spiritismaj konsolantaj temoj. Diskonigi la Spiritisma Doktrino pere de literatura verko ŝajnas al mi interesa kaj alloga rimedo. Mi pensas, ke eĉ pro scivolemo kelkaj esperantistoj povos interesiĝi legi la libron.

[Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?](#)

Por mi estas granda honoro ĉi tiu intervjuo al la afabla redaktoro de Literatura Vivo. Mi elkore dankas la oportunon partopreni en tiu ĉi bela kaj riĉenhava esperanta revuo. Gratulon, kara [Erika Godo!](#) ♦

Aldravio



Maria Nazaré Laroca



Pluen

Esperanto, amletero
liverita al la homaro
de l' amema kuriero
el la kor' de ĉies Frato!

Sed min trafis la donaco
nur en la jar' du mil tri,
kiam voĉo en la kapo
aŭdiĝis tute surprize.
Pli ol propono jen ordono
por nepra studo de l' lingvo
internacia, por ĉiam!

Malfermiĝis horizonto
per la magia ŝlosilo!
Mi traveturis la mondon
kaj kun multaj amiĝiĝis.
En pluraj mondaj kongresoj
partoprenis mi plezure,
kaj verdan kulturon festis
kun granda ĝojo kaj gajo!

Emociajn travivaĵojn
mi spertis en Bjalistoko
kaj en Bulonjo-ĉe-Mar,o,
ja neforgesebla gloro!

Tamen venis sortobatoj,
kaj mia vivo ŝanĝiĝis;
pro la dolor' senkompata
al mi ne eblas foriri.

Ho, ve! Kia elreviĝo!
Ne plu kongresaj ĉeestoj,
sed l'aferon mi daŭrigas
entuziasme, ameme,
per poezia verdigo.



Maria Nazaré Laroca

Intervjuo kun Ĵenja (Yevgeniya) Amis

farita de *Erika Godó*



Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mi amegas literaturon! Ekde kiam mi lernis literojn kiel infaneto, mi englutis librojn. Mi povis facile legi 200-iom da paĝoj tage! Estas tiu amo al literaturaj verkoj, kiu instigis min fariĝi ĵurnalisto kaj redaktoro.

Kiam vi verkis vian unuan rakonton?

Unu el miaj unuaj infanaĝaj memoroj estas manfari kaj fiere montri al mia patrino “ilustritan enciklopedion” pri magiaj floroj, kun bunte krajonita kovrilo kaj rakontoj pri diversaj floroj. Mi kunkudris la “libron” el falditaj kaj tranĉitaj pecoj de papero. Mi ne bone memoras, kio ekzakte estis la enhavo, sed ŝajne miaj magiaj floroj havis detalajn priskribojn kaj povis interalie promeni kaj pensi.

Kio estas la fonto de via inspiro por verki rakontojn?

Estas kelkaj! Unue, miaj personaj spertoj, sentoj kaj observoj. Ekzemple, mi ŝategas vojaĝi kaj dividi miajn vojaĝajn aventurojn kun aliaj. Antaŭ iom da jaroj mi verkis tutan serion de vojaĝnotoj el Japanio, kie ni vojaĝis dum kelkaj monatoj (La Riverego, numeroj 114 - 119). Por mi estis kortuŝe aŭdi de kelkaj japanaj amikoj diris, ke ili lernis novajn aferojn pri sia lando! Mi pensas, ke ni, esperantistoj, estas tiom bonŝancaj povi vojaĝi kaj sperti aliajn landojn profunde kaj nefiltrite, dank’ al niaj Esperantaj konektoj. Ni nepre uzu tiun okazon!

Due, legado de verkaĵoj de aliaj -- novaj kaj malnovaj. Ekzemple, la artikolo de s-ro Mann en Brita Esperantisto (oktobro 1910) pri la Internacia Kongreso en Vaŝingtono kaj la vojaĝo al Montrealo instigis min verki la teatraĵon “1910”, kiu estis sukcese prezentita dum la Montreala UK en 2022 (libere spektebla en Jutubo: <https://youtu.be/fbWldQKlfrA?si=tR0XAm70wwoyIbCf>) Tiu projekto, cetere, instigis min plenkape plonĝi en la historian esploradon pri la kongreso de 1910 kaj pri la amerikaj familianoj de Zamenhof.

Trie, interago kun aliaj homoj. Plaĉas al mi konatiĝi kaj babili kun homoj kaj ekscii pri iliaj ŝatokupoj, verkoprojektoj, talentoj artaj kaj aliaj, kaj poste kunlabori kiam estas okazo. El tiuj konatiĝoj ofte fontis pluraj intervjuoj kaj plej diversaj kunlaboraj projektoj: literaturaj, muzikaj, artaj, esploraj. Estas tiuj amikoj, kiuj estis miaj “komplicoj” en la kunfrezo realigi la teatraĵon: miaj aktoroj, muzikistoj, helpantoj kaj ĉiuj, kiuj kuraĝigis kaj konsilis!

Mi eble aldonu, ke multaj verkoj naskiĝas dum la promenado kaj biciklado apud la rivero, kiam mi estas sola. Eble, la akvo havas apartan influon al mia verkemo!

Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Foje sentiĝas ke ne estas mi, kiu elektas la temojn, sed la temoj elektas min! Ĝenerale, mi verkas pri aferoj, pri kiuj mi mem subite ekpasiĝas, kiuj tuŝis min ne nur intelekte kaj emocie. Kaj tiuj ekpasiĝoj dependas de pluraj hazardoj. Ekzemple, hazardoj viziti iun interesan lokon, renkonti iun interesan homon; hazardo legi ion, kio tuŝas vin profunde, sperti ion nekutiman, trafi en strangan, amuzan, memorindan situacion... Mi vere kredas, ke ne estas hazardoj en la vivo, kaj ĉiu hazardo povas gvidi al novaj spertoj aŭ novaj verkoj!

Do multaj miaj verkaĵoj venas per si mem, sen ke mi planu ilin anticipe... Tiel okazis pri la teatraĵo “1910”. Estis kvazaŭ s-ro Mann, la ĉefa heroo de la teatraĵo, mem invitis sin el 1910 al nia tempo. Estas li, kiu havis la rakonton, kaj mi, iamaniere, estis lia vehiklo -- la peranto de la rakonto. La vortoj de s-ro Mann tuŝis min, kaj mi donis al li voĉon. Dum mi verkis, mi provis esti fidela al vera s-ro Mann kaj provi “trovi lin”: do, provi kompreni, kia li vere estas, kiel li parolis kaj parolus, anstataŭ “inventi lin”. Espereble, liaj vortoj, miksitaj kun miaj, tuŝis la aliajn...

Ĉu vi povus rakonti al la legantoj iom pri vi mem?

Mi naskiĝis en Ukrainio kaj diplomiĝis pri ĵurnalismo kaj redaktado. Post la universitato, mi laboris kun pluraj revuoj kaj verkis ĉefe pri turismo kaj kulturo en Ukrainio. Nun mi loĝas en Montrealo, Kanado.

Same kiel miaj rakontoj venas neplanite kaj hazarde, mia konatiĝo kun Esperanto estis ankaŭ tute hazarda. Mia ĉefo estis esperantisto, kaj unu tagon proponis ke mi partoprenu Esperantan kurson en mia urbo. Post la kurso mi partoprenis TEJO-seminaron kaj estis tiom impresita pri la homoj, la etoso kaj kulturo, ke Esperanto fariĝis parto de mia vivo. Mi renkontis mian edzon ankaŭ per Esperanto. Ni ambaŭ

aliĝis al la sama laboro kiel redaktoro de Kontakto. Rezulte, mi ricevis la laborpostenon kaj invitis la alian kandidaton fariĝi mia helpanto. Tio bone funkciis ĉar ni ne nur kunlaboris, sed poste eĉ geedziĝis! Ni laboris kune dum unu plena jaro antaŭ ol ni konatiĝis persone en Ukrainio en 2003. Tiam li ne plu koleris, ke mi gajnis la laboron, eĉ se mi estis tute freŝbakita esperantisto, kiam mi kandidatiĝis!

Mi translokiĝis al Usono en 2005 kaj restis entute kvin jaroj. Mi laboris por la Usona Ruĝa Kruco kaj estis sufiĉe aktiva en la Usona Movado (dum iom da tempo ni kunredaktis la revuon de ELNA: nun Esperanto-USA).

Ni translokiĝis al Kanado en 2010 kaj la redaktorado sekvis min: mi estis aktivulino de Esperanto-Societo Kebekia kaj redaktoro de La Riverego, ĝia organo, dum dek jaroj. Mi estas nun estrarano kaj redaktoro de la revuo de Kanada Esperanto-Asocio, Lumo. En 2022 mi fariĝis honora membro de Kanada Esperanto-Asocio, kio estas por mi grandega honoro. Mi, cetere, ne nur multe verkis por la revuoj, kiujn mi redaktis, sed mem grafikis ilin. Do, eble, la kunmeto de la la flor-enciklopedio montris la redaktorajn kaj grafikistajn tendencojn infanaĝe :)

En Kanado mi magistriĝis pri komerco kaj laboras ekde 2016 por la Nacia Film-Oficejo de Kanado (nacia agentejo, kiu produktas dokumentfilmojn kaj animacion). Mi ankaŭ estas aktiva membro de la montreala muzika komunumo kaj kantas klasike (soprano) en kelkaj ĥoroj.

[Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?](#)

Unu el miaj plej grandaj Esperantaj projektoj estis kunorganizo de la Montreala Universala Kongreso kaj la verkado kaj surscenigo de la teatraĵo “1910” (verkita speciale por la montreala UK). Tio, eble, estas la plej freneza tempo de mia vivo, ĉar fakte ni devis organizi la kongreson dufoje: por 2020 (nuligita pro kovimo) kaj 2022. Do aldono de la teatraĵo al la jam enorma taskaro estis afero sufiĉe freneza (mi estis la sekretario de la LKK, zorganto pri sociaj retoj, organizanto kaj gvidanto de kelkaj ekskursoj, preleganto, ktp.), kaj mia normala oficeja laboro.

La organizado de la montreala UK kaj la verkado kaj surscenigo de mia unua teatraĵo fariĝis gravega afero ne nur en mia vivo, sed en la vivoj de pluraj niaj kunlaborantoj. La tuta teatra skipo estas nun ligita por ĉiam per tiu mirinda projekto, kaj mi estas dankema al la nekredeblaj aktoroj kaj la reĝisoro (Garry Evans kaj Alena Adler), muzikistoj (Kristina Miroshkina kaj Stefano Laflamme), la filmisto (Alex Miller), al ĉiuj kromaktoroj kaj John Huang, kiu prenis mirindajn fotojn. Ne estas eble esprimi per vortoj mian tutan dankemon al ili!

Mi estas fiera, ke la teatraĵo fariĝis granda sukceso: krom la partoprenantoj de la montreala kongreso, ĝin spektis jutube pli ol 7000 personoj! Ĝi fariĝis la temo de kelkaj kromaj filmoj, pluraj prelegoj kaj artikoloj. Krome, baldaŭ aperos la disko kun la teatraĵo kaj la kromaj filmoj -- la informoj haveblos en la retejo de Esperanto-USA. La teatra projekto gvidis al malkovroj: ekzemple, la malkovro de la montrealaj Zamenhofoj: la familianoj de “nia” Zamenhof, kiuj translokiĝis al Ameriko en la fina 19-a jarcento, la malkovro de la “unua kanto de la kontinento”: la unua kanto en Esperanto, verkita en Ameriko kaj perdita por pli ol cent jaroj.

Ĉu vi iam partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premiojn?

Ne, ĝis nun mi ne gajnis premiojn. Du miaj verkoj aperis en la unua rikolto de Internacia Novelokonkurso (INK), sed kiel kunlaboranto por la unua eldono de INK mi ne rajtis konkursi por premioj. Eĉ se mi mem ne tro konkursemas, mi estas ligita kun la Internacia Novelokonkurso, kiu naskiĝis en 2020 dum la tempo de kovimo, ĉar mi estis inter la aro de homoj, kiuj laboris por lanĉi ĝin. Mi estas tiom fiera pri la sukcesegoj de ĝi kaj feliĉa, kaj aliaj homoj transprenis la projekton kaj sukcesigas ĝin!

Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

Fini la libron “1910”, antaŭ ĉio. Eĉ se la teksto de la teatraĵo estas tute preta, restas al mi ankoraŭ finaligi kelkajn partojn: ekzemple, la rakontojn pri la montrealaj Zamenhofoj, pri nia perdita kaj retrovita s-ro Mann, mia ĉefheroo kaj unu el la pioniroj de la Brita Esperanto-Movado. La libro estos ilustrita kaj ideala por amatoraj aktoroj, kiuj volas prezenti la verkon publike, ĉar ĝi enhavas detalajn instrukciojn pri la prezento. Mi volas verki pliajn teatraĵojn kaj mi havas du specifajn temojn enkaŭpe. Kiam estos bona momento, mi rakontos pli!

Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?

Mi dankas la legantojn, la redaktorojn kaj la fondintojn de Literatura Vivo. La fakto, ke vi legas -- aŭ eĉ verkas -- pruvas, ke Esperanto ne estas afero de pasinto -- estas ni, esperantistoj, kiuj daŭre kreas nian kulturon, kiun ni transdonos al la postaj generacioj. Daŭrigu legi, daŭrigu verki kaj uzu okazajn paroli en Esperanto kaj ekkoni aliajn esperantistojn. Ni vivas en epoko de grandaj ŝanĝiĝoj, mondskuaj ŝanĝiĝoj, same kiel Zamenhof siatempe. Sed kio ajn okazas en tiu ĉi mondo, ni ne perdu la esperon kaj nian komunan homecon. Ni daŭre ĉerpu la bonon en niaj konatiĝoj, en nia historio, en nia literaturo!

Ĉi-foje mi dividos kun la legantoj rakonton, kiu ankaŭ funkcias kiel mallonga monologo (ĉ. kvinminuta) por prezento dum Esperanto-evento. Mi mem, cetere, prezentis ĝin dum la Dulanda Kongreso de Usono kaj Kanado en julio 2025. Estas spirita konversacio de mi kun s-ro Mann, kiu restas por mi mem la puzlo kun mankantaj pecoj: la forgesita kaj retrovita pioniro de la Brita Movado kaj tutmonda Movado, kiu revenis al forgeso dank’ al nia teatraĵo.

[Legu la rakonton je la sekva paĝo.](#)


La puzlo kun mankantaj pecoj



Jenja (Yevgeniya) Amis

“Por ni, Esperantistoj, disiĝoj ne ekzistas. Ni estas por ĉiam ligitaj per la spirito de la Interna Ideo”... Vi sentis tion, William en somero 1910 irante al Ameriko. Mi sentas tion ankaŭ... Mi sentas, ke niaj vivoj kruciĝis. Kvazaŭ la tempo ne plu estas rekta linio. Ĝi rondiras kaj zigzagas, ĝi saltas kaj valsas... Unu - du - tri, unu - du - tri... Ĝi haltas kaj rekomencas kaj ĝi rifuzas obei la leĝojn de la temospaco. Ni fariĝis partoj de la sama rakonto, William. La valso en du tempoj, en pluraj tempoj, en pluraj spacoj...

Imagu, William! Vi estis nia unua mistero! Ni devis “solvi vin”. Mi esperas ke vi ne trovos tion intruda, sed mi volis scii, kiel vi aspektas, kiel vi pensas... Mi ne havis vian foton, do mi komencis imagi vin. Mi vidis vin ĝentila 30-jarulo, babilema kaj serioza. Mi imagis vin porti nigran kompleton, blankan ĉemizon kaj nepre, nepre rondajn okulvitrojn!



Unu tagon mi rigardis fotojn de la vaŝingtona kongreso kaj mi vidis vin. Vi staris inter seriozaj viroj kaj belrobaj virinoj. Bone... mi ne sciis tutcerte ke estas vi ĉar la foto ne havis subskribon. Mi simple decidis “atribui” vin al tiu juna viro kun inteligentaj okuloj, rigardanta preter la aparaton de la fotisto, rigardanta pretertempe...

Imagu! Mi eksciis poste ke la persono, kiun mi elektis kiel vi, estis vere vi! Estis vi, vi, vi! Ho, vi eĉ havis rondajn okulvitrojn! Mi rekonis vin, William, mi rekonis vin el la tuta homamaso...



Vi estis aktivega pioniro kaj verkisto. Vi laboris kiel interpretisto en la brita armeo, sed ekde la Unua Mondmilito viaj spuroj komencis perdiĝi... kaj poste... poste vi malaperis! Vi kvazaŭ elfalis el via tempa dimensio...

Estas kvazaŭ ĉiuj informoj pri vi estis disĵetitaj tie kaj jene, kaj nia tasko estis trovi ilin kaj rekonstrui vin. Jen unu ero, jen la alia. Ni kunmetas ilin kaj iom post iom ni povas vidi vian vizaĝon, vian korpon... Kun ĉiu nova peco vi desegniĝas pli kaj pli klare, sed vi konstante fuĝas, William! Ni neniam povas kunmeti vin plene... Vi restos por ni mistero duonsolvita, la puzzle kun mankantaj pecoj...

Estas malfacile paroli pri la morto kun vivantoj... Sed vi scias, William! Vi komprenas, ke la morto ne estas la fino... Vi mortis en vintro 1972, unu jaron post via intervjuo al Brita Esperantisto, la fantoma intervjuo, kiun ni neniam trovis... La tempo ne estas ĝentila al magnetaj bendoj...

Mi esperas ke tio ne rompos vian koron -- sed neniuj verkis vian nekrologon. Tamen vi revenis el forgeso. Estas kvazaŭ vi mem revenigis vin al la mondo de vivantoj!


Mi vidas vin, sinjoro Mann, sur la ŝipego, kiu rapidas al la aventuro de via vivo en Ameriko, kaj via "taso superfluas".

Mi ankaŭ vidas vin revenanta hejmen, al Britio. Vi estas sola paca batalanto sur la ŝipo, unu sola, sola kaj laca batalanto... Vi havas severan "postkongresozon"... Mankas samideanoj kaj rido kaj komunaj manĝoj. Mankas la tablo de Zamenhof kun verdaj rubandoj... Mankas atendado de io granda...

Vi ne volas reveni al la prizono de via apartamento en griza Londono. Vi rigardas la fuĝantajn kaj eternajn ondojn, viajn amikojn, danci kaj ŝaŭmi ĉirkaŭ la ŝipo. Vi verkas, kaj verkas, kaj verkas. Vi provas rekapti ĉiun momenton de via vojaĝo kaj meti ilin en spiritan tempokapsulon. Frostigi en tempo. La vortoj verŝiĝas sur paperon. La vortoj, kiujn ni legos jarcenton poste... ♦

Amo de Mulo kaj Ĉevalo

Wally du Temple



Kokani Briz estis bruna ĉevalo kun blankaj ŝtrumpetoj kaj stelo sur la frunto, kiu vivis en kamparo kun paŝteja kamarado, mulo nomita Tondro, tiel alta kiel tirĉevalo. Ili vivis kun sep azenoj sur posedaĵo mia kiu iam estis bieno sed nun estas ĉefe golfludejo kun rezervujo en la mezo. Golfludantoj provas sukcese bati pilkojn ĉirkaŭ artefaritan lagon dum la bestoj paŝtas je la krutaj deklivoj kaj en kverka kampo.

Enspirante kaj elspirante praaĵn voĉojn, la azenoj anoncas novan tagon, dum nebulo leviĝas kaj golfludantoj prepariĝas. Ludantoj amas ilin kiel dorlotbestoj kaj alportas karotojn por nutri ilin kaj scias iliajn nomojn. Bruego eruptas je la unua vido. Ĉi tio estas kampara golfludo, ne por riĉaj urbaj luksantoj. Tondro paŝtas, muzelo al la tero, ofte kun paro da miniaturaj siciliaj azenoj sub sia blanka ventro.

En tiu tempo, Kokani Briz ofte kuregis ĉirkaŭ Tondro kaj la azenoj kvazaŭ li estus praktikanta mallarĝajn turnojn en rodea barelvetkuro. Nun, post dudek kvin jaroj da henado, trotado, galopado, saltetado kaj prancado, Kokani Briz apenaŭ povis marŝi. Liaj kruroj kaj maleoloj estis ŝvelintaj pro retenita akvo. Estis tempo ŝpari al li plian doloron.

Ni kondukis lin al loko, kie floroj povis kreski post fosmaŝina enterigo. Tondro rigardis de malproksime. La bestokuracisto injektis la unuan el du injektiloj. Mi tenis lian kapon kaj apogis min kontraŭ lia ŝultro, por ke kiam li komencis perdi konscion, mi povu gvidi lian kolapson sur blankan baŝon.

Post kiam Kokani Briz estis trankviligita, parte dormanta kaj poziciigita, ni adiaŭis kaj esprimis nian dankon pro lia vivo. Mia edzino kaj mi rigardis en liajn okulojn, flaris lian kolhararon kaj provis akcepti nian decidon. Tiam la bestokuracisto injektis la duan dozon, kiu haltigis lian koron. Ondeto de energio ŝajnis vibri tra la korpo de Kokanee; liaj kruroj kaj oreloj moviĝis.

Subite, Tondro rigardis la rezervujon kaj marŝis al la pordego. Estis kvazaŭ Kokani Briz iris al la kverka kampo kaj rezervujo. Tondro nepre volis sekvi lin. Tondro ofte spertis apartigan angoron kiam Kokani Briz foriris kun mia filino al spektakloj kaj konkursoj.

Estas fakto, ke ĉevaloj, azenoj kaj muloj forĝas fortajn ligojn unu kun la alia. Ili povas sperti traŭmaton dum disiĝo. Se partnero mortas, la postvivanta ĉevalo devas esti permesita funebri, devas esti permesita akcepti la perdon. Mi atendis, ke Tondro funebros.

Kiam la fosmaŝino alvenis, Tondro rigardis alidirekten. Li rifuzis rigardi dum mi faldis la blankan kovrotukon super vizaĝon kaj ŝultron de Kokani. Li ne volis rigardi dum ni ŝutis la unuan teron per niaj manoj sur lian korpon.

Kiam la maŝino startis bruan replenigon li staris kun sia dorso al la maŝino kaj bruo. Liaj grandegaj oreloj estis direktitaj al la kverka herbejo kaj lageto. Li anoncis sian intencon per sia mulvoĉo. "Kokani Briz certe iris al la kverka herbejo," ĉu tion li diris?

La voĉo de muloj nek similas al tiu de azeno nek al tiu de ĉevalo. La sono de Tondro estas profunda kaj resonanca sekvata de mallonga siblo. Lia voko sonis je aflikto, timo kaj apartiga angoro. La migdalaj okuloj de Tondro parolis al mi. "Ni devas iri."

Starante ĉe la pordego, Tondro levis sian kapon ĉielen kaj blekis kiel nur mulo povas. Eble li faris dudek trumpetojn hore. Antaŭ la noktiĝo mi estis parolinta al niaj najbaroj por klarigi kio okazis.

Antaŭ la sekva mateno Tondro ankoraŭ trumpetis. Mi estis sendorma. Mi estis irinta tien kaj reen de domo al paŝtejo por povi trankviligi lin. Li volis eliri kaj ŝajnis sopiri la ŝatatajn kampojn de li kaj Kokani Briz.

La rilato inter Tondro kaj Kokani similis tion de la azeno Dapple kaj ĉevalo Rocinante de Don Kiĥoto. Ĉi tiuj du amikoj, Cervantes skribas, "kutimis alproksimiĝi kaj froti unu la alian, plej ame, kaj post kiam ili ripozis kaj refreŝiĝis, Rocinante kuŝigis sian kolon trans tiun de Dapple dum longaj posttagmezoj." Cervantes miris pri la profundo kaj sincereco de iliaj emocioj kaj malesperis, ke homoj "ne scias kiel konservi siajn amikecojn" kiel ĉevaloj kaj azenoj. Kaj tiel estis kun Tondro kaj Kokani Briz. Nenio povis apartigi ĉi tiujn knabojn.

Mi malfermis la paŝtejan pordegon. Serĉante Kokani Briz, li kondukis min al ilia plej ŝatata verdherba kampo. Li enspiris kaj elspiris sian stridan vokon, kapon supren, poste malsupren. Liaj atentaj muloreloj turniĝis sendepende en malsamaj direktoj kiel satelitaj antenoj.

Poste li kondukis min ĉirkaŭ la altaj bordoj de la artefarita lago, kiu estas uzata por irigacio. Li kaj Kokani Briz kuris sur la rezervujaj muroj kaj deklivoj. Li denove kriis.

Poste, li kondukis min tra la kverka herbejo, sed ni ankoraŭ estis solaj. Pli maltrankvila, li tiris min al la rando de la rezervujo. Li metis sian dekstran piedon en la akvon, kie li kaj Kokani Briz kutimis trinki. Neniu bildo de sia akvotrinkanta partnero. Nervoja li ne trinkis, sed paŝis pli profunden ol kutime.

La kruta deklivo de la bluargila rezervujo igis lin gliti flanken sur sian dekstran ŝultron kaj ensuĉis lin en la lageton. Provante swingi sian korpon al la lageta rando, li falis kaj subakviĝis. Mia maljuna mulo vane luktis por stariĝi. Ĉiufoje kiam ĝi provis stariĝi, ĝi glitis en koton kaj kolapsis.

Li faris dek aŭ pli longajn baraktajn provojn por stariĝi. Kiom povis elteni lia maljuna koro? Subite li kuŝis en kvar futoj da akvo kun sia nazo preskaŭ sube. Mi rapide moviĝis al li kaj tenis lian muzelon super la akvo. Li estis senmova krom sia profunda spirado. Ĉu li fidas, ke mi savos lin? Ni ankaŭ estis partneroj, kiel Kokani Briz kaj li. Mia tuta estaĵo batalis por savi lin.



Mi poŝtelefonis al la golfluda administrejo. Per angora voĉo mi kriis. "Tondro kaj mi estas en la rezervujo kaj li dronas. Venu nun. Alportu ŝnurojn kaj traktoron por eltiri lin."

Atendante kaj atendante, senfina estis la tempo, kiam mi parolis kun mia amiko de dudek jaroj. Mi rigardis en liajn migdalajn okulojn, kie mi povis vidi mian reflekon. Mi estis kompleta vrako de emocio kaj paniko. Ĉu la morto prenos mian amikon kiel li prenis Kokani Briz horojn antaŭe?

Mi rememoris kun mia kamarado, kiel ni estis ĉe kamparaj bienaj foiroj, ĉe okcidentaj rajdkonkursoj; kiel ni kampadis kune dum rajdado en alpajn herbejojn kaj grimpis monton ĝis la neĝolinio. Kiel mi forgesis la vojon reen al la tendaro kaj mi petis lin gvidi min tien, kaj li faris. Mia voĉo tremis dum mi elporetis miajn pensojn. La tempo haltis. La mondo paŭzis. Koto kaptis miajn kruojn. Mi tenis lian kapon sur mia brusto. La matena nebulo ankoraŭ leviĝis dum la suno leviĝis supren. Tenante lian kapon al la lumo, la sola sono, kiun mi povis aŭdi, estis liaj mulpulmoj luktantaj por aero kaj vivo. Senmova nun li metis sian lastan esperon en mi. Liaj grandegaj oreloj aŭskultis min. Liaj timemaj okuloj pligrandiĝis.

Fine, piŝtaj motoroj malforte de malproksime tuŝis niajn orelojn. Tondro streĉis siajn muskolojn. Traktoro kaj fosmaŝino subite aperis sur la rezervuja rando. Metallo kontraŭ metalo vibris brue el la fosmaŝino. Kiam Tondro vidis la fosmaŝinon kiu entombigis Kokanin, liaj okuloj paliĝis pro timo. Kun herkula peno li puŝis sin al la limo, kaj dum mi luktis en koto kun lia ŝnuro enmano, li tiris min kaj sin el la laĝeto.

Ni eliris kune gutigante ŝliman akvon en la tagiĝa sunleviĝo.

“Dankon, dankon pro via veno,” mi diris el mia kotŝprucita vizaĝo. “Tondro malamas tiun fosmaŝinon, kiu entombigis Kokanin. Timo pri ĝi donis al li ekstran forton.”

Kun danko en mia koro, mi decidis ofte promeni kun Tondro. Li estis tro maljuna nun por rajdi. Tial, kiel Robert Louis Stevenson en sia "Vojaĝoj kun azeno en la Cevenoj", mi vojaĝis laŭ la padoj, flankaj vojoj kaj herbejoj de mia hejma vilaĝo. Dum Tondro manĝetis leontodojn aŭ freŝajn herboŝosojn apud vojflankoj kaj kamparaj heĝoj, mi sentis lian varman flankon kaj ventron. Mi povis senti lian grandan koron bati, estis kortuŝita de la enspiro kaj elspiro de liaj vastaj pulmoj kaj aŭdis la susuron de lia vosto dum lia blanka muzelo prenis la sekvan pecon.

Mi estas dankema. Mi dankas pro ĉevalaj amikecoj. Mi parolas al li dum ni marŝas. Mi certigas lin, ke ni certe trovos Kokani Brizon ie. Liaj oreloj kaj okuloj moviĝas maldekstren kaj dekstren, atentante kampojn kaj sonojn. Najbaroj rimarkas maljunan ekscentran viron kaj laŭtan mulon, kiuj marŝas kaj interparolas pri trovo de la leviĝonta Kokani Briz, okzala kvaronĉevalo kun blankaj ŝtrumpetoj kaj stelo sur la frunto.

Foje ni vidas tian ĉevalon en paŝtejo kaj Tondro trumpetas esperplenan vokon, kaj kiam neniu respondas per konata voĉo, mi provas konsoli lin. Mi donas al li karoton. Kaj ni daŭrigas nian serĉadon.

Ni daŭrigis niajn promenadojn dum tri jaroj ĝis decembra mateno kiam tuj post Kristnasko li kuŝiĝis apud la tombeja tumulo de Kokani, kaj mortis. ◆

Wally du Temple estas konata verkisto el Kanado.

Oktobro

Erika Godó



Oktobro venas, vento malvarma blovas,
sur branĉoj de arboj flavaj folioj dancas.
Kavalkado de koloroj, naturo lumas,
la magio de aŭtuno ĉion malbonan forpelas.
Matena roso kiel perloj sur la herbo,
malgrandaj sekretoj kaŝitaj inter branĉoj.
La tero sopirigas iom ripozon post somero,
ĉiu folio flustras pri la bona vetera adiaŭ.

Vestita en belaj koloroj, naturo floras,
dum sunradioj tra nuboj milde brilas.
La kampoj silentas, rikolto finiĝas,
sub la ĉielo griza, la mondo trankviliĝas.
Vesperoj longiĝas, tagoj iom mallumiĝas,
kaj ĉe la fajro, nia animo pli varme sentas.
Oktobro alportas al ni la pacon en nia koro,
la naturo jam prepariĝas por ĝia vintra dormo.





Malvarmeta vento de novembro,
folioj susuras en la arbaro.
Malgaja ĉielo, nuboj grizaj,
dormemaj tagoj, noktoj longaj.

Rigardante la mondon tra fenestro,
mi vidas la ŝanĝojn de la sezono.
Novembro alportas pensojn kaj sentojn,
kies profundo tuŝas la koron.

Nebulo kovras la pejzaĝon,
sunlumo perdas ĝian ĉarmon.
Arboj flaviĝas, folioj falas,
rememoroj, kvieta ĝojo regas.

Krakanta fajro, varma hejmo,
ĉiu momento kiel fabelo.
Ĝojo de hejmo, varma brilo,
Novembro, vi estas mirinda sezono.



Erika Godó

Naciaj trajtoj de la diboĉado

Laimundas Abromas



Trinkante pokalon kun eksterlandanoj, mi spertis diversajn neatenditajn surprizojn. Kvankam alkoholaĵoj reprezentantojn de ĉiuj nacioj efikas egale, tamen homoj ĉe la tablo kondukas diference.

Poloj diras: „Je via sano!“. Pri la tradicioj de drinkado de rusoj disvastiĝas legendoj. Ili drinkas ĉiam, ĉion kaj ĉie kaj neniu superos ilin. Rusoj estas spertuloj en drinkado. Tamen agrablas resti ĉe la tablo ankaŭ kun poloj. Cetere polinoj levas pokalon ne pli malbone ol viroj, tamen ili sukcesas resti virinece ĉarmaj. Ĉio pasas glate, ĝis la interparolo venas al historiaj temoj. Apenaŭ iu ekparolos pri la pasinteco, tutan restintan tempon necesos paroli pri 1939 jaro, Ĥatino, Siberio kaj aliaj dolorigaj temoj. Ne donu Dio, se iu litovo ekparolos ion similan: „Kiam mia avo batalis ĉe Vilno kontraŭ poloj...“ La postsekvoj de tia disputo povas esti neprognozataj!

Finnoj diras: „Terviseks!“ Plej malfacilas festeni kun finnoj. Kun ili ĝenerale malfacilas interkompreniĝi. Afero estras tia, ke sobraj finnoj malmulte parolas. Ili drinkas kaj silentas. Post kelkaj pokaloj ili ekparolas – kompreneble, en la finna lingvo. Tamen mi tiumomente paroli jam ne kapablis, ĉar mi kuŝis sub la tablo.

Hungaroj diras: „Egisŝegere!“ Kvankam hungaroj apartenas al la sama lingvofamilio, kiel finnoj kaj estonoj, tamen ili parolas pri ili kun ironio, primokante: „Iam ili migris al nordaj marĉoj, sed ni enradikiĝis en la mezo de Eŭropo, ĉiujn supervenkis kaj ĝisvivis!“ Do, ĝisvivi ili sukcesis, tamen interkomuniki kun reprezentantoj de aliaj nacioj preskaŭ ne lernis. Ili parolas nek anglan, nek germanan, nek rusan lingvojn. Esperanton forgesis, kvankam antaŭ kelkaj dekoj da jaroj Esperanto en Hungario furoris. Oni provu en la societo trovi komunan lingvon. Cetere ili drinkas siaspece – brandon kaj bieron ili aldrinkas per „Tokay“. Plej interese, ke post tia derivaĵo matene kapo doloras nek por unu hungaro, ili viglas kiel „kukumoj“.

Skandinavoj diras: „Skul!“ Se oni trafas ĉe la tablon kun skandinavo, vi sciu, ke ĉiuj paroloj koncernos nur du demandojn: „Kiel oni vivas ĉe vi?“ kaj „Ĉu multe diferencas la vivo en Danlando (Svedio, Norvegio) disde la vivo en Litovio?“ Komence mi fiere aktoris popolan diplomaton kaj poste tio tedis al mi ĝisradike. Kaj mi ne komprenis, per kio oni povas anstataŭi abundon da biero kaj iom da kono pri popola mastrumado...

Hispane: „Salud!“ Ili estas gajaj fraŭloj. Pri Litovio aŭdis ĝis nun nenion, pro tio malsaĝaj demandoj en iliaj kapoj ne naskiĝas. Iliaj deziroj modestas: sufiĉe eldrinki, iomete petoli, trovi fraŭlinojn kaj daŭrigi festenon. La temoj de iliaj interparoloj analogas – kun kiuj ili festenis pasintan semajnon kaj ĉu estis gaje. Hispane ili parolas riĉe kaj abunde, ĉiam aldonante dusencan vorteton „puta“ (en Esperanto signifas „putino“). Ĝi ofte estas uzata anstataŭ komo aŭ dezirante substreki iun precipe gravan penson. Kaj tiajn pensojn hispanoj posedas multe. Nu, eĉ tiun jam menciitan: kun kiuj ili pasigis lastan tempon kaj kiel gaje ili diboĉis...

Ĉinoj diras: „Gan bej!“ Reprezentantoj de tiu nacio estas precipe amikaj. Ili senĉese tuŝetas permane vian ŝultron, ridetas kaj per ĉiuj aliaj eblaj manieroj esprimas sian favoron „al ridinda blanka homo, kiu nenion komprenas en tiu ĉi vivo“. Cetere, en Ĉinio 0,7 litra botelo da biero

por kvinpersona kompanio – dozo faliganta ilin de sur piedoj. Ĉina biero al mi malbongustis, tamen ĉinoj pri ĝi fieras. Drinkinte po 200 mililitroj da biero, ili komencas kanti kaj svingi permane. „Varmiĝinte“ ili drinkas sojfaban brandon aŭ „U lan e“ drinkaĵon (kio signifas- „kvin grajnoj“, kiu odoras kiel Vjetnama balzamo kontraŭ nazkataro. Ankaŭ laŭguste ĝi similas tiun balzamon, tamen al ĉinoj ĝi plaĉas. Kun ĉiu levita taso (pokalojn ĉi tie neniu uzas) ĉinoj atente rigardas al okuloj de kunparolanto kaj eldiras: „Gan bej“ (ĝis la fundo). Ĝi ne estas la tosto – nur preludo. La tekstoj de veraj kaj justaj tostoj estas sankciitaj de partio: „Je la sano de Granda Estro!“ kaj similaj.

Ebriiĝinta ĉino ŝatas rakonti anekdotojn. Kutime pri mongoloj. Cetere, mongoloj posedas strangan alkutimiĝon: antaŭ ol eldrinki la unuan tason, ili trempas la montran fingron kaj per brando ŝmiras sian frunton. Pro kio oni tiel faras al eksterlandanoj ili ne klarigas, nur diras: „Tiel decas“.



Araboj diras: „Muĥamad rasuloloĥ!“ . Kutime ili verŝas plenplenan glason kaj komencas diri longan toston, kies ritmo multe similas la preĝon, krome ofte menciatas la vortoj: „Muĥamad“ (Mahometo) kaj „rasuloloĥ“ (Alaĥo Granda). Tion aŭdante, eksterlandanoj suspektas, ke araboj ĉiufoje sinpravigas antaŭ Dio, pro kio ili deliktas Koranon. Kiam unu arabo finas sian toston kaj glutas iom da ebriigaĵo, oni lasas paroli al alia. La glason oni findrinkas nur post multaj horoj.

Meksikanoj diras: „Arriba!“ . Meksikanoj komencas festeni tre bele. Ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ tablon, elektas „tomado“, kiel ni – litovoj diras „tablan komandanton“. „Arriba!“ (supren),-eldiras ĉetablaj kunestantoj ĥore,kaj iliaj manoj kun plenaj glasoj leviĝas supren. „Al centro!“ (sentraduke), - aklamas ili,kaj per glasoj intertintas. Komando „Abacho“ (malsupren) devigas ĉiujn mallevi glasojn apenaŭ ne ĝis la tero. „El entro!“ (internen), -krias meksikanoj, kaj la enhavo de glasoj finfine iras al buŝo. Tiu ĉi ceremonio estas ripetata dum tuta festeno. Meksikanoj drinkas tekilon sen salo kaj sen citrono (ignorante hollywoodajn fabelojn) kaj praktike sen almanĝo. Do, festenoj finiĝas en plena ebriiĝado.

Armenoj diras: „Ara, ĉu vi havas problemojn?!“. Pri tio, kiel festenas kaŭkazianoj (ekzemple , armenoj) estas tiom multe skribita, ke malfacilas ion novan aldoni. Tamen tutegale mi volas diri kelkajn nostalgiajn vortojn... Ĉar nenie vi ekaŭdos la vortojn: „Ara, ĉu vi havas problemojn? Ni iru kune kaj tuj disbatu viajn kontraŭulojn!“ Eble tio ne estas civilizacia, tamen tutegale tre agrablas.

Tamen alimatene... En postdrinkada mateno, rusoj la kapdoloron provas mildigi kun salakvo de sur peklitaj kukumoj. Azianoj – kun herba supo kaj ginsengo. Mongoloj – kun tomata suko kaj marinita ŝafa okulo. Finnoj – kun malvarma biero kaj haringo. Persone mi, por mildigi mian ebrian staton, eldrinkas glaseton da rusa brando. Nur unu, kaj ĝi helpas. ♦

MoVeMo

Bobelarto



Novembro estas la monato kiam ni invitas vin al la plej mojosa defio de Esperantujo!

Dum 30 tagoj, komencante sabate, la 1-an de novembro, ni verkos, legos aŭ tradukos kune. Sed ne nur! Recenzado de libroj? Kreado de filmetoj? Ordigado de viaj Esperantaj dokumentoj? Desegnado? Provlegado de via verko? Vi povas elekti ajnan defion por vi, kiun vi emas fari dum tridek tagoj. Ĝi estos la plej intensa muskoltrejnado de viaj kreemaj kapabloj kiun oni iam ajn inventis!

Kial indas partopreni?

Se vi emas komenci novan kutimon ĉiam estas malfacile, ni scias tion. Sidiĝi verki aŭ labori pri traduko bezonas seriozan sindediĉon. Vi trovos subteneman komunumon por kuraĝigi vin dum la 30 tagoj. Kun ĉiutaga aktivado ni povas atingi multon.

Kiel funkcias MoVeMo?

Vi elektas vian defion! La klasika defio kiu devenas el Usono temas pri verkado de kvindek mil vortoj en 30 tagoj, do 1667 vortojn tage. Ni povas diri al vi, ke ni komprenas la defion alimaniere. La plej grava parto de ĝi estas aktivi dum 30 tagoj, ĉiutage. Se vi elektas verki aŭ traduki tiam alia grava regulo estas, ke vi ne redaktas la tekston. Tiuj ĉi 30 tagoj estas por eligi la vortojn surpaperen aŭ enkomputilen.

Nia celo estas kunigi homojn, kiuj defias sin per ajna aktivado rilate al literaturo en Esperanto.

Ni renkontiĝos ĉiutage en la Telegramo-grupo por pridiskuti kiel ni sukcesas pri la defio. En la Zoom-ĉambro de Bobelarto estos ebleco kune fari niajn defiojn, ĉiutage je 15:00 UTC.

Aldone, ĉiun dimanĉon dum la monato, post fari kune niajn defiojn, ni dediĉos iom pli da tempo por babiladi pri la defioj kaj ĝojoj de MoVeMo, kaj subteni unu la alian.

Aliĝu al la defio nun! 🙌

MoVeMo

Erika Godó

Monato de MoVeMo, muziko de koroj,
lirikoj naskiĝas, deziroj estas sonĝoj.
Danco de vortoj, tago post tago,
defio atendas, mia koro estas en febro.
Mi skribas poemon, ritmo ludas,
ĉiu tago novan vorton alportas.
Mia imago vivas en ĉiu vico,
plumo en mano, sonĝo sur papero.
Tago post tago, vortoj teksigas,
krea mondo, nova literaturo naskiĝas.
MoVeMo vokas, neniam ĉesu,
la vortoj atendas vi skribu, kreu.



Kredi je io

Erika Godó

Kredi je io, kio estas netuŝebla,
kiu vivas nur en iliaj imagoj.
La potenco de fido ĉirkaŭbrakas nin,
kiel la sunlumo varmigas niajn korojn.

Ni kredas je eblecoj kaj mirakloj,
kiuj estas kaŝitaj en la ĉiutaga vivo.
La potenco de fido forpelas mallumon,
ĉar la potenco de fido allogas nin.

Ni kredas je la revoj, kiujn ni teksas,
ke ili iam realiĝos en niaj vivoj.
Ni kredas je amo kaj mia estonteco,
la afero estas kredi je io grava por ni.



Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay



Erika Godó

Kalman Kalocsay estis ne nur talentita verkisto, sed ankaŭ grandinflua verkisto, kies verkoj daŭre inspiradas multajn. Lia verko kaj tradukado ludis gravan rolon en la disvastigo de la esperanta kulturo, kaj li restas ikono en la komunumo. Mi loĝas en Miskolc, la urbo, kie Kalocsay finis siajn studojn, kaj mi eĉ iris al la sama mezlernejo kiel li. Tial ĉi tiu konkurso havas specialan signifon por mi.

Ni volas honori lian vivon kaj verkadon, rememorante lian unikan kontribuon al la Esperanta literaturo.

Ni esperas, ke la konkurso instigos pli da esperantistoj lerni pri liaj verkoj kaj apliki siajn tradukajn kapablojn.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, sendepende de ilia nivelo, partopreni en ĉi tiu konkurso!

Se vi volas partopreni en la konkurso, sendu viajn verkojn al kalocsayliteraturakurso@gmail.com retadreso ĝis la 31-a de Marto 2026.

Por pli da informoj, vizitu nian retejon <https://www.literaturavivo.com> ♦



**LITERATURA
KONKURSO
KÁLMÁN KALOCSAY**

Aŭtunaj momentoj...



Trad. *Lilaketo*

La oraj folioj lulas en vento,
momento brilegas en temp' senfino.
Aŭtuno kantas pri la pasinteco,
memoro flustras en mia koro.

La feliĉo vivas nur momenton,
sed portas sonĝon de la eterno.
Radioj kisas spuron de la suno,
Mia kor' ne sentas forpason, nur trankvilon.

La silento fariĝas lumo milda,
tuŝante mian helbelan animon,
faliĝanta folio, danca miraklo,
en forpaso loĝas nur simpla vivo.



Lilaketo (Julianna Vas-Szegedi estas konata verkistino el Hungario loĝanta en Vietnamio)

En sonĝo

En sonĝo mi estis
en la vilaĝo
de mia infanaĝo
delonge forgesita.
Tiam vivis ankoraŭ
miaj avinoj, avo,
bapto-patrino kaj patro,
kiujn mi amis,
kiuj min amis.
Ĉi-nokte en sonĝo
mi estis hejme
en tiu vilaĝo.
Estis silento,
kaj la domoj
de miaj avo, avino,
bapto-patro kaj patrino
estis neloĝataj!
Ili ne estis hejme,
estis en aliaj lokoj -
en tomboj.
Mi estis sola.



Lenke Szász





FORLASITA

Părăsită

Verkis: *Emil Gârleanu*

Trad. *Lenke Szász*



Sola ĝi estis. En la vasta, herboriĉa kamparo ĝi videblis nur tiam, kiam vento kuŝigis la altan herbaron kaj ĝi restis staranta – laktoblanka, kun distaŭzita kolhararo sur la blindaj okuloj, kun longa vosto ĉirkaŭanta la maldikajn krurojn. Ĉiumatene ĝi paŝadis malantaŭ la ĉevalaro, sekvante la sonoron de la arĝenta sonorileto el malproksimo. La sonorileto pendis sur la kolo de ĉevalo, kiu antaŭ nelonge ankoraŭ paŝadis apud ĝi.

Ĝi memoris ankaŭ du el ili, la ceterajn ĝi nutradis, karesadis per la velura nazo, sentis ilian apartan apudecon, sed neniam vidis ilin.

Iun vesperon, post la terura pluvego, ĝi ekmalsanis; ne mortis, sed perdis la vivkapablon. Ĝi sentis la sunvarmon, flaris odoron de la kampo, sed nenie estis lumo. Terura estis la unua nokto. Subite la ĉevalejo iĝis eĉ pli malluma. La manĝujo estis antaŭ ĝi, kiel tra kribrilo ĝi ekvidis ĝin, sed post minuto ĝi malaperis. Super la kapo estis fenestro; la ĉevalo levis la okulojn kaj staris senmove ĝis kiam ĝi ekaŭdis homajn voĉojn kaj pepadon de hirundoj, kiuj nestis sur trabo de la ĉevalejo, ĝi komprenis ke estas mateno. Sed la fenestro ne heliĝis. Kaj de tiam ĝi restis senluma. La ĉevalo jam al kutimiĝis. De tri-kvar jaroj ŝajne ĉiuj forgesis ĝin. Sola ĝi iras el la ĉevalejo kaj sola revenas... La ceteraj ĉevaloj, atingante la kampon, tuj rapide disŝutiĝas. Ĝi paŝtiĝas iomete kaj restas kun la streĉitaj oreloj, kun la okuloj rigardantaj nenion, kvazaŭ atendente ion.

Tagmeze ĝi iras al la akvo, ĝi konas sian lokon ĉe trinkotrogo; neniun ĉevalon ĝi sentas apud si. Ĉiuj aliaj trinkas pli malproksime. Malofte nur, vespere iu memoras pri ĝi. Tiam ĝi ekaŭdas la voĉon de rajdanto pelanta la ĉevalojn. Li krivokas ĝin longe: „Martaaa!” La ĉevalo returnas sian kapon kaj ekiras reen. Ĝi iras paŝante, elĉerpita, inter la altaj verbaskoj, kiuj karese tuŝadas ĝin. Kaj la tuta kampo kvazaŭ al kutimiĝinte, konas kaj amas ĝin. Etaj bluaj papilioj ĉirkaŭas ĝin, kiam ĝi iradas malrapide, altiras ilin la blanka hararo. Ili sidiĝas sur ĝian brilan postajo, leviĝas, peladas unu la alian kaj akompanas la ĉevalon ĝis malproksimo. Ĝi venas kaj reiras ĉiam sur la sama vojo. Kutime ĝi trairas unue la kampon, poste ĝi iras laŭlonge de terure profunda fendego, kien ĝi povus enfali pro kapturniĝo, se ĝi povus rigardi en ĝin. La ĉevalo iras sur la rando de la krutaĵo, envolvas ĝin laodoro de timiano kreskanta en la fundo. La paŝtistoj rigardis la aferon komence kun miro, poste ili lasis ĝin en paco, esperante ke ĝi glitfalos fine kaj ili liberiĝos de ĝi... Tamen ĝi paŝadis fideme, kun la kolo etendita, larĝigante la naztruojn por flari pli forte la odoron de la sovaĝa herbo, kiu ŝajne plivigliĝas ĝin. Poste la ĉevalo

trairas la vilaĝon. Hundoj ne bojas kontraŭ ĝi, knaboj ne peladas ĝin, neniu proksimiĝas al ĝi. En forlasita ĉevalejo, kie nur ĝi estas, en tiu sekura ejo, ĝi trovas ĉiam fojnon. Vintre la ejo similas al kelo kaj nokte, kiam ĉe fenestroj ĝemas ŝtormo kiel vundita giganto, la ĉevalo ekkuaŝas en la molan pajlon kaj atendas maltrankvile la sekvantan tagon, kiam eble ĝi aŭdos homan voĉon.

En ĉi tiu mateno ĝi eliris, malrapide paŝante, el la ĉevalejo. Ĝi sentis malforton. Sur la kampo, en la florkovrita senfino, la aero ŝajnis pli peza, la ĉevalo pene spiradis. Ĝi volis paŝtiĝi, pinĉis kelkajn herberojn kaj ekkuaŝis. Tion ĝi neniam faris ĝis nun. Ĝi etendis sian nazon, flaretis, kvazaŭ ŝarĝo pezus sur la kapo kaj la suno bruligis pli kaj pli forte. La semoj de la floroj odoris kvazaŭ rostitaj kaj la herbaro varmiĝis sub ĝi, kiel en nesto. Kaj subite ekblovis vento kun profunda ĝemo, venante eble el malproksimaj arbaroj, kun forta siblego ĝi kuŝigis kaj hirtigis la herbojn. El malproksimo aŭdiĝis fulmotondro, birdoj flugis rapideme kun timkrioj. De malproksimo, el direkto de la montoj venis la bruoj de pluvego. La ĉevalo ekstaris maltrankvile, kiam la unuaj gutoj batetis la korpon. Post kelkaj minutoj la pluvo sufokis ĝin, ĝi ne povis spiri, de sur la vosto akvo fluis kvazaŭ el fonto. Ĝi tremetis. Obtuzaj bruoj tuŝas la orelojn, la ĉevalaro galopas revenante, kaj tra la bruoj de pluvo eksonas plilongigita voĉo: „Martaaa!” Kaj ankoraŭfoje: „Martaaa!” Poste ĝi nenion plu aŭdis. Tiam, paŝante kun ektimo sub la torenta pluvo, ĝi ekiris revene, trotante kvazaŭ tra marĉetoj en kiuj mergiĝis la piedoj. Tiel ĝi atingis la randon de la fendego. La pluvo falis kolerege, apenaŭ ĝi povis iri, ĝi haltis super la profunda fendego, en kies fundo ŝaŭmante kuregis furioza akvoŝvelo. Kaj subite ŝajnis al ĝi, ke la tero moviĝis sub ĝi: eĉ por ektimi ne estis tempo, la bordo komencis deiĝi malrapide, faligis ĝin flanken, poste la tero falis rapide en la fendegon, ruligante la ĉevalon. Ĝi haltis sur teraltaĵeto super la ŝaŭmanta rivereto.



Kaj la vento furioze blovanta inter la muroj de la fendego, fluanta kiel akvo, kuŝigis sovaĝan timianon sur la frakasitan korpon de la ĉevalo. ◆



1. La Tablo

Stanislao M Esposito

Ŝi ne mezuris per kuleroj —
Pun' da faruno, ole' iometa,
En manoj vivis receptoj veraj,
Ne en papero, sed en la koro neta.

Dimanĉe plena la tablo kantis,
Kun pano, rido kaj vino verŝa.
Post jaroj malplena la ĉambro restis,
Sed la tablo varmis, memor' ne forviŝa.

Infanoj kreskis, foriris for,
Seĝoj silentis, restis sopiro,
Ŝi tamen kuiris kun sama fervor',
Lasante lokon por revena spiro.

En lasta nokto, la domo sonoris,
Voĉoj konfuzis, la pano rompiĝis.
Kiam la rido malrapide forgloris,
Ŝi tuŝis la tablon, la vivo silentiĝis.

Kaj matenlumo trovis la ĉambron,
La tablo portis la manojn ŝiajn,
Seĝo malplena gardis la kambron,
Sed restis la varmo en ligna brilaĵ

Sub la griza vualo de pluvo

Sub la griza vualo de pluvo,
la mondo silente spiradas.
La folioj preĝas sur la tero,
kaj ĉiu guto falas kiel penso,
revenanta al la fonto
de la animo.

Kaj mi, perdita en la murmuro,
aŭskultas la tempon dissolviĝi.
En la spegulo de malsekaj vitroj
mi vidas ne la mondon,
sed min mem —
malnova sonĝo vekiganta."

Stanislao

Stanislao M Esposito



Stanislao M Esposito estas konata esperanta poeto el Italio.

La pluv', silento kaj sopiro

La pluv', silento kaj sopiro
Senmovaj arboj ekmeditas,
Pri kio pensas la folioj
La spuroj oraj antaŭ foriro?

Kaj iu fotas sub la pluvo
Belecon de natur' magia,
Ĉu aŭtun' trapasas, aŭ vivo?
Esperoj, revoj, atendado nia.

En regno vintra - montojn neĝajn
Nebulo kovris, sed ĉi-tie
La adiaŭ' de aŭtuno
Sur mano kuŝas la folio.

Pasanto daŭrigas foti
Pro pluvo frostas, pro malvarmo,
Neni' komprenas, kion fotas
Ĉu aŭtunajn aŭ siajn larmojn...



Rita Mkrtchyan



Hripsime (Rita) Ĵ. Mkrtĉjan estas esperanta poetino en Erevan, Armenio.

La unua konkurso de Aldravista Poezio estis organizita de TEK-Taguatinga Esperanto-Klubo el Brazilo

Maria Terezinha de Carvalho Sardinha



Kio estas Aldravio?

Ĝi estas tipa brazila poezio, konsistanta el ses vortoj aranĝitaj vertikale. Ĝi estas sinteza poemo, konsistanta el ses unuvortaj versoj, kiuj esploras metonimie kaj lirike vidpunktojn pri la mondo. Aldravio povas tute bone naskiĝi per la manoj de alfabetiĝanto aŭ alfabetiĝantino, same kiel per la manoj de poeto aŭ poetino, ĉu sperta ĉu nesperta.

Temas pri poezia agado propra al la persono (kiu verkas aŭ kiu legas), kiu liberigas lin aŭ ŝin je ties internaj fluoj per la flugiloj de unika verkado, sendepende de kanonoj kaj konvencioj rilate al literaturaj skoloj aŭ aliaj akademiaĵoj.

Ĝi estas nova kreaĵo, aŭtentike brazila, aperinta en la urbo Mariana, en la ŝtato Minas Gerais, el kie ĝi diskoniĝis tutmonde.

La unuan premion de la konkurso pri Aldravita Poezio, organizita de TEK-Taguatinga Esperanto-Klubo el Brazilo, gajnis la esperantisto Jobson M. Dantas.

La poemo, kiu gajnis la unuan premion:

**Amon
pacon
respekton
fruktigas
vera
frateco...**



Jobson M. Dantas



Verkis: *Meri Tiracujan*

Ok Tagoj de Unu jaro!



Prezentis: *Rita Mkrtchyan*

KARAJ GEAMIKOJ! 📢

HODIAŬ NI PREZENTOS AL VI LA ESEON, KIU ESTIS SENDITA AL LA KONKURSO DE "LITERA TURO"!

BONVOLU LEGI, SKRIBI VIAN OPINION KAJ...REMEMORU VIAN PARTOPRENON EN UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO (ne gravas en kiu jaro). ❤️

Ok Tagoj de Unu jaro!

Aŭ,

Rememoroj pri unu el Universalaj Kongresoj de Esperanto.



Mi rakontos pri mia unua partopreno en UK, sed komence mi iomete ektuŝos mian antaŭvojan vivon.

Mi eksciis pri nova lingvo jam de infanaĝo. Ofte mi ekmiradis, per kiu lingvo paroladis miaj gepatroj, kiam deziras, ke mi nenion komprenu de ilia interparolo.

Kiel ĉiuj infanoj en Esperanto-familioj, mi ankaŭ partoprenadis en Esperanto-aranĝoj, diversaj renkontiĝoj en urba Esperanto-klubo.

Mi bone memoras, kiel ni ludadis kun aliaj infanoj, ĝis niaj gepatroj kaj multe da gesamideanoj ion aranĝis.

Mi ne volas rakonti mian biografion, sed devas ekmemori, kiel mi decidis partopreni UK-n.

Ĝis tio mia Esperanto-vivo estis limigita per mia familia rondo kaj Esperanto-aranĝoj, organizitaj en nia urbo, en aliaj regionoj de nia lando.

Esperanto estis "membro" de nia familio, kaj sen ĝi mi ne imagis kaj ne imagas nian familian vivon.

Kiel mi memoras, (de infaneco), mia patrino ĉiam ion verkadis, tradukadis, la patro ankaŭ ĉiam tradukadis ion el historio de nia lando kaj multe da diversaj temoj, poste uzataj por ekskursoj dum la aranĝoj.

Revuoj "Esperanto", diversaj ĵurnaloj, gazetoj, mia studenta gazeto kun mia unua artikolo pri Internacia lingvo, landaj ĵurnaloj kun diversaj artikoloj pri Esperanto, kiujn aperigis foje post foje mia patrino- ĉi-tio estis gravaj komponantoj de mia ĉiutaga vivo.

En la revuo Esperanto ankaŭ iam aperis mia artikolo pri verkado.

Mi nur aldonu, ke ofte vespere ni kutime ŝatis kanti Esperanto-kantojn, mi gitarludis al ĝojo de miaj gepatroj kaj fine...mi "trairos" al mia decido partopreni UK-n de Esperanto.

Mi forgesis noti, ke ĉiuj rememoroj de mia patrino, kiu pli frue konatiĝis kun Esperanto ol mia patro, finiĝis per admiraj vortoj pri UK.

Ŝi rakontis pri belega amika etoso dum kongresa tempo, pri interesaj programeroj, pri tempo "labori" kaj tempo ripozi, pri novaĵoj, pri interesa informo, pri konatiĝo kun bonegaj gesamideanoj ktp, ktp.

Mi tiel reale imagis ĉiam en fino de la rakonto dumkongresan vivon, ke decidis - "Pli bone

unu fojo ekvidi, ol centfoje ekaŭdi". 😊

La fojoj aŭdi estis ne cent, sed centfoje po cent, sed tio jam ne gravas.

Mi pretiĝis al la forveturo en urbon de UK.

En miaj pensoj kaj antaŭ miaj okuloj estis preskaŭ baldaŭ atingota "Edeno" de diversnaciaj homoj, kiuj parolos per unu lingvo.

Kaj jen feliĉo, mi atingis la celon de mia vojaĝo.

Post hotelo, mi eĉ ne volis ripozi kaj decidis veturi al Kongresejo. En ĉi-tiu momento mi interrompos mian rakonton por doni la konsilon al ĉiuj, kiuj estos legantaj miajn rememorojn, - se vi elektos malĝustan vojamikon, ĉitio povas malsukcesigi vian vojaĝon. 😞

Kaj jen - malfermo de la UK. Belega halo, "verda" ĉirkaŭaĵo, prezidanto de UEA, estraranoj, gastoj, famegaj en Eo- movado gesamideanoj, kaj... amaso de novaj geamikoj (mi tiel pensis).

--2--

Post triumfa Malfermo, kiam mia koro saltadis de feliĉo, mi staris kun miaj samlandanoj, poste sole kaj observis, kiel la "loĝantoj de Edeno" alproksimiĝis, interbrakumis siajn konatulojn kaj daŭrigis la vojon.

En oreloj sonis la voĉo de patrino, sed pli kaj pli mallaŭte.

Ĉiutageco de kongresa programo, koncertoj, prelegoj, prezentaĵoj de diversaj fakoj- ĉio estis nova, interesa, same kiel mem la lando, memorindaĵoj de kiu, mi sukcesis iomete ekvidi.

Sed tiu fabelo, pri kiu rakontis miaj gepatroj, ve, forestis. 😞

Iu povas pripensi, ke mi estis ne komunikebla persono, sed kreu, ke ne. Simple io ŝanĝiĝis en UK-j. Ĉio estis kaj la sama, kaj alia. Nur unu eco restis eble kaj en pasintaj jaroj, kaj nun- ridetemaj vizaĝoj de geesperantistoj. 😊

De ĉiu UK, kiun partoprenis miaj gepatroj, ili povis rakonti diversajn historiojn bonajn, gajajn, interesajn. Kion ekpovus rakonti mi?

Mi ne sciis. Pasis ok tagoj, ĉiutage mi atendis, ke mi iĝos membro de "Unu granda rondo familia", atendis ĝis solena fermo de UK.

Mi adiaŭis la landon, adiaŭis mian unuan UK- n. Dum revena vojo mi pripensis, ke rakontos al miaj gepatroj, ke mi ĝuis miraklojn de Universala Konreso, por ke la "festo" de ilia Esperanto vivo ne estu detruita kaj ankaŭ, mi racie komprenas, ke iuj aranĝoj povas esti sukcesaj, iuj, ne.

Mi ankoraŭ foje interrompos la rakonton por doni sekvan konsilon,- neniam seniluziigu homojn en bonaj rememoroj, ĉar la cirkostancoj povas ŝanĝiĝi , sed amareco de seniluziigo restos. 😊

Samtempe mi komprenis, ke ne eblas revivigi pasintecon, ĉiu tempo havas sian "koloron".

Mi ne lasis Esperanton pro ioma senreviĝo. En nia hejmo ĉio fluis samorde, kio eblas priskribi per kelkaj substantivoj: Legado, tradukado, verkado, kantado, pripensado. 🙌

Pripensado pri disvastiĝo de Esperanto en nia lando.

Mi memoras historion de multaj landoj, kiam la forta regno diseriĝis pro tio, ke la intereso de la estraranoj iĝis diversaj, ili forgesis, ke por ke la ŝtato iĝu forta, necese unuiĝi, unuiĝi kaj agadi ĉirkaŭ unu ideo, unu impeto, unu venko (Pardonu, ankoraŭ unu interrompo).

Mi ne sukcesis partopreni ĉijaran UK-n en Brno,

sed "8 tagoj de unu jaro" ĉiam ĉeestos en miaj vivaj planoj por ripozi, ekscii kaj ion ŝanĝi en mi kaj ĉirkaŭ mi.

Pli supre mi priskribis ion per substantivoj, sed, kiel vi legas nun, nur per la verboj ni ekpovus ion atingi en tio, pri kio ni revas! ◆





Donika Dabishevcu

Poetino el Kosovo



Tradukis: *Bardhyl Adem Selimi*

Malbona, vi...!

Malbona, vi...!

Kial vi staras konfuze,
peza kiel plumbo el silento?

Mi estas sunplena,
ne malbeno nigra.

Nekonata eble estas
nur la momento, kiu kunigis
ĉi tiun sovaĝan allogon,
freneze profundan.

Kial vi timas?

Iun tagon nek vi nek mi
ekzistos plu —
ni perdiĝos,
ni malestiĝos.

Vi revenos al marĉo,
mi al la lavo de vulkano,
vi al iu torenta rivero,
kaj mi brilos kiel ĉielarko,
kiel multkolora ĉielarko plena je ĝojo!

Ne retiriĝu,
eksplodu kiel ŝpruco da sango!
Lumigu mian koron,
ekbruligu mian korpon.

Kaj jes: la lipojn!
Malforta estaĵo, kiu petas preĝon:
La lipojn!



(unu el la poemoj, per kiuj mi prezentis min hodiaŭ en la Internacia Literatura Festivalo por Junuloj “Tirana Pordo” 2025)

Bardhyl Adem Selimi estas esperanta poeto el Albanio.

LA BUBO

Ivaniĉka MAĜAROVA



Ŝi eliris el la aŭto, la lasta moda fabrikmarko de la aŭto-industrio, eleganta, bela, luksa. Ŝi estis vestita per la marko "Versace", kio estis videbla unuavide. Galante ŝi turnis sin al ĉiuj flankoj por kontroli, ĉu ŝi estis rimarkita. Ho, jes, la paparazoj estis ĉi tie. Fotiloj ekklakis, kameroj ekis. Trankvila kaj memamanta ŝi skuis sian belan kapon. Ŝiaj belegaj blondaj, bonaspektaj hararoj disfaliĝis sur ŝiaj ŝultroj. Ŝi haltis tuj antaŭ la enirejo de la moda domo "Versace".

- Sinjorino, - la servisto el la magazeno, klininta ŝultrojn, diligente etendis sian manon - la ŝlosilojn, mi petas!

Kun iom da malrespekto, la damo metis la ŝlosilojn, de la arĝenta "Honda", en lian manon, aldonante:

- Estu ĝi ĉi tie post tri horoj! Mi ne atentos! –pensante "Ĉu mi sukcesos, dum tiom malmulta tempo, serĉi, provi kaj aĉeti? Montri mian novan vizaĝon al la klaĉulinoj, rakonti pri la nova dieto, per kiu mi jam perdis 300 gramojn sen sekvi severajn dietojn. Eĉ la ĉokolado estas permesita. "

Ŝi ĉirkaŭrigardis ĉiujn flankojn. La paparazoj estis sur siaj lokoj. Kun kontenta rideto sur la vizaĝo, ŝi ekmarŝis al la enirejo de la modmagazeno.

Sed ...

- Ho, Dio mia, - ŝi ekkriis.

Kaj kio okazis en la sekvaj minutoj, ŝi eĉ ne povis kompreni. Malpura bubo blokis ŝian vojon, petante almozon. De kie ĝi venis? Kiel alproksimiĝis kaj kiu permesis al ĝi?

- Helpon !!! Kio estas ĉi tiu naŭza estaĵo? – ŝi ne finis ankoraŭ sian indignon dum kio la infano estis forpelita. La oficisto trenis la infanon je la kolumo de lia eluzita manteleto, kaj ĵetis lin sur la straton. La knabo timigite rigardis la rapidantajn aŭtojn, kiuj preskaŭ venos super ĝi, preterpasante unu la alian.

-Kial vi venis denove? Mi diris al vi hieraŭ, ke via loko ne estas ĉi tie! Mi avertis vin, ke se vi aperos denove, mi telefonos al la polico, por ke oni forigu vin tie, kie estas via loko.. . For ! Kaj miaj okuloj neniam revidu vin tie ĉi! Li eksvingis, kaj lia peza mano frapis la kapon de la knabo.



- Mi nur volis ...—La infano ne sukcesis diri siajn vortojn , ĉar sekvis novaj batoj sur lia vizaĝo kaj kapo. Sango elfluis el lia nazo, kiun li provis viŝi per la maniko de sia trafrotita manteleto. La knabeto kuntiriĝis pro doloro, kaj liaj profundaj, malĝojaj okuloj pleniĝis je larmoj, kiuj fluis sur liaj ekflamantaj vangoj.

li venis ĉi tien esperante ricevi almozon, ne por si mem, sed por sia malsana patrino, kiu estis en lito hejme ekde du semajnoj. Domo, se oni povus nomi tiel la barakon, kie li loĝis kun siaj du pli junaj fratinoj. Li nun estis la estro de la familio, post kiam lia patro mortis en fabrika akcidento, kaj li ne ricevis kompenson. Oni ankaŭ forprenis la oficejan loĝejon, kiun ili ne plu rajtis.

- Kaj hodiaŭ mi ne sukcesis!—Li pensis laŭte.—Ĉi tien venas la plej riĉaj ... Kial? Li ne metis pecon da pano en la buŝon dum tri tagoj. La malmultaj moneroj, kiujn iu maljunulino donis al li en la merkato, sufiĉis nur por unu pano kaj kelkaj tomatoj.

- Mi ŝtelos! Tio estas peko, sed mi devas nutri mian patrinon...

Kuntiriĝinte pro doloro kaj timo, li apenaŭ povis transiri la trafikatan straton. Aliflanke estis malgranda nutraĵvendejo en la angulo. Li eniros por peti panon kaj iom da kolbaso, kaj li vespere lavos la plankon. Li rakontos ilin pri sia patrino kaj siaj du fratinoj. Pro sia patro forpasinta. Se apenaŭ kortuŝus ilin.

"Kaj se ili ne donos al mi? Mi ekgvatos la vendistinon kaj prenos kion ajn mi povus por manĝado"—li pensis, kaj marŝis pli memfide al la pordo de la butikoj.

- Kion vi faras ĉi tie denove?—Severa vira voĉo ekkriis la bubon.—Mi forpelis vin hieraŭ, vi estas ĉi tie denove. Nu, foriru!..—Forta vira mano ĵetis lin al la strato, kie preterflugis luksaj veturiloj, gvidataj de elegantaj sinjorinoj kaj negocistoj. ♦

Aŭtuna ploro



Jadranka Miric

Aŭtune aŭdiĝas ploro de naturo.

Ĉu pro falinta foliar'?

Aŭ pro frue videbla lunokonturo?

Aŭ pro iu malfrua migrada birdar'?

Ĉu la tagoj mallongiĝas?

Homoj pri vintra provizo okupiĝas.

Noktoj ne nur pli longiĝas

sed pli malvarmiĝas.

La arbarbranĉaro nudiĝas.

En mia okulo larmo nestiĝas,

ĉar ĉe la arbpiedo falinta foliar' putras

malrapide sed certe en polvaĵo transformiĝas.



Jadranka Miric estas el Kroatio.



Verkis: *Marguerite Audoux* (1863-1937)

Vivo, Unu Komuna Afero



Trad. *Roland Platteau*

Ĥumatene S^{ro} *Dalignac* vidinte etan muson eliri el la porĉifona kesto, postulis apenaŭ ne koleriĝanta, ke *Duretour* iru tuj serĉi la katon de l'najbaro.

Tiu estis dika kato, naskiĝinta en la apuda apartamento, kaj kiu estis neniam vidinta muson. Li renkontiĝadis sur la interŝtuparo, kie li petadis por la karesoj de l'laboristinoj. Enirinte tuj ĝi sursaltis la stabmaŝinojn, kaj elesploris la laborejon flarekzamenante en ĉiaj anguloj, poste, ĉion vidinte, li ŝovis sian korpon en malplenan fakon por tie dormi komforte.

La eta muso antaŭsentis la danĝeron. Plurfoje ĝi montris sian subtilan muzelon inter la muro kaj la kamentabulo, sed ĝi ne aŭdacis iri pluen. Poste, ĉar la dika kato pludormadis, ĝi kuraĝiĝis kaj trakuris la laborejon kuirejen.

Ree ŝi agis la postajn tagojn. Ĝi pasis eteta kaj vigla kun sia beleta griza felo, kaj *Bergounette*, kiu ĝin gvatadis, ridis pro vidi ĝin tiom lertan.

Tamen ĝin ekvidis la kato; tiu saltis peze de sia breto kaj iris malantaŭ ĝi en la kuirejon. Iom poste ĝi revenis, sed ŝanĝiĝintis ĝia sinteno. Ĝi paŝadis singarde, kaj ĝia tuta korpo plilongiĝadis; ĝiaj okuloj fariĝintis eĉ pliflavaj, kaj siajn ungegojn ĝi lente ellongiĝadis. Ĝi denove ĉirkaŭiris la laborejon, sed, anstataŭ reveni al sia fako, ĝi lokis sin sub tabureto ĉe la kamenoniĉo. Ĝi aspektis dormanta, nazon sur la piedoj, sed unu aŭ alia el ĝiaj oreloj konstante streĉiĝintis, kaj vidiĝis inter ĝiaj palpebroj streko malhela.

Al la museto ŝajne ne urĝadis reveni, kaj neniu estis plu pensanta pri ĝi nek pri la kato, kiam ekaŭdiĝis krion tiom fajna kaj tiom longa, ke ĉiuj maŝinoj haltis, kaj ĉiuj ekrigardis tabureten. Ankoraŭ tie troviĝis la kato, sed kuŝe surflanke kaj, sub unu el ĝiaj kruroj, sterniĝanta, la vosto de l'muso elkuŝis kiel disa peco da nigra laĉo. Preskaŭ tuje svingiĝis la nigra laĉo, kaj forfuĝis la muso. Ĝi ne iris longe, la kato baris al ĝi la vojon, kaj turnis ĝin per krurbato. Ĝi unu temperon restis kiel morta, poste provis forkuri al la kuirejo; denove la kato troviĝis antaŭ ĝi.



Tiam ĝi freneziĝis el teroro ; ĝi deziregis elfuĝi ie ajn kaj iel ajn ; ĝi turniĝis aŭ impetis ĉiudirekten, kaj ĉiam ungegobate revenigis ĝin la kato en la laborejon. Estis momento kiam krediĝis ke, ĝi estis resignacionta je morti , tiomtiome ĝi estis tremanta kaj sinka. Sed subite ĝi staris kontraŭ sia turmentisto. Ĝi tiom abrupte ekstaris ke ĝia impeto apenaŭ ne faligis ĝin malantaŭen : restis ĝi stare plentremetanta, moviganta siaj antaŭajn kruojn, dum ĝia sanganta buŝeto eligadis vice diversajn kriojn. Kaj ĉiu inter ni bone komprenis, ke ĝi estis superŝutanta je insultoj la egan monstron ⁽¹⁾ , kiu rigardis al ĝi, kvietside, klinante la kapon. Poste, Kvazaŭ ĝi estus mezurinta subite tutan sian malpovon, kaj kompreninta, ke nenio povis ĝin savi, ĝi ŝanceliĝis kaj refalis dum ĝi eligis akran ĝemon. Kaj tio estis tiom kompatinda, ke « *Bouledogue* » ekkaptis la katon je mezo de l'dorso, kaj ĝin ĵetis sur la tablon. Ĝi remalsupreniris tre rapide, sed la muso ne plu estis tie.

La mastro returnis al sia kuŝseĝo, kaj oni ne sciis ĉu kontente aŭ malkontente li diris :

- Nu ĝi estas for !

S^{-ino} Dalignac spiregis, kaj ŝiaj du pugnoj, kiujn ŝi estis tenadanta premitaj ĉe l'brusto, subite malfermiĝis tiel, kiel ŝi mem nenion plu havis por timi. ♦

(1) tuta la simbolo de l'homa situacio.....

Roland PLATTEAU (Cambrai, norda Francio, 1949) estas franca esperantisto. Li esperantiĝis en 1999 kaj laboris kiel oficisto.

LA PIANISTINO

Ivanichka Madharova



La pordo brue malfermiĝis kaj la aerfluo eklulis la kurtenon. La fenestro kaj la pordo al la verando estis malfermitaj. La varmega julia tago ekstere konsumis kaj la lastan humidon el la tero. La ardega aero embarasis la spiradon de homoj kaj animaloj.

- Kiam vi finos? – vira tenoro rompis la sonaton de Chopen.

Ne sekvis respondo. La piano daŭris ludi la sorĉan melodion de la grandega komponisto.

- Ah, kiel ŝi ŝatis ludi tiun ĉi sonaton! Ĝi varmigis ŝian koron, donis al ŝi fortojn iri antaŭen. Pro kio li ŝin rompis? - Ljudmil estas sola en la ĝardeno, sed vi tie ĉi muzikas – kolere diris la viro.

Ja pro tio ŝi malfermis la pordon de la verando. La knabeto aŭskultu la varmajn tonojn de la piano, kiuj enportu harmonion en lia infana animo. Por ke li ŝatu la belecon per la muziko.

-Bone, mi finas!

-Mi ne revenos por tagmanĝo. Mi laboros ĝis malfrue. Ne atendu min!

- Kiel ordinare – silente diris la vortojn la pianistino.

- Kion vi alŭdas?

- Ho, nenion speciale – oni aŭdis ŝian voĉon de la verando.

- Panjo, panjo vidu, kian kastelon mi faris!

- Jes, infano mia. Sabla!

Ĉu ŝia vivo ne okazis sabla?

Estis antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj. Ili renkontiĝis dum iu koncerto. Li donacis al ŝi florojn. Poste dum ĉiu ŝia koncerto li sidis en la unua vico, maldekstre, kun bukedo de sep ruĝaj rozoj. Tiel dum tuta jaro, ĝis kiam iun tagon li konfesis al ŝi sian amon.

Li enamiĝis per la unua rigardo. Ŝi atendis tion, eĉ ĝin deziris. Li estis tiel galanta, atentema, ŝatis la muzikon. Ankaŭ kaj estis bela viro, post kiu multe da virinoj sopirĝemis. Laŭ liaj vortoj li havis eblecon krei familion. Li ne malŝparis monon, kiun, kiel mem diris, gajnis per honesta laboro. Post nelonga tempo li proponis al ŝi geedziĝon. Ŝi ĝoje akceptis.

Ŝi ekamis lin kaj lia propono promesis sekurecon, ne vivon de ankoraŭ nekonata koncerta muzikistino. Malfacile nun oni eblas sukcesi en la muzikbazaro. Li promesis esti ŝultro de ŝi por ŝia estonta evoluo, sekuriganta ŝin finance. Ŝiaj koleginoj, malgraŭ ke malmulte enviis ŝin, subtenis la decidon, kiun ŝi devis preni.

Dum la unuaj jaroj ŝi flugis en la nuboj. Ŝi ne zorgis pri la pano, eĉ permesis al si lukson – tualetojn, vojaĝojn. Sed la koncertoj malmultiĝis kaj en la aliaj landoj oni entute forgesis ŝin. Li kondukis ŝin al la laboraj renkotoj. Komence oni proponis al ŝi muziki ion.

- Ion pli konatan kaj kompreneblan, ĉar vi scias, tiuj estas negocistoj – avertis ŝin la organizantoj.

Kaj ŝi ja sentis, ke ili ne aŭskultas ŝin tiel, kiel la folkkantistinaĉojn, kiujn iuj el la negocistoj gvidis kun si kiel “ engaĝitaj kantistinoj”, sed fakte ili estis iliaj konkubinoj.

Ŝia edzo komence laŭdis ŝin, ke ŝi estas sciata pianistino, multe serĉata en eksterlando, sed fakte jam neniu rememoris pri ŝi. Ŝi estis kiel broĉo sur la kravato, por ke li elstaru antaŭ la aliaj kolegoj, ke lia edzino estas parto de la intelektuloj. Sed li baldaŭ komprenis, ke la kantistinaĉoj estas pli dezirataj ol la profesia pianistino. Kaj li ĉesis preni ŝin. Ŝi ne reagis, ĉar inter ili ŝi ne sentis sin necesa, ne je sia loko. Ŝi ne kontaktis multe kun la junulinoj de folko. Sed iufoje ŝi ekparolis Nina’n.

-Mi ne havis alian alternativon – sincere konfesis Nina. – Mi finis muzikan lernejon, fako “Piano kaj perfektiga kantado”, sed oni ne akceptis min en la Akademio. Mi provis du fojojn, sed necesis protekto. Mi rezignis. Sed mi devis nutri min. Mi provis en la konkursoj, sed kaj tie mi ne havis sukceson. Aŭskultis min la produktcentro kaj proponis al mi ŝanĝi mian rolspecon – folko. Mi komencis. Mi pensis labori nur kelke da jaroj, ĝis kiam mi ordigas mian staton, sed okazis por ĉiam. Oni ne povas eliri el tio ĉi. Kaj kien mi iru? Oni gluis al mi la etiketon “folkkantistinaĉino” – esploris Nina kaj ŝvingis la manon. Ŝi havis belegan profundan voĉon, figuron kaj konduton de opera kantistino.

Tiun nokton ŝi longtempe ne povis ekdormi. Ŝi pensis pri Nina, sed kaj pri si mem: “Pro kio mi fiaskigis tiel facile mian karieron? Ĉu mi ne havis alian elekton? Kio min timigis?”

Ŝia edzo komencis ofte nokte malfruiĝi. Kiam revenis li ne eniris la geedziĝĉambron, sed dormis en la kabineto. Fojfoje li eĉ ne revenis.

-Iĝis necese, ke mi restu labori ĝis malfrue kaj por ke ne maltrankviligu vin, mi tranoktis en la laborĉambro” – mensogoj, kiujn ŝi jam sciis.

Liun tagon ŝi komprenis, ke estas graveda. Komence ŝi ekĝojis. La infano povus denove revenigi ilin unu al la alia. Sed ŝi ektimis – ĉu estas preta iĝi patrino? Kia patro estos li? Eble la naskiĝo lin ŝanĝos? Demandoj, demandoj... Ŝi ne kuraĝis diri al li.

Li ekĝojis, kiam komprenis, ke estos knabo.

- Mi havos heredanton, kiu prenos mian laboron.

Ŝi revis, ke li iĝu muzikisto. Mi instruos lin ludi pianon.

-Ho,ne! Ĝis tie ĉi kun la piano! Lasu tiujn fantaziojn! Publiko, aplaŭdoj, floroj kaj rozoj – efemeraj aĵoj... La vivo volas fortan manon, elastecon kaj scipovon gajni. "Muzikisto domon ne nutras", vi scias tiun popoldiron, ĉu ne? Kaj vi mem komprenis tion, ke se ne estus mi, tiel vi vivus mizere per via muziko. De viro oni bezonas nutri familion. Mia negoco estas bona kaj li daŭrigos ĝin estonte.

Ili nomis lin Ljudmil, al la nomo de ŝia edzo. Oni diras, ke hodiaŭ estas moderne nomi la unuenaskitan filon al sia patro. Ŝi ne rezistis. Al ŝi plaĉis tiu nomo. Verŝajne ĉar li, ŝia edzo, estis ŝia unua amo. Sed ĉu estis amo? Jes, kaj ŝi ankoraŭ amas lin.

Ĉu kaj li? Li revenis al la familio.

La malgranda Ljudmil rapide progresis en la pianludo. Ŝi estis certa, ke li havas disvolvitan aŭdokapablon kaj talenton. Ŝi donis al li lecionojn preskaŭ kaŝe, por ke ne kolerigu sian edzon, kiu daŭris insinui, ke la filo akiru pli kaj pli kvalitojn por estonta entreprenisto. Li komencis lin gvidi al laboraj renkontoj, konatigi lin kun sia laboro, lin, ankoraŭ infano. Kaj Ljudmil? Al li estis interese, sed kiam sidis antaŭ la klavaro, li iel transformiĝis, lia vizaĝo eklumiĝis, ekbrilis. Ne estis necese instigi lin sidi antaŭ la piano. Ŝi ofte laŭdis lin muziki sola. Ŝi staris kaj tenere aŭskultis lian plenumon, emocian kaj profesian.

- Li iĝos bona muzikisto. Pli bona ol mi – ĝojis ŝi kaj feliĉa rideto radiigis ŝian vizaĝon.

Sed ili kune atente gardis sian sekreton, por ke lia patro ne eksciigu pri la piano. Ŝi multfoje pensis, ke se li aŭdis lin, kiel la filo ludas, li ŝin pardonos kaj lasos Ljudi'n, kiel ŝi nomis sian filon, por ke li mem elektu sian vojon. Sed la patro estis malcedema, ke lia filo iun tagon daŭrigos lian negocon. Li registris lin studi inĝenieran profesion.

Kaj tiam okazis la neatendito.

Oni trovis al ŝi kanceron. La diagnozo estis terura. Oni diris, ke ŝi malmulte malfruiĝis. Sed ili kredis ke helpas al ŝi kaj ke tio ankaŭ dependas de ŝi. Ŝi bezonas ankaŭ la subtenon de la proksimuloj. Komence ili kaŝis tion de Ljudi, sed li rapide eksciis. Li estis malesperigita, havis embarasojn en la Universitato, ne parolis, nur muzikis longatempe List, Chopin, Mozart, Bach – profesie, sed iel triste sonis sub

liaj longaj, teneraj fingroj... Lia patro aŭskultis en la gastĉambro. Li nenion diris, eĉ ne demandis kiam lia filo eklernis muziki majstre kaj kiu lin instruis. Li konjektis, ne reagis, ne riproĉis, sed ankaŭ ne laŭdis lin. Kaj li enfermiĝis. Li jam ne malfruiĝis, estis atentema, preta al ĉio por faciligi la suferon de sia edzino. La malklara perspektivo lin turmentis. La virino, la patrino de lia filo, kiun li ĉiam amis kaj nun komprenis, ke ĝis nun tiel forte amis, povis ilin forlasi kaj foriri por ĉiam. Tion li ne povus elteni.

Tiu, kiun li ofte nemerite ofendis, ignoris kaj malĝojigis, tiu, kiu malgraŭ ĉio restis fidela edzino kaj perfekta patrino.

La tagoj pasis malrapide kaj penige. La kuracistoj donis esperon, ke post la operacio venos pliboniĝo kaj ke kemio-terapio helpos. Ŝi restis sen siaj belegaj hararoj, maldikiĝis nerekoneble. Post ĉiu seanco, tiel dolora, ŝi ne havis fortojn eĉ ĝoji. Pasis du jaroj en atendado de la malklara morgaŭa tago. Lia negoco malprogresis. La ŝparita mono finiĝis. Ljudi komencis ludi en restoracio por helpi la familion, sed ne ĉesis la studadon. La komisiono de lia patrino, ke li devas fini la universitaton, li ne forgesis. La jaroj pasis inter stabiliĝo kaj kemio-terapio. Sed la fatala fino estis neevitebla.

Li ne iris al la tombo. Ne volis tiun memoron pri lia patrino akompani liajn estontajn tagojn. Li volis memori ŝin bela, rideta, amema, ludanta sian ŝatatan sonaton de Chopen.



La salono estis plenplena. La bruo de la enirantaj vizitantoj kaj okupantaj siajn lokojn, iom post iom silentiĝis. La lumo estingiĝis, nur la sceno restis malmulte lumigita. La streĉo plialtiĝis. Kvazaŭ ie malproksime oni aŭdis la unuajn tonojn de la Chopena sonato. La pianisto, klininta kapon al la piano, kun amo kaj tristeco tuŝetis la klavojn, kiuj disĵetante la tonojn, brakumis la salonon kaj tenere tuŝis la aŭskultantojn per la supernobla melodio, elfluinta el la instrumento. Je la unua vico, maldekstre, griziĝinta kaj dorskurbiĝinteta de la jaroj kaj la tristeco, sidis viro kun sep ruĝaj rozoj en la mano..... ♦

Petrelo kaj Aglo

Laŭ la ĉinesko Caisangzi

Li Weilun

Ŝtormas, muĝas marondoj.

Brilas stelo
en malhelo.

Ho, ĝi estas petrelo!

Aglo ŝvebas tra nuboj.

Ĉu kaĝbela

ĝia celo?


Al ĝi plaĉas ĉielo.



Li Weilun, naskiĝis en 1936. En 1959 li diplomiĝis ĉe la rusa fakofakultato de la Pekina Universitato pri Fremdaj Lingvoj. Poste li laboris en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato ĝis sia emeritiĝo. Li longe okupiĝis pri instruado de la rusa, la hispana kaj la esperanta lingvoj. Li estas aŭtoro de la verkoj “Rapida Kurso de la Hispana Lingvo”, “Legolibro de Esperanto”, “Moderna Esperanto”, kaj “Moderna Infana Esperanto”.

Ĉio malhelas, amo

Angel Arquillos Lopez



Post via foresto,
Ĉio malhelas
Ĉe la pordo de l' silento,
Kie
Grandaj flamoj lumas
Kun varma mistero,
Kaj mi, amo, tre solas
Sen animo, sen espero,
Kun mia korpo brulanta
Ĉirkaŭata de malhelo.
Ĉio malhelas, amo.
Ne senesperigu, kara,
Ĉar vi havas la ŝlosilon
Mi englutis la lunlumon
Por lumigi miajn noktojn,
Kiam forestas la suno.



Angel Arquillos Lopez estas hispana esperantisto kaj poeto. Li loĝas en Málaga.

Dua viro

Helga Plötner



1960/1961 en la deka lernojaro Helga havis i.a. la fakon "Instrutago en la produktado" en la firmao VEB (Popolproprieta entrepreno) ZW Centrala Reparaturojo en la urbo Gräfenhai-nichen. Helga lernis fajli kaj tranĉi metalon kaj labori apud la tornilo.

En la naŭa lernojaro la lernantoj estis en porkejo kaj en bovejo. Ili lernis melki permane la bovinojn. Tiu instrutago estis ĉiam valora kaj interesa.

Apud la tornilo staris juna bela viro kun ondumitaj malhelaj haroj en sia dua lernojaro. Li instruis al Helga torni florvazon el latuno. Ili amikiĝis kaj renkontiĝis somere ĉe la lago, kiu nomiĝas "Barbara". Pri tiu renkontiĝo en amrilato Helga verkis grafikaĵon pli malfrue. Li helpis al Helga prepari sin por la ekzamenoj en la deka klaso, kiun ŝi absolvis tre bone.

Li venis hejmen al la gepatroj kun bukedo da ruĝaj rozoj por gratuli al Helga kaj li petis la gepatrojn pro permeso por iri danci.

Ĉar la blankaj novaj ŝuoj premis post longa dancado, Helga hejmeniris kun nudaj piedoj. Li donis al ŝi siajn tro grandajn ŝuojn kaj li provis porti ŝin, kio ne sukcesis tre longedaŭre.

Ili ŝatis foti kaj pentri. Helga kreadis belegan fotoalbumon, kiu ekzistas ĝis nun. Per sia motorciklo ili veturis al Dreseno kaj vizitis la galerion de MALNOVAJ MAJSTROJ en fama ZWINGER (CVINGER) kaj ili fotis permesite.



En florkampo li petis kaj faris "Sangofratecon" kun granda tranĉilo. Helga timis, ke ŝi ne volis tion. Li vere suĉis sangon el la vundita brako de Helga. Kaj ŝi devis leki lian sangon el lia vundita brako. Ŝi ne vere bonfartis. Li donis al la 17-jara Helga sen ties volo oran ringon al ŝia maldekstra fingro kiel fianĉino, kontraŭ ŝia volo, ŝi silentis, ŝi timis lian laŭtan ĉagrenon.

Ofte li estis ĵaluza sen iu kaŭzo. Li premis ŝian belan frizuron, por ke aliaj viroj ne taksu ŝin bela. Li ŝajnis esti freneza. Post tro bruaj diskutoj Helga postulis la finon de tiu amikeco kaj redonis la ringon. Li biciklis 5 km hejmen kaj revenis kun fiodoro el la buŝo. Li trinkis hejme "WOFASEPT", kiu estas veneno por forigi fiherbojn. Li deziris morti en la brakoj de Helga! En tiu tempo 1962/1963 la gepatroj de Helga ne havis telefonon, por ke ili povus voki kuraciston. Helga diris kuraĝe: "Malfermu la buŝon!" kaj ŝi metis la fingrojn en lian buŝon ĝis la kolo, por ke li redonu tiun fiodoran venenon! Laŭ kria ordono de Helga ili veturis rapidege al la polikliniko al kuracisto. Tiu prenis lin en la banejon kaj lavis lian stomakon multfoje per akvo. Helga aŭskultis liajn plendojn kaj eĉ kriojn!!! La kuracisto redonis la amikon kaj diris: "Vi gardu pli bone vian amikon!!!"

Surstrate li surgenuiĝis kaj petegis: "VI ESTU NEPRE MIA EDZINO!" Tion Helga ne volis, ŝi ne povis promesi tion! Sed ŝi silentis pro timo!

Pro sekvaj ĉagrenoj post semajnoj ŝi petis lastfoje la finon!

Kaj ŝi timis vidi lin en la urbo aŭ eĉ en la buso! Ŝi iris alian vojon pro timo.

3 monatojn post la fino de ilia amikeco, ŝia amikino Marlis proponis paskan dancadon en la Popoldomo. En tiu dancejo Helga konatiĝis kun sia 3-a viro, la estonta edzo R.P.

Li petis Helga por danci kune. Ili dancis bone en harmonio. Li akompanis Helga hejmen. Ŝi rakontis pri sia timo kaj ke ŝi ludas mandolinon kun la patro. Li ankaŭ lernis ludi mandolinon en sia hejmurbo Altenburgo. La patro de Helga tre ĝojis pri tiu novaĵo kaj petis inviton por ludi kune. La patro ludis la unuan voĉon, Helga la duan kaj la nova amiko ludis la mandolon. Sonis bone.

Ili renkontiĝis denove por danci la duan Paskotagon 1965. Sed ŝi iris kuraĝe hejmen sole.



Apud la arboj de la antaŭurba lageto kaŝis sin tiu freneza 2-a viro. Helga timante iris sur la larĝa strato. Subite li saltis al ŝi kun granda tranĉilo kaj volis mortigi la iaman amatinon Helga.

Venis hazarde najbara paro, la viro defendis Helga, li vidis tiun tranĉilon! Li kriis: "Lasu iri Helga!" Li liberigis ŝin! Helga liberiĝis perforte kaj kuris rapidege por savi sian vivon! Ŝia pulmo doloris pro la spirado de la freŝa aero dumnokte! En la dua etaĝo en sia ĉambreto ŝi timis, ke li grimpos tra la tre malgranda fenestro. Ŝi vere timis! Ŝia koro bategis.

Post monatoj ŝi aŭdis, ke li edziĝis al iama tre trankvila amikino S. el ŝia iama klaso. Ili havis poste belan filinon.

Post jardekoj Helga kaj li renkontiĝis hazarde en la urba parko. Ĝoje li gratulis al Helga al sia naskiĝtago dum januaro kaj donis al ŝi sian premion de sia laboro, eĉ 100 markojn de GDR (Germana Demokratia Respubliko).



Ridetante li diris: "Ne diru tion al mia edzino! Ŝi nenion scias pri tiu premio. Kaj vi estis vere la plej bona!" Helga ridetis kaj komprenis tiun laŭdon! Tiu laŭdo penetris ŝin kvazaŭ butero!

Ŝi aŭdis de geamikoj, ke li kun sia edzino ankaŭ havis bruajn diskutojn en la koridoro kaj ĉagrenojn nur pro la lavtuko ĉe la pordo. Ĉagrenojn kaj dramojn pro nenio neniŭ bezonas en la vivo!

Maljuna Helga renkontis lin hazarde antaŭ la apoteko. Li rakontis, ke li havis operacion pro kancero en la prostato.

Tiu operacio sukcesis, li bonfartis kaj li esperis bonan sanan vivon.

Post semajnoj Helga legis en la Mezgermana Gazeto anoncon kun lia nomo kaj datoj. Li mortis.

Helga malgajis. Al ŝi restas bonaj romantikaj memoroj kun kisoj en komenco, neniŭ sekso pro timo kaj malpermeso de la kuracisto pro la malforteco de ofte malsana Helga kaj sekvis poste dramatikaj teruraj memoroj.

Kelkfoje Helga rigardas tiun valoran fotoalbumon kun fotoj, skribaĵoj, ornamaĵoj kaj pentraĵoj.

Estis parto de ŝia vivo en sia junaĝo dum 4 jaroj. ◆

Anasetoj

Helga Plötner



Ĉiuj miaj anasetoj
naĝas sur la lago
naĝas sur la lago
kapetojn en la akvon
vostetojn alten!

Estas germana infankanto:

Alle meine Entchen

schwimmen auf dem See

schwimmen auf dem See

Köpfchen in das Wasser

Schwänzchen in die Höh'!



[HTTPS://YANPETRO-KAVLAN.FR/](https://yanpetro-kavlan.fr/) POR→ HORI-ZONTO@R.WATER.SANNET.NE.JP

Pentris Jasuo!

HORI Jasuo






aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (6)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 004*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 9

Ĉu estas vi? Mi havas grandan novaĵon! Hodiaŭ mia filo saltis al mia koro!
Estas kvazaŭ li parolis.

Mi preparis liajn malgrandajn vestaĵojn. La kostumoj estis kompletaj, eĉ kun la eta, ora Budho kudrita al la satena ĉapelo. Kiam ĉiuj vestaĵoj estis finitaj kaj perfektaj, mi aĉetis santalan keston, kiu parfumos la enmetitajn vestaĵojn tiel ke ili bonodorigos la karnon de mia filo. Nun mi ne plu havas farenaĵojn, kvankam la rizo estas ankoraŭ jade verda en la kampoj, kaj mi devas atendi dum tri pliaj luncikloj. Mi sidas kaj sonĝas pri kiel li aspektos.

Ho eta malhela diino! Rapidigu la tagojn, mi petas vin, ĝis mia ora bebo estas en miaj brakoj!

Almenaŭ dum unu tago li estos tute mia. Mi ne pensos pri kio okazos poste, ĉar la gepatroj de mia edzo sendis al ni leteron dirante ke la infano devas reveni al sia prapatra domo. Li estas la ununura nepo, kaj lia vivo estas tro kara por esti for de la vido de liaj geavoj tage kaj nokte. Jam ili ne ĉesas ame pensi pri li. La patro de mia edzo, kiu neniam alparolis min eĉ per unu vorto, venigis min antaŭnelonge, kaj parolis al mi, kaj mi povis konstati, ke al lia maljuna menso estis kvazaŭ lia nepo jam naskiĝis.

Ho, mi sopiras gardi lin ekskluzive al ni! Mi ne plu kontraŭas tiun etan fremdan domon kaj la strangan vivmanieron, se ni povus gardi nian filon ĉi tie...vivi kune nur triope. Sed mi konas la ĝustajn tradiciojn de nia popolo. Mi ne rajtas supozi, ke mi havos liberan disponon pri mia unuenaskito; li apartenas al la tuta familio.

Mia edzo estas plej malfeliĉa pri la afero. Li sulkigas la frunton kaj grumblas, ke la infano estos ruinigita de malsaĝaj sklavinoj, kaj pro tronutrado kaj noca lukso. Li paŝas tien kaj reen, kaj unufoje eĉ afliktiĝis je la penso pri la naskota infano. Mi nervoziĝis pro timo ke la dioj koleriĝu pri lia nedankemo, kaj mi petis lin silenti.

“Ni devas elteni tion, kio estas la ĝusta kutimo”, mi diris al li, kun maltrankvila koro pro mia deziro gardi la infanon.

Sed nun li refoje silentiĝis kaj fariĝis gravmiena. Li ne plu parolas pri siaj gepatroj. Mi scivolas kion li estas decidinta, kio kondukas al tia silento. Sed mi mem ne pensas preter la tago kiam la karuleto prezentiĝos antaŭ mi kaj satigos miajn okulojn.

Mi nun scias kion faris mia edzo. Ĉu vi opinias, ke li malpravas, Fratinjo? Ho, mi mem ne scias; mi povas nur fidi ke li justas, ĉar estas li kiu faras tion. Li diris al siaj gepatroj, ke same kiel li postulis ke lia edzino apartenu nur al li, tiel ankaŭ li nun postulas, ke lia filo apartenu nur al siaj propraj gepatroj, nur al ni!

Liaj gepatroj koleriĝis, sed ni eltenis ilian koleron, respondante nenion. Sed mia edzo diris, ke finfine lia maljuna patro rezignis siajn argumentojn kaj cedis al silenta plorado, kaj kiam mi aŭdis tion, ĝi ŝajnis al mi kiel mizera afero, ke filo plorigas sian patron. Se temus pri ia alia afero, krom ĉi tiu, krom pri mia filo, mia koro febliĝus en mia brusto. Sed mia edzo pli kuraĝas ol mi, kaj li eĉ komplete eltenis la ploradon de sia patro.

Ho, kiam ni unue translokiĝis for de lia patra domo mi riproĉis lin pro rompado de la respektataj tradicioj de la pasinteco. Sed nun mi, egoista virino, ne zorgas ke la tradicio estas rompita. Mi pensas nur pri mia filo. Li estos mia, mia! Mi ne estos devigita dividi lin kun dudeko da aliaj personoj: liaj geavoj, liaj onklinoj. Mi, lia patrino rajtos zorgi por li. Mi rajtos lavi lin kaj vesti lin kaj havi lin ĉe mia flanko tage kaj nokte.

Nun mia edzo kompensis min por ĉio. Mi dankas la diojn, ke mi estas edzino de moderna viro. Li donas al mi filon, kiu estas mia propra. Mia tuta vivo ne sufiĉos por repagi mian dankemon.

Ĉiutage mi rigardas la rizon en la kampoj flaviĝi. La spikoj estas nun plenaj kaj pendas pro pezo. Post iom pli da tempo sub tiu langvoriga suno ili dehiskos pro matureco kaj pretos esti rikoltitaj. Estas bona jaro en kiu mia filo naskiĝos, aŭ riĉrikolta jaro kiel diras la terkulturistoj.

Kiom pli da tagoj de revada atendado? Mi ĉesis cerbumi pri la demando, ĉu mia edzo amas min. Kiam mi estos naskinta mian filon, mia edzo konos mian koron, kaj mi lian.

Fratinjo, Fratinjo! Li estas ĉi tie; jen mia filo! Finfine li kuŝas en mia brako, kaj lia hararo estas nigra kiel ebono!

Rigardu lin; neblas ke tia beleco estis iam kreita antaŭ li. Liaj brakoj estas grasetaj kaj kavoplenaj, kaj liaj kruroj fortaj kiel junaj glanarboj. Mi ame ekzamenis lian tutan korpon. Ĝi estas sana kaj bela kiel la infano de iu dio. Ho, tiu bubo! Li piedbatas kaj krias por mamsuĉi, kaj li manĝis antaŭ apenaŭ unu horo! Lia voĉo estas forta kaj li postulas ĉion.

Ho, sed mia horo estis malfacila, Fratinjo! Mia edzo rigardis min per amplenaj kaj ansiaj okuloj. Mi paŝadis antaŭ la fenestro en mia ĝojo kaj doloro. Ekstere oni tranĉis la maturan grenon kaj metis la garbojn sur la grundon. Kaj la kampo kaj mia korpo produktis bonan frukton.

Mi anhelis pro la akra doloro, sed tuj ekstaziĝis, sciante ke nun mi estis tute viriniĝinta. Tiel mi naskis mian unuenaskitan filon! Aj-ja, sed li estis fortikulo! Ho, kiel li trudis sin tra la pordo de la vivo, kaj kun kia granda krio li elvenis! Mi timis morti pro la doloro kaŭzita de lia senpacienco, kaj poste feliĉigis min lia forto. Jen mia ora virinfano!



Nun mia vivo floris. Ĉu mi rakontu al vi ĉion, tiel ke vi scios kiel kompleta estas mia ĝojo? Kial ne diri ĉion al vi, Fratinjo, kiu ĝis nun vidis mian nudan koron? Do, la situacio estis tiel.

Mi kuŝis febla tamen triumfanta sur mia lito. Mia filo estis apud mi. Mia edzo eniris la ĉambron. Li alproksimiĝis al la lito kaj etendis siajn brakojn. Mia koro saltis. Li deziris la malnovan tradicion de prezentado.

Mi prenis mian filon kaj metis lin en la brakojn de lia patro. Mi prezentis lin per tiuj vortoj:

“Mia kara sinjoro, jen via unuenaskita filo. Prenu lin. Cia edzino donos lin al ci.”

Li rigardis en miajn okulojn. Febligis min la arda lumo de lia rigardo. Li kliniĝis pli proksime al mi. Li parolis:

“Mi redonos lin al ci. Li estas nia.” Lia voĉo estis mallaŭta kaj liaj vortoj falis tra la aero kiel eroj da arĝento. “Mi dividas lin kun ci. Mi estas cia edzo, kiu amas cin.”

Vi ploras, Fratinjo? Ho, jes, mi scias, mi ankaŭ! Kiel alie ni povus elteni tian ĝojon? Vidu mian filon! Li ridas!◆

daŭrigota

En la angla originalo la aŭtorino uzas la arkaikan, intiman “thy, thee”.

Sopiro en profunda aŭtuno

— Sonetfaris *Yi Qiao*



— Longing in mid-autumn 中秋思念 Sehnsucht im Mondfest

Jen la luno plena sur ĉielo,
radiante tra l' vastspaco klare.
En la kort' pleniĝas lunlum-helo,
l' aŭtunmezon festas ni kor-kare.

Rigardante supren al la luno,
levas mi la tason nostalgie.
Kiel ĝoja estis l' amik-kuno,
temp' juneca pompis emocie.

Al konatoj karaj mi sopiras,
kelkaj tamen ne plu en ĉi mondo.
La serena lumo nin inspiras,
en l' Eden' sin trovas reviv-fonto.

Tostu ni pro lunlum-klara paco,
eĥu l' himno tra la vasta spaco!



Kiam ni estos sole

Kiam ni estos sole...

Mi diros tion, kion diri al vi mi ne eblas,

Per rigardaro mi serĉos vin...

Kiam ni estos sole...

Ni en silento nin memoros,

Mi diras vian nomon milfoje,

Atendante, ke vi ankaŭ la mian diros.



Manel Sales

Kiam ni estos sole...

Per miaj manoj mi volas plugi

viajn vortojn kaj dezirojn.

Kiam ni estos sole,

Kiam... Ni... kune...

Tiam ni estos sole...





Jaga (7)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 004*



Aŭtoro: *Maksim Bočkarev*

elrusigis *Sergei Isakov*

Kaj denove niaj tagoj

La teamo de Skor, dum Skor mem estis engaĝita pri geodezio, aranĝis taskon por redukti la laboretoson de teamo de traktoristoj kaj mekanikistoj kiuj komencos helpi al la hakistoj fari la unuajn trahakejojn.

Ĉi tie ili decidis uzi alian taktikon. Smola eniris la ludon.

Kaj dum ni parolas pri Smola kaj Speĥ, ni reiru al niaj tagoj kaj vidu kiel la "teamo" de Skor protektas la arbaron de entrudiĝintoj.

Ni scias kiel Skor mokis geodeziistojn. Nun mi rakontos al vi, kiel liaj subuloj Speĥ, Smola kaj Riĵ "malkuraĝigis la deziron" detrui la arbaron de tiuj, kiuj sekvis la kartografojn. Jes, ni kompreneble parolas pri arbohakistoj.

Kiel vi memoras, la Superaj Spiritoj kategorie malpermesis al Skor kaŭzi ajnan fizikan damaĝon al homoj. Li siavice transdonis tiun ĉi ordonon al siaj subuloj kiel eble plej bone. Ili komprenis ĝin laŭvorte tiel: oni ne povas tuŝi homojn, sed neniu ŝajnis malpermesi timigi kaj surprizi ilin. Ne pli frue dirite ol farite!

Pluraj teamoj de lignohakistoj jam estis tiritaj ĝis la periferio de la arbaro. Geodeziistoj laboris dum neordinare longa tempo pri mapoj kaj markoj, kaj fariĝis neeble atendi ilin. Estis decidite komenci meti preparajn maldensejojn por vojoj.

Du amikoj laboris en la unua brigado, kiu alvenis por detrui la arbaron. Fedor, li laboris en trentraktoro, kaj la ŝoforo de la lignokamiono Merkuro. Jes, jes, vi bone aŭdis, Merkuro. De kie venas tia stranga nomo por ruso? — vi demandas. Jes, estas nenio nekutima ĉi tie, la patro de Merkuro nur tre ŝatis astronomion. Nu, kiel ŝatis? Nur la sola libro, kiun la patro de Merkuro legis en sia vivo, nomiĝis "Spaco por komencantoj". Li trovis ĝin en la malnova vilaĝa biblioteko. Ĉi tiu libro estis la nura kiu postvivis la fajron. Kaj ĝuste tiel ĝi renversis la mondkoncepton de simpla vilaĝano kun simpla rusa nomo

Ivano, tiel ke li nomis sian plej aĝan filon Merkuro Ivanoviĉ. Oni devas diri, ke li ne haltis tie kaj pli ol unufoje surprizis la oficistojn de la civilregistra fako per la nekutimaj nomoj de siaj infanoj. La plej bonŝanca el ĉiuj estis lia plej juna filino Venera Ivanovna, ĉar ĉiuj simple nomis ŝin Vera...

Sed ni revenu al Fedor kaj Merkuro. Ĉar estis ili kiuj iĝis la ĉefaj "viktimoj" de la inventoj de Smola.

Ilia laboro estis samaspeca kaj, oni povus diri, enuiga. Fedor, sur sia glitilo, kolektis trunkojn de tranĉitaj arboj kaj trenis ilin al mezaj tenejoj, kaj Merkuro elprenis ĉion, kion Fedor kolektis. Ĉio estas simpla kaj enuiga. Sed kun la apero de Smola, enuo kiel fenomeno malaperis el iliaj vivoj.

Farante la lastan veturon en la laborskipo, Merkuro kutime prenis sian amikon Fjodor por sidi kun li. Ili prenis la trunkojn al la ĉefa tenejo, kaj poste iris al sia parkejo por ripozi. Kvankam ripozo estas tro forta vorto. Nur lavu sin, manĝu kaj dormu antaŭ nova labortago.

Amikoj memoros ĉi tiun vojaĝon dum la tuta vivo, kaj longe parolos pri ĝi, ornamante ĝin per novaj detaloj tra la jaroj. Sed neniu kredos ilin.

"Uralo" estis ĵetita laŭ la radsulkoj. Merkuro tenis sin ĉe la stirilo. Fedor por ĉio ebla. Veturis silente. La tago montriĝis malfacila por ambaŭ. Subite iu knabino aperis ĝuste sur la vojo antaŭ ili. Merkuro, kiel eble plej rapide, haltigis la ŝarĝitan aŭton. La knabino staris ĉirkaŭ kvar metrojn de la aŭto, ridetis kaj rigardis la amikojn.

"De kie ŝi aperis ĉi tie?!" - kriis Fedor kaj estis la unua, kiu forlasis la kajuton de la ligno-kamiono.

Merkuro elsaltis poste.

"Kiel vi alvenis ĉi tie?" — li vokis amike al la knabino. Kaj li mem scivolis, kiom da centoj da kilometroj estas ĝis la plej proksima loĝata tero konata de li.

Ne estis virinoj en ilia teamo. "Eble dum ni estis en la arbaro, nova brigado alvenis?" — li pensis.

La knabino silentis. Ŝi daŭre rigardis la amikojn kaj ridetis. Fedor decidis alproksimiĝi al la fremdulino, sed li ne sukcesis. Kiom da paŝoj li faris en ŝia direkto, la distanco inter ili ne malpliiĝis. Fedor turnis sin al Uralo kaj lia amiko. Ili estis pli for de li, kio signifas, ke li tamen antaŭeniris. De la flanko de Merkuro ĝi aspektis eĉ pli nekutima. Li vidis ke Fedor marŝas antaŭen al la knabino, sed ŝi ŝajnis flosi for de li. Merkuro eĉ fermis la okulojn kaj frotis ilin per siaj malpuraj pugnoj. Fedor, kvazaŭ laŭ ordono,

faris same. Ili ankaŭ malfermis siajn okulojn samtempe. Ne estis knabino sur la vojo. Tiam ili samtempe diris: "Ne eblas ja...!" Provoj trovi spurojn de la fremdulino ankaŭ ne alportis rezultojn. Estis kvazaŭ ŝi neniam ekzistus.

La kamaradoj estis en stato de kompleta miskompreno. Kaj, kompreneble, ili eĉ ne povis imagi, ke la pli aĝa spirito de la arbaro, Skor, observas ilin el la profundo de la arbaro. Li rigardas kaj frotas la manojn kontente. Skor estis kontenta pri la komenco de la prezentado. Li staris, rigardis la laboron de sia vartatino kaj kun sopiro subite rememoris tiujn tempojn, kiam oni povis dispel homojn por cent jaroj per nur unu sovaĝa muĝado aŭ apero en formo de unu el la monstroj el pasintaj tempoj kaj epokoj. Sed malsama aliro estis bezonata al homo difektita de civilizo. Ĉar nur per la mistero kaj nenormaleco de la fenomenoj oni povis nun haltigi ilin.

"Ne eblas ja...!" - ripetis Fedor kaj turniĝis al sia amiko.

"Vi ja vidis ŝin?" - li faris stultan demandon.

"Nu, jes! Vidis!" - respondis Merkuro, kaj por la okazo, li denove frotis la okulojn.

Fedor estis tie, Ural estis tie, sed la fremdulino ne estis.

Ne dirinte eĉ unu vorton, la amikoj ekkuris laŭ flankoj de la vojo, esperante vidi la knabinon, kiu staris ĝuste antaŭ ili sur la vojo kelkajn sekundojn pli frue. Kompreneble, ili trovis neniun kaj revenis al la idlanta, fumanta lignokamiono.

Veturis kelkan tempon silente, kvazaŭ digestante tion, kio okazis. Kaj tiam ili ŝajnis krevi! Interrompante unu la alian, ili rerakontis sian version de kion ili vidis dek fojojn. Fedor precipe emfazis. Ja estis nome li, kiu kuraĝis fari la unuajn paŝojn al la fremdulino.

Atinginte sian kampadejon, ili detale priskribis la nekutiman fenomenon de apero de la fremdulino. Kaj se Merkuro rakontis ĉion, kiel ĝi okazis, tiam Fedor ne ŝparis kolorojn. Kaj rerakontante la rakonton al tiuj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis ĝin, en la sekva rakonto li preskaŭ kaptis la misteran fremdulinon, kaj ŝi laŭvorte mirakle eskapis el liaj potencaj manoj. Pro tio verŝajne neniu sufiĉe atentis ilian rakonton. Oni ridis, forĝesis kaj enlitiĝis.

Sed la amikoj ne havis dormemon. Ili lastaj iris al la vagono. Antaŭ tio, ni sidis apud la fajro kaj rememoris, rememoris, rememoris...

Tiun nokton ili havis sonĝojn. Absolute la samaj por ambaŭ. Ili sonĝis pri fremdulino, kiun ili renkontis la antaŭan tagon. Ŝi aspektis ekzakte same kiel kiam ili renkontis, nur ŝi havis kronon de belaj lekantoj sur la kapo. "Mi

atendos vin morgaŭ en la sama loko. Nur iru iom pli dekstren en la arbaron. Kaj mi estos tie!" — parolis la fremdulino per sorĉa voĉo.



Interese estas, ke nek unu nek la alia parolis pri sia revo. Kiel kutime, farante la lastan veturon, Merkuro prenis Fedor'on, kaj ili veturis laŭ la kutima vojo. Nur hodiaŭ Merkuro veturis multe pli malrapide ol kutime. Kaj li kaj Fedor rigardis ĉirkaŭe kaj antaŭen per ĉiuj okuloj, kvazaŭ atendente aperon de fremdulino. Merkuro haltigis ligno-kamionon ĉe la loko de la hieraŭa okazaĵo. Ambaŭ kamaradoj eliris el la aŭto kaj, sen diri eĉ vorton, marŝis dekstren de la vojo. Ambaŭ ankoraŭ silentis pri la sonĝo. Simple iris en la densejon de la arbaro.

Post kelkcent paŝoj ili eniris maldensejon. Kompreneble, ili ne ekvidis la knabinon. Meze de la maldensejo kreskis malgranda arbeto. Kaj sur ĉi tiu arbetaĵo pendis florkrono, ekzakte la sama kiel ili sonĝis sur la kapo de la fremdulino. Kaj la knaboj denove, sen diri eĉ vorton, diris sinkrone: "Kiel en sonĝo!" Ili marŝis al la aŭto en silento. Ili denove eksplodis en la kajuto. Ili, ne atentante unu la alian, rakontis sian sonĝon. Kaj ambaŭ, kaj precipe Fedor, antaŭĝojis renkonti la brigadon. Hieraŭ neniu kredis ilin. Hodiaŭ ili povas prezenti pruvon en formo de florkrono el arbaraj lekantoj, kiujn Fedor flaris la tutan vojon.

La vespero en la parkejo denove estis pli amuza ol iam ajn. "Ĉi tiuj du klaŭnoj," jen kiel kolegoj komencis nomi Fedor-on kaj Merkuron. La viroj ridis ĝis larmoj. Jen kion vi bezonas por kovri viajn inventojn, lernu kiel triki

florkronojn! Kaj la skipestro diris laŭvorte jenon: "Ĉar vi havas tempon por teksti tiajn luksajn florkronojn, faru vi, Merkuro, morgaŭ ankoraŭ unu veturon!" Ne gravas kion fari, vi ricevos pli da mono, kaj vi havos malpli da tempo por zorgi pri malsaĝeco!"

La skipestro ne sciis, ke baldaŭ ili ĉiuj fariĝos partoprenantoj en eventoj, kiujn la loka gazetaro nomos nenormalaj. Kaj en la centra ili tute ne publikigos ĝin, ĉar ne kutimas ĉe ni eksciti homojn per aferoj nekompreneblaj por la menso.

La sekvan tagon, aŭ pli ĝuste vesperon, Merkuro, plenuminte la taskon de la skipestro, faris ankoraŭ unu veturon, do li kaj Fedor revenis en la mallumo. Antaŭ konata loko, Merkuro lasis la gaspedalon, kaj la aŭto moviĝis preskaŭ idlante. La amikoj denove ĉirkaŭrigardis, kaj fine ili vidis ŝin. Ŝi promenis ĉe la dekstra flanko de la vojo sur la vojrandoj. Sur ŝia kapo estis florkrono de arbaraj lekantoj. La knabino marŝis kaj ne rigardis malantaŭen, malgraŭ tio, ke de malantaŭe, tuj malantaŭ ŝi, grumblis la motoro de grandega lignokamiono. Tiel ili moviĝis. Ŝi marŝis, ili veturis. Estis kvazaŭ ĝi tute ne estus arbaro, sed riverdigo en iu granda urbo.

Subite ŝi haltis kaj akre turniĝis. Ŝia bela vizaĝo estis distordita pro kolero. La knaboj sentis maltrankvilon, milde parolante. Hodia neniuj elsaltis el la kajuto. Merkuro simple akre bremsis kaj subkonscie ne forigis sian maldekstran piedon de la premita kluĉilo. Ĉio okazis multe pli rapide ol mi priskribas al vi! Post kiam la aŭto haltis, la knabino akre levis sian dekstran manon kaj montris al la remorko de la lignokamiono per sia montr fingro. Sed ne ĉi tio plej multe timigis ŝiajn amikojn, sed la maniero, kiel ŝi parolis. Estis sento, ke ŝi parolas per megafono, kiu estis agordita al maksimuma volumo, krome kun eĥa efiko: "Vi ĉiam transportis mortajn arbojn, sed hodiaŭ vi jam prenis vivantajn?!" La eĥo ripetis ŝiajn vortojn kelkfoje. La timpanoj zumis kvazaŭ pro ultrasono. La uloj komprenis nenion. Timo glaciigis ĉiun muskolan en ilia korpo.

La miraklo denove okazis. La knabino malaperis, same kiel antaŭhieraŭ. Malaperis subite. Merkuro kaj Fedja palpebrumis sinkrone. Kaj nun ŝi forestas. Merkuro ĵetis la kluĉilon kaj premis sur la gason. Estante proksima al afekcio, li ne sentis, ke lia multtona koloso fariĝis rimarkeble pli malpeza. Fedja frostiĝis. La fingroartikoj de lia dekstra mano fariĝis blankaj, kun tia forto li kaptis la pasaĝeran tenilon sur la panelo. Uralo preskaŭ flugis laŭ la sulko. Merkuro kondukis la aŭton, enirante "aŭtomatpilotan reĝimon".

Nek unu nek la alia memoris, kiel ili okazis ĉe la elŝutejo. Ili estis rekonsciigitaj de la gruolaboristo, kiu kriegis ion obscene. La amikoj eliris el la aŭto kaj komencis rekonsciigi, sed ne longe. Kiam ili vidis kio estis en la remorko de la arbokamiono, ili denove falis en stuporon. Anstataŭ la kutimaj trunkoj, estis pluraj arbotrunkoj kun preskaŭ sendifektaj branĉoj sur la

remorko. Kiel ili ne disfalis dum sia altrapida kuro tra la arbaro estis neklara. Jam estis mistikismo. La gruolaboristo kaj la hokokablisto ne pensis pri mistikismo. Ili vidis la bildon multe pli simpla. Laŭ ilia kompreno, kaj tiu kiu ŝarĝis la lignokamionon kaj tiu kiu stiris ĝin estis plej verŝajne ebriaj, malgraŭ la plej strikta malpermesleĝo en ilia teamo. Ja ĉiuj juĝas aliajn laŭ sia vizio pri la mondo kaj edukado.

Ĝenerale, la bruo leviĝis kolosa. Ĉiuj ĉeestantoj laboris pri arbohakado dum jaroj, sed neniuj povis memori ion tian. La skipestro, vokita per radio, alkuris kaj komencis brui. Ekkomprenante, ke li atingos nenion de Fedor kaj Merkuro, li komencis serĉi la kulpulojn dum ŝarĝado en la arbaro. La traktoristoj ĵuris, ke ili ne povas fari tion. La brigadisto mem komprenis, ke ili ne povas, sed la fakto restas fakto. Li igis absolute ĉiujn, kiuj iel okupiĝis pri ŝarĝado de ĉi tiu ligno-kamiono "spiri". Kaj, nature, ĉiuj montriĝis sobraj.

La rakonto de la fatala paro aldonis al la konfuzo. Sen ŝpari epitetojn, amikoj konkurantaj inter si, la dudekajn aŭ eĉ pliajn fojojn, parolis pri la renkontiĝo en la arbaro. Unu el la malnovuloj de la brigado provis enmeti sian propran version pri la Leŝij kaj aliaj "malicspirtitoj". Sed la skipestro, estante konvinkita ateisto kaj materiisto, ne permesis tiajn tendencojn en sia teamo.

La esploro pri la okazaĵo pasis noktomezon. Kaj ju pli ili provis eltrovi ĝin, des pli ili konfuziĝis. La skipestro estis plej kolera ke du sanaj viroj enscenigis rektan sabotadon, kategorie rifuzante iri labori morgaŭ. Nek minacoj de maldungo nek eĉ fizika perforto helpis. Fedja kaj Merkuro unuvoĉe deklaris ke ili ne eliros en la arbaron, eĉ se ili estus pafitaj surloke.

Mi devas diri, ke la tuta teamo perdis la humoron labori. Neniuj enlitiĝis. Ĉiuj sidis ekstere. Iuj ekbruligis fajrojn, iuj sidis sub la kuireja baldakeno. La brigadisto, kiu havis neŝanceblan aŭtoritaton, nenion povis fari. Kaj, fine, ankaŭ li sidiĝis ĉe la fajro kaj eksilentis.

Tiel la dua parto de la planoj de Skor kaj liaj pagendaĵoj estis plenumita. La tria parto de la "Merlezon baleto" estis por Speĥ kaj Riĥ. Ili "laboris" sur alia "ejo" paralele kun Smola. Kaj mi devas diri, ke ili laboris kun multe pli da pasio ol Skor kaj Smola. Ĝenerale, dank' al ili, matene elspiris trankvile la skipestro de la brigado jam konata de ni, kiam li ricevis per la radio ordonon ĉesi la laboron kaj haste foriri.

Dum la konataj Merkuro kaj Fedor estis viktimoj de la ŝercoj de Smola, eĉ pli nekutimaj aferoj okazis en la najbara areo dum ĉi tiuj tri tagoj kaj noktoj.

En la tago, kiam Merkuro kaj Fedor havis la honoron vidi Smola por la unua fojo, okazaĵoj en la najbara areo disvolviĝis multe pli dinamike. Kiel mi diris antaŭe, Speĥ malamis homojn. Post ĉio, li estis la spirito de la arbaro, kiu

respondecas pri la arboj. Mi pensas, ke ne necesas klarigi pli pri la kialoj de lia "malŝato" al la homa raso. Memorante la striktan ordon de Skor, ke estas neeble vundi aŭ kripligi homojn sub ajnaj cirkonstancoj, Riĵ kaj Speĥ decidis agi laŭ plurnivela programo.

La unua tago komenciĝis por la malfeliĉaj arbohakistoj kun konatiĝo kun sovaĝaj arbaraj abeloj. Estis kvazaŭ abeloj estas ĉie. Post kiam iu segita arbo falis, tuta svarmo da malgrandaj arbaraj gardistoj leviĝis. Absolute ĉiuj laboristoj revenis al la parkejo ŝvelintaj pro mordoj. Neniu enlitiĝis ĝis malfrua nokto. Kaj kiam la tempo pasis noktomezon, la amuzo komenciĝis. La parto de la arbaro situanta al la rikolto subite ekbrilis per bluverda lumo. La arboj estis lumigitaj unu post la alia, kaj ĉi tiu brilo iris pli kaj pli en la arbaron.

Homoj forgesis pri siaj ŝvelintaj oreloj, nazoj kaj aliaj membroj. Ĉiuj staris kaj rigardis, ravite de tiu ĉi eksterordinara miraklo de la naturo. Neniu povis dormi tiun nokton. La tago ripetiĝis kun absoluta precizeco de la antaŭa. Ĉiu dehakita arbo vekis novan svarmon da abeloj. Estis neelteneble labori en tiaj kondiĉoj. Lumigi fumantojn ne nur ne helpis, sed, kontraŭe al komuna saĝo, nur pligravigis la situacion. La fumo ŝajnis allogi nur novajn svarmojn de abeloj.

Vespere ĉiuj sidis kaj rigardis al la hieraŭa lumspektaklo. Kaj ĝi komenciĝis kiel filmsesio, strikte laŭplane. Nur aldone al la lumaj efikoj estis aldonitaj sonefektoj. Tuj post kiam komenciĝis la bluverda brilo, aŭdiĝis longa, sangkazeganta hurlado de lupoj. Tiam al ĝi aliĝis alia kaj alia. Kaj jam ŝajnis, ke grandega grego hurlas. La fajroj en la tendaro de lignohakistoj brulis tre hele tiun nokton ĝis tagiĝo.

Nu, matene komenciĝis la antaŭvidebla sabotado. Ekzistis nur tri pafiloj por la tuta enorma brigado. La skipestro devis kontakti la "kontinenton" kaj, se eble, klarigi la situacion. Nature, neniu ĉe la alia fino de la linio kredis tion, kion ili aŭdis. La tago por la teamestro pasis en senfinaj klarigoj kaj intertraktadoj kun pli altaj aŭtoritatoj. Homoj, elĉerpitaj pro du sendormaj noktoj, fordormis. La tria nokto estis ekzakta kopio de la dua. Kaj kun la unuaj sunradioj la brigado komencis "levi ankron". La skipestro ne plu devis pruvi ion ajn al iu ajn. Ili ĵus foriris.

En la sama tago, brikokolora helikoptero flugis al la scenejo. Eliris homoj en civilaj vestoj. Ili intervjuis, kiel ili diras, atestantojn kaj ordonis ĉesigi ĉian laboron en ĉi tiu areo kaj eĉ lasi ĉiujn ekipaĵojn, kiuj restis profunde en la arbaro. Kiel oni diras, ĝis nova avizo. Ili prenis nediskonan interkonsenton de ĉiuj kaj forflugis.

Skor kaj liaj subuloj plenumis sian taskon. ◆

daŭrigota

Ho, mia apendicito

Yin Jiixin



Je la 2a horo matene la 25-an de septembro 2025, mi vekiĝis pro kramfoj en la dekstra abdomeno. Mi supozis, ke temas pri stomaka ŝvelo, do mi ekmasaĝis min mem. Sed tio ne efikis, kaj la doloro pli kaj pli intensiĝis. Mi eksuspektis, ke temas pri apendicito. Ĉi tiu afero ne povas prokrastiĝi, tial mi rapide leviĝis kaj stiris la aŭton al la Popola Hospitalo. La kuracisto farigis por mi abdomenan CT-skanon, kiu konfirmis ke mi suferas de akuta apendicito. Li diris, ke mi devos ricevi miniincizan kirurgion de la apendico-forigo kaj resaniĝos post ĉirkaŭ semajno.

Veninte al la kirurgia sekcio de hepato kaj galo, mi estis akceptita de juna kuracisto. Tiu unue demandis, ĉu mi havas emeritan salajron, ĉu mi ĝuas medicinan asekuron, kiom da infanoj mi havas, kaj kia estas ilia financa stato. Mi sentis min ŝajne restanta en policejo kaj pridemandata de policano. Poste li informiĝis pri miaj lastatempaj dieto kaj medikamenta uzado. Mi diris, ke mi ĉiutage prenas pilolojn por malaltigi sangosukeron kaj sangopremon, kaj li diris, ke tiuj estas en ordo, kaj mi povas daŭrigi ilin normale.

Respondinte liajn demandojn, mi komencis ricevi diversajn ekzamenojn inkluzive de denova abdomena CT-skano ĝis la tagiĝo. Oni aranĝis min en la dudek-duan liton. Post kiam mi kuŝiĝis, flegistino alportis kelkajn pilolojn kaj diris, ke mi prenu ilin. Mi obeeme prenis ilin. Poste, alia flegistino donis al mi pugan injekton, ventran injekton kaj faris perfuzojn. Tri fojojn sinsekve oni mezuris mian sangosukeron kaj sangopremon. Mi estis tre laca, do mi endormiĝis frue vespere.

Noktomeze mi vekiĝis por pisi, kaj subite falis ĉe la lito. Mi sentis teruran naŭzon kaj vomemon, kun ŝvito-gutoj tiel grandaj kiel pizo fluantaj de mia tuta kapo. Tujtuj mi premis la voksonorilon por alvoki flegistinon. Ŝi ne sciis kial mi tiel fartis, sed nur injektis al mi anti-voman medikamenton, kio iom mildigis mian naŭzan senŝon.

Post la tagiĝo, la flegistino denove alportis pilolojn. Mi demandis ŝin, kiaj medikamentoj ili estas. Ŝi respondis, ke ili estas piloloj por malaltigi sangosukeron kaj sangopremon. Tiam mi komprenis, ke la subitaj simptomoj de la antaŭa nokto verŝajne okazis ĉar mi prenis la samajn pilolojn dufoje. Ho, ve! Mi preskaŭ perdis la vivon pro apendicito.

Antaŭ la tagmezo, la juna kuracisto venis al mia lito kaj diris, ke laŭ la CT-skano, mi ŝajne havas kolecistiton pro galŝtono. Li menciis, ke dum la forigo de mia apendico, ili povos samtempe pritrakti la galŝtonon. Mi respondis, ke mi pripensos la aferon. Mi tuj konsultiĝis kun esperantisto-amiko, kiu estas sperta kuracisto pri tradicia ĉina medicino. Li klarigis, ke la tiel nomata galŝtono fakte ne estas verkalkaĵo, sed nur malmola tubereto el graso kaj kolesterolo, kiu ne bezonas kirurgian traktadon. Medikamentoj povas likvigi la tubereton. Mi ankaŭ konsultiĝis kun aliaj kuracistoj-konatoj, kiuj same diris, ke kolecistito ne estas grava malsano kaj krom se mi havas severajn simptomojn, mi ne bezonas kirurgian intervenon.



Posttagmeze, denove venis tiu juna kuracisto. Li diris, ke en la kolora Doplera eĥografio de mia korpo, ili trovis iom da ombro en mia dekstra pulmo, kaj ili planas dum mia apendica operacio plene anestezi min, malfermi mian torakon kaj komplete ekzameni la pulmon. Ho ve! Aŭdinte liajn vortojn, mi tre timiĝis. Mi pensis, ke mi kvazaŭ enirintus la japanan hospitalon de 731 trupo. Ĉu pro apendiceton, mi devas ricevi vivsekcion? Mi scias, ke apendicita operacio ne enspezas multe, do ili volas pliigi aliajn operaciojn. Absurdaĵo!

En la sekva mateno venis grupo da kuracistoj. Ili demandis pri mia decido de kuracado. Mi faris mian decidon: 1, mi venis ĉi tien nur por solvi la apendicion; 2, pri la kolecistito, mi elektos medikamentan kuracadon; 3, pri mia pulmo, post solviĝo de la apendicito mi konsultos kuraciston en la spira sekcio, ĉar *ĉiu fakulo havas sian specialaĵon*.

Ili prove persvadis min per diversaj kialoj, ke mi akceptos pliajn operaciojn. Mi ĉiam firme subtenis mian decidon. Fine, ili nur forigis mian apendicon.

Ho ve! Se kuracisto fariĝus komercisto, do, hospitalo certe fariĝus homobuĉejo kaj monofarejo. ◆

Anonco pri verkokonkurso de la radio IRo

Tjero Johanego



Anonco pri verkokonkurso de la radio IRo. Temas pri kristnaska eta rakonto.

Verku kaj sendu al ni: premio estos diplomo kaj laŭtlegado en nia elsendo!

🎄 Kristnaska konkurso

Amikoj! Baldaŭ venos kristnasko kaj IRo invitas vin tiuokaze verki kristnaskan rakonton kaj sendi al nia granda konkurso. La 4 gajnintoj estos diselsenditaj en niaj 4 adventaj elsendoj kaj ricevos...

La 4 gajnintoj estos diselsenditaj en niaj 4 adventaj elsendoj kaj ricevos diplomon!

Jen la devigaĵoj:

Longo : 5-10 minutoj laŭtlekite

Temo : kristnasko en la mondo (ĉu religirilate aŭ ne)

Formo : ni ŝatus ricevi teatre laŭtlegitajn aferojn kiel MP3-aĵoj (se vi volas vi povas aldoni sonefektojn) sed se vi ĝeniĝas kompreneble eblas sendi nur la tekston kaj ni laŭtlegos, sed tio eble malavantaĝos vin... !

Limdato : dimanĉe la 29a de novembro 2025 (23:59 UTK)

Adreso: bonvolu sendi vian aferon aŭ al tjero.johanego.gmail.com aŭ al @tjerojohanego ĉe Telegramo.

La ĵurio taksos ne nur la lingvan riĉecon(komencantoj, partoprenu!) sed ankaŭ la originalecon. Do ne hezitu partopreni kaj disvastigi la konkurson.

Ni deziras al vi fruktodonan verkadon!

Kaj se vi ne bone konas IRo, ni rekomendas al vi nin tie malkovri kaj pli ofte aŭskulti niajn elsendojn...

Abonu ankaŭ niajn kanalojn ĉe Vacapo (What'sApp) kaj Telegramo por ne manki eĉ unu elsendo !

Vacape: <https://whatsapp.com/channel/0029VbBreHNKLaHuiK3FAW31>

Telegrame : <https://t.me/+GW0YfNJOXiIwYTk0>

Jen por pliaj informoj 🤔

<https://internaciaretradio.wordpress.com/kristnaska-konkurso/>

IRo (<https://internaciaretradio.wordpress.com/kristnaska-konkurso/>) ♦

Profesoro Lju

Ĉielismo



Kiam usona esperantistino Katina Carry anoncis al mi, ke ŝi baldaŭ instruos en Ŝensi Financa-Ekonomia Kolegio, mi tuj memoras malnovan samideanon profesoro Lju instruanta en tiu kolegio. Mi konis lian nomon delonge, kaj ne vidis lian personon, kvankam ni ambaŭ loĝas en la sama urbo Siano. Pri lia kariero de Esperanto mi sciis de veterana esperantisto, ke komence li instruis Esperanto-kurson en la urba poŝtcentro, poste en la Nordokcidenta Universitato de nia provinco. Malgraŭ tio mi nun devas viziti lin por peti lian zorgon al la usona samideanino Katina Carry, kiu baldaŭ instruos en lia kolegio...

Mi kaptis dimanĉon libera por la vizito, ĉar mi laboras ĉiun labortagon en ŝtalfabriko. La dimanĉa tago estis serena, kaj mi vizitis lian oficejon. Li estas mezalta, modesta kaj tre agrabla sinjoro. Sed lia reago mirigis min, kiam li komprenis mian intencon.

"Mi ne posedas Esperanton." diris la profesoro.

"Ĉu vere?" mi rigardis lin suspekta kun miro.

"Jes." respondis la profesoro.

"Kial? Kiel vi instruis Esperanton en la urba poŝtcentro?" mi demandis.

"Jen estas tio," trankvile komencis rakonti la profesoro:

Komence de la fondiĝo de la nova Ĉinio mi diplomiĝis de mezlernejo, kaj vivlaboris en la urba poŝtcentro. Tiam mi estis juna, kaj ankaŭ sopiris al studo en altlernejo. Por tio mi ne forlasis memlernadon de diversaj lecionoj. Iun tagon, kiam mi legas la anglan lingvon, neatentite aperis mezaĝa viro kontraŭ mia legado. Li senvorte rigardis mian mienon kaj okulumis pripensante ion. Mi estis konsternita je lia rigardado. Mi scias, ke li estas nova estro sendita de la komunista registaro. Oni diris, ke antaŭ la fondo de nova Ĉinio li estis kaŝita partiano, kaj iam lernis Esperanton, pri kio mi tute ne konis ĝis lia apero.

"Mi aranĝos al vi novan taskon." ordonis la nova estro.

"Kia tasko? Mi ne havas kulpon. Mi nur lernas fremdan lingvon, kiam ĉiuj ripozas sen laboro." mi volis senkulpiĝi min kun timemo.

"Knabo, ne timu. Mi ŝatas junulon lernema. Mi donas al vi taskon instrui Esperanto-kurson, kiun mi organizos baldaŭ en nia poŝtcentro." decidante ordonis la nova estro, kaj amike ĵetis al mi sian manon: "Saluton!"

"Saluton? Kio ĝi estas?" mi volis scii, demandante al la nova estro.

"Saluton estas "Niho*" milde ridis la nova estro.

"Saluton!" mi voĉoimitis lian prononcon mallaŭte.

"Saluton! Vi jam estas nova esperantisto kaj nia samideano."

"Mi ne scias, kio estas Esperanto." mi hontis je tio.

"Ĉu? Kiun lingvon vi lernas?" demandis la nova estro.

"La anglan mi lernas, sed mi ne posedas..." mi respondis.

"Ne gravas. La angla kaj Esperanto estas similaj. Vi kapablas instrui Esperanton." la nova estro jesdiris elokvente kiel fakulo.

"Permesu al mi konsideron. Mi eĉ ne havas lernolibron de Esperanto." mi hezitis.



"Mi kredas je vi, kaj ordonas al vi ĉi tiun taskon. Jen estas via instrulibro." dirante la nova estro donis al mi unu libreton tre maldika, modesta kaj manpresita per inko kiel propaganda folio.

Kion fari? Mi estas juna, kaj unuafoje renkontas estron je tia stilo simpla, sincera ankaŭ nerifuzebila. Fakte, min kuraĝigas tia stilo esprimita de la revolucia partiano kontraŭ malfacilo. Je tia stato mi petis kelkajn tagojn por koni Esperanton.

Post kelkaj tagoj mi jam povis legi la libreton. Fakte, ĝi estas tre simpla kaj konsistas el la alfabeto kaj iuj sloganoj ekz.: "Esperanto estas revolucia lingvo", "La vivo estas batalo", "Lernu Esperanton por la nova Ĉinio"... krom ĉiutagaj akuzativaĵoj "Saluton!", "Bonan tagon!", "Bonan nokton!" k.t.p. Kia lernolibro! Mi jam ne havis la antaŭan timemon. Ŝajne la nova estro estas ĝusta, ke mi estas kapabla instrui la kurson. Nun mi ankaŭ scias, ke la nova estro nomiĝas LIN Zihen.

Mi iris trankvila al oficejo de la nova estro Lin.

"Saluton!" mi jam staris antaŭ lia ofictablo.

"Saluton!" la nova estro Lin kutime ĵetis al mi sian manon, kaj ĉifoje lia "Saluton!" estas iom intimevoĉa.

"Estimata estro Lin, mi deziras akcepti tiun taskon" mi eldiris decidon sen timo.

"Ne estu estimata estro, sed kamarado Lin" li korektis mian titolvokon, "Tio estas malbona kutimo de la feŭdismo. Voku min kamarado Lin." li klarigis al mi, "Ni ĉiuj estas revoluciaj kamaradoj, kiuj kune konstruas la novan socialisman Ĉinion."

Jes, tio estas nova kaj freŝa al mi, kaj mi senkonscie fariĝis sindonema sekvanto de la estro Lin, eĉ mi volus ĵeti min por tasko iu ajn je lia ordono.

Baldaŭ okazis la kursa ceremonio en nia poŝtcentro. La estro Lin kaj mi staris sur la podio. Li elokventis kaj konvertis ĉiujn ĉeestantojn, ke Esperanto estas revolucia lingvo, kaj lerni Esperanton estas revolucia tasko. Li estas vera oratoro staranta sur la podio, sed mi staris sur la podio kiel fajrpoto, sentante multe akran okulumon de fraŭlinoj, kiuj taksis min kiel eksponaĵon. Poste, kiam mi parolis, mi fariĝis balbutanto. Ĉiuj ĉeestantoj ridis je amuzĝojo.



La ceremonio estis raportita kun bela foto sur la urba ĵurnalo, ankaŭ aperis kiel konciza novaĵo sur la ŝtata gazeto El Popola Ĉinio. Fakte en la nova socio oni interesiĝas pri novaj eĉ kuriozaj aferoj, kaj Esperanto apartenas al tia afero. Poste, dum la kursado kelkfoje min kaj la kurson intervjuis ĵurnaloj kaj revuoj. Tiuj intervjuoj konatigis min kiel novaĵulon tra la urbo. Pri tio estro Lin estis kontenta, ĉar li estas entuziasma esperantisto ĝustadirite Esperanto-propagandisto aŭ Esperanto-salutisto, kion mi konfirmis nur duonjaron post mia lernado de Esperanto.

Jes, post la duonjaro pli kurioza afero trafis min. Mi ricevis neatenditan leteron de fama profesoro Io Chou. Li volis inviti min instrui Esperanton en la Nordokcidenta Universitato en nia urbo! Profesoro Io Chou estas ĝentila kaj sincera, sed mi estis maltrankvila, ĉu mi mezlerneja diplomito povus instrui en universitato? Kvankam nun mi jam estas kuraĝa influite de la revolucia kamarado Lin, tamen mi ankoraŭ ne estas aŭdaca instrui en la universitato. Kompare en la poŝtcentro mi instruis al poŝtistoj kaj oficistoj, kiuj partoprenis mian kurson diversacele ĉu por fresiĝo ĉu por amikiĝo eĉ por flati al la estro Lin, sed en universitato la studentoj certe bezonas lingvoscion, kion mi ne posedas. Kion fari? Mi silentis antaŭ la tento, ne respondante al profesoro Io Chou.

Sekvan tagon la estro Lin alvokis min, kaj demandis: "Ĉu vi ricevis leteron de profesoro Io Chou?"

"Jes, mi ricevis, sed ... " mi ne povis klarigi mian penson.

"Kamarado Lju, mi komprenas vian timon." la estro Lin konsilis, "Vi scias, ke la generalo Linbo fariĝis korpusa estro je sia aĝo dek-oka, kaj en Pekina Universitato kelkaj famaj profesoroj devenis de mezlerintoj kiel vi..."

"Sed tio okazis en revolucia tempo..." mi komentariis.

"Jes. Nuntempe estas la nova Ĉinio kaj nova periodo de la socialisma revolucio pli granda ol ajn tempa" la estro Lin fervore agitis min, "Ni nun konstruas novan socion, kaj ni devas transpasi ĉiujn kutimaĵojn. Vi rajtas instrui en universitato, ankaŭ laboristoj kaj kamparanoj rajtas instrui en la universitato!"

Jen en tia tempo ĉio okazeblas, kaj mi komencis instrui Esperanton en la universitato. Sed sendube mi ne posedis Esperanton, aŭ mi ne havis sufiĉan tempon aŭ paciencon ellerni Esperanton, aŭ tiam ĉiuj estis nestudemaj je utopia lingvo krom iuj novaj ideoj. Mia instruado por Esperanto daŭris nur unu semestron. Sekve alvenis ventego de la rusa lingvo kiel komunisma eduko devigita al ĉiuj studentoj, kaj sekve

ankaŭ okazis politikaj movadoj unu post aliaj. Esperanto hazarde trafis min kaj destine ne konvertis min. Malgraŭ ĉio danke al Esperanto mi saltis de la poŝtcentro en la universitaton. Nun mi estas profesoro de la angla lingvo, kiun mi neniam forlasas de mia lernanteco ĝis nun, kvankam ĝis hodiaŭ mi ne povas libere interparoli angle kun Miss Katina Carry. Sed Esperanton kiel donaĉaĵon mi jam redonis al la estro Lin. Mi ne ŝatas nomi lin kamarado, ĉar mi ne estas partiano. Mi ankaŭ ne sentas min lia samideano, ĉar mi ne posedas Esperanton, aŭ ne deziras posedi Esperanton. Jen tio estas mia rakonto. Mi ne povas helpi vian samideanon Katina Carry.

Mi foriris de profesoro Lju, formale adiaŭinte sen samideaneco inter la esperantistoj. Ekstere, mi sopiris freŝan aeron, kaj mi havis novan lecionon, ke samideanoj ne estas ĉiuj, kiuj lernis Esperanton, kaj en la pionira tempo Esperanto apartenas nur al tiuj kredantoj je la idealo de Esperanto. Mi kapsupren rigardis la serenan ĉielon kun la brila suno, kaj konscias, ke en la mondo ne ekzistas miraklo lerni nepatran lingvon, ĉiuj devas pagi fervoron, sufiĉan tempon kaj longan praktikon por ellerni facilan lingvon Esperanto. Male, eĉ profesoro ankaŭ ne povas posedi la facilan lingvon Esperanto! ♦

*Niho = saluton en la ĉina lingvo

**Memore al samideano LIN Zihen(林志恒) kaj prof. LJU Zihuan(刘志寰), kiuj faris kontribuojn por Esperanto antaŭ ol 70 jarojn en nia urbo Siano, Ĉinio.

Memorkunsido de la Poŝta Laborista Sindikato de Xi'an por la studklaso de Esperanto, okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof



En decembro 1949, ĉe la Poŝta Laborista Sindikato de la urbo Xi'an, oni okazigis memorkunsidon por festi la 90-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof kaj por fondi la Xi'an-an Societon de Esperanto. De maldekstre, la naŭa persono en la dua vico estas S-ro Ju Qifang, la oka Prof. Zhou Guang, la sepa S-ro Zheng Zhuyi, kaj la sesa S-ro Lin Ziheng.

"Ĉielismo" WANG Tianyi (ĉine: 王天义; pinjine: Wáng Tiānyì; naskiĝis la 2-an de oktobro 1957) estas ĉina fama esperantisto, prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF), prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio, kaj prezidanto de Xi'an Da Vinci Importa-Eksporta Ko., Lta, kiu funkcias per Esperanto por sia internacia komerco. En la jaro 1979 li eklernis Esperanton kaj senlace aktivis por la Esperanto-movado.

La Memoro pri Dronado

GONG Xiaofeng



Amaso da homoj alfluis al la kuracejo. Katastrofo! Iu infano dronis en la rivero. Mi, 9-jara, enpuŝiĝis en la homplenan malgrandan internan ĉambron. Sur la kurac-lito kuŝis nuda kadavro, ŝia haŭto faltiĝis kaj aspektis paleta pro longtempa mergiĝo. Ŝi nomiĝis Nuba, 6-jara knabineto, kiu loĝis kun siaj du pli aĝaj gefratoj en la narbara unuo de la sama domo.

Tiutage, la 18-jara fratino eliris al sia amiko kaj lasis la duan fraton prizorgi ŝin, sed kiu atendis, ke ili ne ludu kiel kutime ene de la kortego, sed trakuru la malantaŭan pordon, tie troviĝis rivero. Oni ne sciis pro kio la knabineto falis en la riveron. Kiam la 15-jara frato venigis homojn por savi ŝin, jam estis tro malfrue. Ŝi mortis. La knabo staris ĉe la lito, tenante la maneton de sia fratino, ploregis.

En la ekstera ĉambro la kuracisto-avo ĵus alkroĉis la aŭskultilon, li faris funebran sciigon al la gepatroj, kiuj laboris en alia urbeto. En la bazo por familianoj de laboristoj multaj infanoj vivis aŭ sole, se la pli aĝa frato aŭ fratino estis sufiĉe granda por prizorgi pli junajn gefratojn, aŭ kun geavoj, aŭ nur kun patrino. Estis en someraj ferioj, la lernejo estis fermita, la infanoj estis kiel senbridaj ĉevaloj.

Ĉiuj onkloj kaj avinoj suspiris de bedaŭro. Ankaŭ mi volis suspiri, subite super mia kapo ŝvebis voĉo mencianta eĉ mian nomon, mi levis la okulojn, kiuj renkontiĝis kun la rigardo de Avinjo Han.

"Jen fatalo, Fenjo, Ĉu vi ankoraŭ kuraĝas ludi kun akvo?" Avinjo Han fingromontris mian kapon, turnante sin al aliaj, kaj klarigis, "ankaŭ ŝi preskaŭ dronis en la forlasita kontraŭaerataka fosaĵo lastan monaton."

Mi forte balancis mian kapon, tuj elpuŝiĝis el la kuracejo kaj rapide forkuris. La koro batis forte, sur la vizaĝo fluis ŝvitegoj, ĉu pro la kurado ĉu pro la ektimiĝo post la okazaĵo, mi ne sciis. Sed la pasinta okazaĵo revenis en mia kapo. Ĝis nun mi ankoraŭ bone memoras la akcidenton.

Tiu fosaĵo troviĝis ene de la elementa lernejo, kiu fondiĝis speciale por infanoj de laboristoj kaj oficistoj de la granda konstrua kompanio. Antaŭe ĝin kovris tabuloj, sed oni ne sciis kiam la tabuloj falis en la fosaĵon. Kelkaj eĉ malaperis, tiel ke la fosaĵo ofte estis plena de pluvakvo dum la pluvsezono. Infanoj en la kortego plej ŝatis ludi ĉe ĝi kvazaŭ rivereto, oni prenis longan bambuan stangon, remante ian tableton kiel boaton. La fosaĵo longis je 50 metroj zigzage. Mi kaj Sara kaŭre ludis ĉe la kurbiĝo de la fosaĵo, poste mi volis reveni hejmen, do mi leviĝis, kaj volis trapaŝis la kurbiĝon antaŭ Sara, Sara subite leviĝis kaj puŝis min antaŭen. Puf! Jen mi falis en la fosaĵon, feliĉe la akvo ne estis tiel profunda, pli feliĉe la plej aĝa fratino de Sara, 15-jara, ĝustatempe venis, do ŝi etendis stangon al mi, kaj mi estis savita.



Sara jam estis konsternita pro timo kaj gape staris tie. Ankaŭ mi tremis de timo, cetere, de malvarmo. Kiam mi estis sendita al la hejmo, du vatitaj litkovriloj estis sternitaj sur min, sed mi ankoraŭ sentis min frosta. Mia 16-jara onklineto severe riproĉis min, kiam ŝi revenis hejmen. Se io malbona okazus al mi, kiel ŝi klarigus tion al miaj gepatroj? Riproĉinte, ŝi ploregis.

Ŝi devenis de vilaĝo por prizorgi min kaj mian pliaĝan fraton antaŭ unu jaro. Tiam ŝia patrino, mia avino de la patrino flanko, forpasis pro malsano. Ŝia patro, duonpatro de mia patrino, petis, ke mia patrino kunportu ŝin de vilaĝo al urbo, ĉar li ne volis, ke ŝi suferu en vilaĝo. Li proponis, ke ŝia filino, mia onklineto, povus esti kiel vartistino kaj mastrumistino en nia familio. Mia patrino konsentis kunpreni sian duonfratineton el la vilaĝo, sed persistis, ke ŝi devas reiri al la mezlernejo por daŭrigi sian lernadon. Finfine mia onklineto venis al mia hejmo kaj eniris en la saman mezlernejon kie mia pliaĝa frato lernis. Jaron poste mia patrino portempe ŝanĝis sian laboron kaj iris al la najbara urbeto kune kun mia patro. La onklineto prizorgis nin kaj preparis manĝaĵojn post la lecionhoroj.

Nature, la fosaĵo estis tuj plenigita per tero. Kaj la informo pri mia preskaŭa droniga akcidento ankaŭ atingis miajn gepatrojn. Fine, ili decidis, ke la patrino revenu al la elementa lernejo por prizorgi nin.

Ĝis nun mi ne ellernis naĝi, ĉar mi ne kuraĝis.

Koncerne la malantaŭan pordon, oni poste ŝlosis ĝin. ♦

Cicio Mar, neniam forgesita E-verkisto el Ĉinio

GONG Xiaofeng



En Ĉinio troviĝas ne multe da originalaj E-verkistoj pri romanoj, el ili konataj de okcidentanoj eĉ estas raraj. Sed la noveloj *Je la Jarfino* kaj *Mezjulia festo* eble estas konataj en esperantio, ĉar ili estis kolektitaj en *Trezoro-La Esperanta Novelarto 1887-1986*, P218-225). La aŭtoro de la menciitaj noveloj estas Cicio Mar, Li publikigis E-novelaron *Forgesitaj Homoj* en la jaro 1937, Lia angle verkita romano *Montara vilaĝo* en 1984 aperis en Esperanto-versio de William Auld.

Cicio MAR, la plej elstara E-verkisto en Ĉinio, publikigis sian unuan novelon en Esperanto en 1932, unu jaron post la lernado de Esperanto, tiam li ankoraŭ estis 19-jaraĝa. En Ĉinio Cicio Mar estis unu el la malmultaj verkistoj, kiuj tre bone parolis en pluraj fremdaj lingvoj kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en pluraj kampoj en la literatura historio de la Moderna Ĉinio.

1. Pri la aŭtoro

Cicio MAR, (ĉine:叶君健, pinjine: yè jūn jiàn) naskiĝis en 1914 en malgranda montvilaĝo de la gubernio Hong'an de la provinco Hubei en centra parto de Ĉinio kaj mortis en la 5-an de januaro 1999, estis fama verkisto, tradukisto, erudito, ĉefredaktoro, deputito, socia aganto kaj heroldo de la ĉina kaj fremda literatura interŝanĝo. Li estis pioniro de la Ĉina Esperanto-movado, komitatano inter 1980-1992 de UEA, ano de la ĉina parlamento, vicprezidanto de Ĉina Tradukista Asocio, konsiliano de Ĉina Verkista Asocio.

Cicio Mar havas tri nomojn ofte uzataj. En Ĉinio li estas famkonata per la nomo *Ye Junjian*, kelkfoje *Yeh Chun-chan*, en okcidento per *Chun-chan Yeh*, kaj en Esperanto pli konata per *Cicio Mar*, kies ĉinigo en ideogramoj legiĝas homofone kiel Mar, la mirinda talentulo el Hubei. Tiuj tri nomoj ĝuste respegulis la tri sferojn de lia agado: ĉinlingva, fremdlingva kaj Esperanta^[1].

Li ekverkis nacie kaj angle ekde 1933, krom Esperanto li scipovis aliajn 12 lingvojn kiel la francan, hispanan, italan, germanan, danan kaj svedan lingvojn^[2]. Fakte, li verkis en Esperanto multe pli frue ol en la angla. Ĝuste dank' al Esperanto Cicio Mar ekmarŝis sur la literatura vojo.

En 1931 li lernis Esperanton en Ŝanhajo kaj partoprenis aktivadon organizitan de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. En 1932 li publikigis la novelon *Je la Jarfino* en Esperanto kaj de tiam suriris la literaturan vojon. En 1933 li lernis fremdan lingvon en la Wuhan-a Universitato kaj diplomiĝis en 1936. Tie li aktive partoprenis aktivadon organizitan de la Hankou-a Esperanto-Asocio, korespondis kun alilandaj esperantistoj kaj ricevis multe da progresaj Esperantaj eldonaĵoj, el kiuj li multe asimilis, kaj dank' al tio li daŭrigis sian verkadon en Esperanto. Maje de 1936 li veturis al Japanio por studo kaj ofte partoprenis aktivadon organizitan de la Japana Esperanto-Instituto, kie li konatiĝis kun multaj japanaj esperantistoj, inter kiuj ja estis Verda Majo. Post la Evento de la 7-a de Julio en 1937 li estis foreskortita el Japanio, ĉar japana polico opiniis, ke li estas danĝera persono.

Reveninte Ĉinion, li veturis de Ŝanhajo al Wuhan kaj partoprenis la internacian propagandon en la Tria Sekcio de la Politika Departemento gvidata de Guo Moruo (Kuo Moĵo, kultura eminentulo). Li aktive partoprenis aktivadon de la kontraŭjapana unuecfroto de la literaturaj kaj artaj rondoj. Li estis unu el la iniciatintoj de la Ĉina Tutlanda Literatura kaj Arta Kontraŭjapana Nacisava Societo. Li laboris por la Kontraŭjapana Rezistmilito per Esperanto kaj la angla lingvo.

En Hongkong li kaj aliaj verkistoj kune iniciatis *Ĉinaj Verkistoj*, la plej fruan internacian literaturan revuon de Ĉinio, kun la celo konigi al la tuta mondo, kiel la ĉina popolo faras la penigan batalon kontraŭ la japanaj agresantoj.

En 1944, invitite de Britio li veturis al Britio kaj studis en Kembriĝa Universitato. Li faris paroladon en multaj lokoj de la lando por konigi al eksterlandanoj la kontraŭjapanajn heroaĵojn de la ĉina popolo.

En la jaro 1949 naskiĝis la nova Ĉinio kaj Ye Junjian revenis sian patron kaj eklaboris en Pekino pri kulturaj rilatoj kun eksterlando. Kiel literaturisto, li sentis bezonon fondi literaturan gazeton por konigi la pasintan kaj nuntempan Ĉinion al la alilandaj legantoj. Li do fondis la periodaĵon Ĉina Literaturo, kiu eldoniĝis unue anglalingve kaj poste ankaŭ francelingve. Lia laboro donis frukton — la gazeto kun riĉa enhavo kaj bela lingvaĵo estis tuj akceptita de la legantoj. Ĝi funkciis kiel grava kanalo por diskonigi novan Ĉinion al fremdaj legantoj. En la sekvintaj jaroj Ye Junjian aktive partoprenis la internacian kulturalan aktivadon kaj verkis multe da prozaĵoj, noveloj kaj porinfanaj literaturaj verkoj. Li tradukis multe da fremdlandaj literaturaj verkoj. La de li tradukita Fabeloj de Andersen estis alte taksata en Danlando kaj pro tio li ricevis la naciflagan ordenon donitan de Dana Reĝino, kio

1 Japanio ekatakis Ĉinio en tiu tago.

estis la unika honoro el la amaso da versioj de la fabeloj de Andersen de la tuta mondo. Tio ja estis senprecedenca, ke la aŭtoro kaj tradukinto ambaŭ ricevis la saman ordenon pro la sama libro.

Cicio Mar sinsekve laboris en la komisiono por internacia kultura interfluo, funkciis kiel ĉefredaktoro de la revuo "*Ĉina literaturo*", ĉina tradukisto, vicprezidanto de la Asocio de ĉinaj tradukistoj, komitatano de la ĉina federacio de literatura kaj arta rondoj, konsilanto kaj membro de la sekretariato de la Ĉina Verkista Asocio, vicprezidanto de la ĉina sekcio de la Internacia Verkista Asocio PEN, profesoro de literaturo de fudan, centra (nun nankina) kaj furen universitatoj en Ĉinio. Li multe prelegis en universitatoj en Norvegio, Danlando, Britio, Usono.

2. pri liaj esp-agadoj

Liceano 17-jara, aŭdinte pri Esperanto en 1931 li tuj komencis memlerni pere de koresponda lernejo en Ŝanhajo kaj partoprenis aktivadon organizitan de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. En 1932, nur unu jaron post la lernado li publikigis la novelon *Je la Jarfino* en Esperanto kaj de tiam suriris la literaturan vojon.

Fininte la universitatan lernadon, Ye Junjian daŭrigis sian studon en Japanio. Tie li konatiĝis kaj amikiĝis kun aro da famaj esperantistoj, partoprenis en la tiea Esperanto-movado kaj publikigis siajn verkojn.

Kvankam Ye Junjian famiĝis en la mondo pro sia anglalingva verkado, tamen li havis grandan entuziasmon por Esperanto. Li iam funkciis kiel vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Asocio kaj societo "Amikoj de Esperanto", konsilisto de El Popola Ĉinio kaj membro de la plenuma komitato de UEA.

Li partoprenis la 34-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en 1949 en Britio post la Dua Mondmilito. Ĝuste en tiu UK li konatiĝis kun Wanda, bofilino de L.L. Zamenhof. En 1987, dum la 72-a UK en Varsovio li renkontis ŝian filon, Ludwik Zaleski Zamenhof, nepon de L.L.Zamenhof. Li tre ĝojis kaj verkis la artikolon "Nova amikeco kun familianoj de Zamenhof".

Li multfoje partoprenis Universalajn Kongresojn: 34-a UK 1949, 63-a UK 1978, 64-a UK 1979, 65-a UK 1980, 70-a UK 1985, 71-a UK 1986, 72-a UK 1987, foje kiel reprezentanto de Ĉinio. Kiam UK okazis unuafoje en Ĉinio en 1986, Cicio Mar funkciis kiel rektoro de la kongresa universitato.

Li multe laboris por reciproka kompreno de esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj. La ĉinaj esperantistoj neniam forgesos liajn kontribuojn al la Esperanto-movado ĉina

kaj internacia. En Esperanta rondo Cicio Mar estis vicprezidanto de "Amikoj de Esperanto" kaj ĈEL kaj poste honora prezidanto de ĈEL, konsilanto de EPĈ, membro de la komitato de UEA. Li plurfoje ĉeestis UK kaj funkciis kiel rektoro de IKU en 1986^[3].

3. pri la verkoj

La infana vivo gravuris profundan impreson en lia memoro. En la jaro 1933 li veturis al Wuhan, ĉefurbo de la provinco Hubei, por studi eksterlandan literaturon kaj komencis postlaboran verkadon. Suririnte la literaturan vojon, Cicio Mar ĉinigis multajn verkojn el fremdaj literaturoj (*Eskilo, Prosper Mérimée, Maurice Maeterlinck, Henrik Ibsen, Federico Garcia Lorca, Hans Christian Andersen, Federico García Lorca, Lev Tolstoj* k.a.).

Cicio Mar scipovis originale verki en fremdaj (angla, germana, franca...) lingvoj. S-ro Tie Ning, prezidanto de la *Ĉina Verkista Asocio*, diris en la solena kunveno memore al Ye Junjian en 2014, ke li estis unu el la malmultaj verkistoj, kiuj tre bone parolis en pluraj fremdaj lingvoj kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en pluraj kampoj en la literatura historio de la Moderna Ĉinio. Li, vekisto malkaŝema, senpaŭze laboris kaj fervore helpis junajn daŭrigantojn, dum sia vivo li ne nur enskribis brilan paĝon en la literatura kariero kaj fremdlingva tradukado, sed ankaŭ rikoltis gravajn sukcesojn en la moderna edukado kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj la Okcidento^[4].

Lia unua novelo *Je la Jarfino* estis verkita de li en la aĝo de 19 jaroj en Esperanto. Granda harmonio elspirata de la lingvo Esperanto profunde impresis tiun intelektulon de la antikva Ĉinio. Li faris gravan kontribuon por disvastigi Esperanton en Ĉinio. De la jaro 1933 ĝis la jaro 1936 li verkis en Esperanto entute 13 novelojn inkl. de *Je la Jarfino, Armeaniĝo de Wang Desheng* kaj aliaj, kiuj volumiĝis en *Forgesitaj Homoj* en la jaro 1937 en Hongkongo kaj eldoniĝis per plumnomo "Mar".

S-ro ZHANG Qicheng (ĉefredaktoro de EPĈ, prez. de ĈEL) rememoris^[5]: "Mi konis lin jam en la 30-aj jaroj. Tiam li ankoraŭ ne estis fama verkisto, sed juna studento kun la nomo Cicio Mar, kiu verkis en Esperanto. Kun Ĵelezo mi redaktis tiam Esperantan gazeton *La Mondo*. Foje ni ricevis kontribuojn - Esperantan novelaron *Forgesitaj Homoj*, kies enhavo estas interesa. Ni tre ĝojis, ke en Ĉinio aperis juna Esperanto-verkisto. La novbakita verkisto Cicio Mar rapide progresis. Poste li lernis la danan lingvon en Danio kaj ĉinigis *Verkaron de Andersen* (16 volumoj), pro kio li famiĝis kiel tradukisto kaj poste ricevis 'Naci-flagan Ordenon' de la dana registaro."

Forgesitaj homoj okupis apartan lokon en la literatura historio de Esperanto. Ivo Lapenna, gvidanto de la internacia Esperanto-asocio, prenis ĝin kiel gravan konsistigan parton de la proleta literaturo de Esperanto. En la jaro 1939 li Esperantigis la novelaron *Novaj Taskoj*, kiu priskribas la ĉinan popolon en ilia batalo kontraŭ japanaj imperiistoj, por konigi al la tuta mondo la ĉinan kontraŭjapanan literaturon kaj ĝian heroan kaj penigan batalon por liberiĝo kaj nacisavo.

En la noveloj s-ro Cicio Mar priskribis ordinarajn kaj malgravajn personojn en kamparo kaj urbeto de Ĉinio, kiaj longtempaj dungitoj infektitaj de hazardludo, senlaborigintaj komizoj kaj migrantaj artistoj. Liaj noveloj skribis pri realaj homoj en kampara medio, kaj samtempe pri vilaĝo ŝvebanta en spaco kaj tempo, kie mankas loknomoj, datoj kaj titoloj de organizoj, kvazaŭ la fluganta insulo Laputa de Gulliver en la satiro de Jonathan Swift^[6].

Post la Dua Mondmilito, laŭ invito, Cicio Mar sin okupis pri studo de la eŭropa literaturo en la universitato Kembriĝo. En sia progresiga studo li daŭrigis sian verkadon de romano. Lia angle verkita romano *Montara vilaĝo (The Mountain Village)*, la unua romano verkita de Ĉino en la angla pri Ĉinio, estis honorita de la angla biblioteka asocio ("*Book Society*") kiel la plej bona verko por la monato Julio 1974.

Per ĝi la aŭtoro priskribis la vilaĝan vivon tre intiman de li. Per la lingvo de juna knabo li priskribis la postiĝintecon kaj izolitecon de la vilaĝo, malfeliĉon de la vilaĝanoj, ilian baraktadon kaj la gravan influon de la Granda Revolucio al la vilaĝoj. La tuta romano estis verkita per simpla kaj modesta lingvo kaj la kaŝitaj ironoj elspiras sinceran amon de la aŭtoro al la kampoj de la vilaĝo. Ĝi estis plurfoje eldonita en multaj landoj kaj poste tradukita en pli ol 20 lingvojn. Sed mankis la Esperanta versio tiam. En la jaro 1984 ĝi estis Esperantigita de fama Esperantisto-poeto William Auld kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi estis multe laŭdata en la internacia Esperantujo.

Pri la E-versio, S-ro ZHANG Qicheng skribis en sia artikolo "*Karmemore al Ye Junjian*" en 1999, "...Sed mankis la Esperanta versio. Do mi petis s-ron William Auld ke li esperantigu ĝin. Ĉar Auld estas brito kaj bone scias Esperanton, li estas la plej kompetenta por tiu tasko. Li ĝoje akceptis tion. Poste li diris al mi, ke li tradukis la libron kun granda plezuro, ĉar la angla lingvo de Ye estas tre flua. Kiel grava verko, "*Montara Vilaĝo*" en Esperanta versio estis enlistigita en la Serion Oriento-Okcidento (n^o 21) sub la aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio."^[5]

4. Trajtoj de liaj verkoj

Tralego de liaj noveloj donis al mi impreson, ke lia lingvo estas tre flua kaj alloga, tute sen ĉinisma trajto, kiajn ĉinaj esperantistoj ofte verkas en siaj verkaĵoj. Pensu, la noveloj estas verkitaj antaŭ pli ol 80 jaroj, kaj de juna esperantisto, kiu ĵus lernis nian lingvon. Lia kapablo en Esperanto montris sian talenton en fremdlingva verkado, eĉ nuntempaj ne multaj ĉinaj esperantistoj kapablas verki tiajn bonajn novelojn kiel Cicio Mar. Mia opinio, ke la frazoj de Cicio Mar estas legeblaj kaj kompreneblaj por eŭropanoj.

Kompreneble, Cicio Mar uzis ie-tie la longajn kunmetojn, ekz. "mizersortulino" kaj "vagatingante". Tio ne povas malhelpi la legantojn ĝui la novelojn. Rossetii recenzis jene: Unue, la tendenco bildigi la okazaĵojn grafike per ofta uzo de -ata. Tio cetere karakterizis la proletan Esperanto-stilon de la 30aj jaroj. La okazaĵoj do prezentiĝas al la okuloj per viviaj bildoj kvazaŭ filmo, ĉiu kun eta daŭro. Kaj la dua trajto, por aliflanke akceli la pason de iu evento, estas apliki al ĝi la prefikson ek-.^[6]

Konkludo

Cicio Mar postlasis verkojn kaj tradukaĵojn de 11 milionoj da ideogramoj. Li kontribuis multe al la homaro. Kiel resumis s-ro ZHANG Qicheng, ke la fabeloj de Andersen tradukitaj de li restos ĉiam kiel kultura riĉaĵo por ĉinaj infanoj. Liaj verkoj kiel "*Montara Vilaĝo*" diskonigas la mizeran pasintecon kaj feliĉan nuntempon de Ĉinio al pli multaj homoj de la mondo. Lia kontribuo al la Esperanto-movado estas ĉiam laŭdata de la esperantistoj. Li verkis "Forgesitaj Homoj", tamen li estos neniam forgesita.

Fine, mi volas fini mian eseon per la Rimportreto verkita de mia kara amiko HU Guozhu en la jaro 2006.

Rimportreto^[7]

pri Cicio Mar (1914-1999)
Hu Guozhu

Cicio Mar - plumo talenta
debutis jam ekde junaĝo.
Andersen-fabelojn kun saĝo
tradukis li per kompetenta

poligloteco eminenta.
Rakontis pri Monta Vilaĝo.

Cicio Mar - plumo talenta
rekordis jam ekde junaĝo.

Viv' de forgesitoj legenda,
esoj pri l' monda vojaĝo
allogas nin ĉiam per plaĉo
sam-kiel Montaro Silenta.

Cicio Mar - plumo talenta!



Bibliotekoj

[1] Cicio Mar: https://eo.wikipedia.org/wiki/Cicio_Mar

[2] Ye Junjian: Tradukado de la feino de Andersen "La Unua Viro" Arkivigite je 2020-04-05 per la retarkivo Wayback Machine - Literaturo kaj Historio, Renmin Ribao, la 14-an de septembro 2019 (zh)

[3] Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado, Eldonejo Nova Stelo, Beijing, 2004

[4] Memore al Ye Junjian ĉe lia 100-jara datreveno de la naskiĝo, 2014-12-07, Beijing.
http://www.espero.com.cn/2014-12/12/content_34302836.htm

[5] ZHANG Qicheng, Karmemore al Ye Junjian el la marta numero en 1999 de El popola Ĉinio

[6] Reto Rossetti (Britio) (Recenzo, Naskiĝdoloroj de la nuna Ĉinio, esperanto 1985 decembro/213

[7] Hu Guozhu, Rimportreto pri Cicio Mar (1914-1999), el Penseo N-ro 171, Jan/2006. ◆

GONG Xiaofeng (Arko) estas ĉina esperantistino kaj estranano de UEA. Ŝi estas profesoro pri media scienco kaj inĝenierado, doktoro pri nutra scienco.

Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 004



Ĉapitro 6 Zu Fanhua rakontas

Estis terure!

Mi pensis, ke li jam foriris, sed ne. Komence mi ne volis trakti lin tiel. Sed li refoje menciis la aranĝitan gefianĉigon de niaj gepatroj. Plej kolerigis min, ke li skribis leteron al mia avinjo, en kiu li menciis, ke Lin Zimin portis la sakon por mi. Neatendite, li estis tiom kruela! Antaŭ ol la filmo komenciĝis, mi rapide rendevuis kun Lin Zimin. Ni decidis spekti la filmon kune. Mi revenis al la dormĉambro por preni veston dum Lin Zimin iris sola al la sportejo. Ĉe mia eliro kun vesto, Li Hon revenis. Ŝi diris, ke ŝi sentas sin malkomforta verŝajne pro la alveno de ŝia menstrua ciklo kaj intencis kuŝi iomete. Sed ŝia litkovrilo estis lavita kaj ankoraŭ ne sekiĝis. Do mi permesis ŝin dormi en mia lito. Mi fermis la pordon kaj iris al la sportejo. Tiu ulo enrampis tra la fenestro laŭ la kloako. Eble ĝuste kiam li grimpis supren, Li Hon estingis la lampon - kiam ni revenis, la lampo estis estingita. Mi neniel atendis tian okazaĵon. Estas terure! En sia agonio li alglue enbrakigis la torson de Li Hon. Certe li misprenis ŝin por mi. Li Hon estis mia bona amikino, ŝi senkiale fariĝis mia anstataŭulo kaj mortis tragikan morton. Mi bedaŭris ŝin, suferante de la interna turmento. Kompreneble, mi ankaŭ ne volis, ke tio okazu al mi. Pro timo, ĉagrenoj kaj oniaj klaĉoj mi havis nenian pacon de la menso.

Eksciinte la okazaĵon, avinjo brakumis min plorante. Ŝi diris, ke ŝi tuj komencos serĉi manierojn transpostenigi min al la urbo Ŝan. Ŝi antaŭe menciis tion. Kvankam pro la okazo de mortigo mi ne volis resti en la ŝipfarejon, tamen mi domaĝis forlasi Lin Zimin. Avinjo antaŭe avertis al mi, ke mi ne enamiĝu je kiu ajn ĉi tie. Sed homaj sentoj estis malfacile klarigeblaj. La fakto estis, ke Lin Zimin kaj mi sekrete enamiĝis al si. De kiam kaj pro kio mi ekamis lin? Mi ne memoris la precizan tempon. Ĉu pro lia alta staturado kaj amuza parolmaniero? Ĉu post kiam mi eksciis, ke li partoprenas en la memstudadaj ekzamenoj de kolegio? Ĉu tiun fojon sur la pramo, kiam li batis la ŝteliston tiel forte, ke ties nazo eksangis kaj tiu devigite redonis la monujon al la viktimo? Ĉu dum la vojaĝo al la montego Wudang organizita de la Junulara Ligo de la ŝipfarejo, li dorse descendigis la vunditan infanon laŭlonge de la pado? Malgraŭ ĉio, ni enamiĝis reciproke. Ni kaŝite rendevuis, brakumis, kisis kaj kune revis pri la estonteco.

Mi jam longe volis rakonti al avinjo pri mia rilato kun Lin Zimin, sed mi neniam havis kuraĝon. Kiam ŝi eksciis pri mia aranĝita fianĉinĝo kun Ŝja Sonlin, ŝi tiom koleris, kiom mi ne kuraĝis plu ĉagreni ŝin. Ŝi avertis min ne enamiĝi je kiu ajn ĉi tie, sed tamen mi jam enamiĝis, eĉ ĝuste ĉi tie. Kion ŝi farus, se ŝi sciis mian enamiĝon? Mi ne havis la kuraĝon informi sin pri la afero. Ĝi restis kaŝita al ŝi, kaj dum momento mi embarasiĝis. Nuntempe avinjo intence transpostenigos min al la urbo Ŝan. Kion mi faru?



Sub la sama kaduka ŝipo, je la fiksa horo, li kiel antaŭe brakumis min tiel entuziasme kaj kisis min tiel pasie. Dume mi ne reagis plena de ĉagrenoj.

“Kio okazis? Ĉu vi ankoraŭ pensas pri la okazaĵo de Ŝja Sonlin? Ne pensu. Malgraŭ ĉio, tiu ulo jam mortis. Li ne plu povus ĉagreni nin.”

Li ne sciis, ke mi havas grandan ĉagrenon ankore. Kiel mi diras al li? Mi ne volis lin ĉagreni, do mi ŝajnis facilan tonon kaj ĉirkaŭdiris: “Estas tre malvarme ĉi tie.”

“Do ni eniru la interferdekon por babili iomete?”

En la interferdeko estas varmete. Ni sidiĝis en angulo. Mi ankoraŭ estis plena de ĉagrenoj dum li estis ĝoja.

“Ĉu vi scias, kian libron mi legis lastatempe?” li demandis.

“Kiel mi povus scii?”

“《Pri amo》, verkita de sovetiano. En la libro troviĝas legendo: homo origine havis kvar okulojn, kvar orelojn, kvar manojn kaj kvar kruojn; Dio, timante ke homo estas tro potenca, disigis homon en du duonojn, unu duono fariĝis viro kaj la alia virino; la du duonoj ĉiam deziras reunuiĝi, do ili altiras kaj amindumas unu la alian. Kaj tiel ekestas amo. Mi ne scias, ĉu tiu legendo estas vera aŭ ne. Sed mi kredas, ke mia alia duono estas vi kaj mi estas via alia duono.”

Ho, kiel varmaj vortoj! Mi min sentis tiel feliĉa, ke mi ekprenis lian manon kaj milde karesis. Mi estis feliĉa!

“Ni origine estis unu tuto. Dio lasis min naskiĝi ĉi tie kaj vin en via hejmloko, ĉu ne? Rigardu, ni ambaŭ estas naskitaj en la jaro de la drako, eĉ en la sama monato, ĉu ne? Ĉi tio mem montras niajn antaŭdestinitajn rilatojn de la sorto, ĉu ne?”

Ĉu vere ekzistis antaŭdestinitaj rilatoj? Ĉu vere ni ambaŭ origine estis unu tuto? La fakto estis, ke mi baldaŭ apartiĝos de li kaj iros al la malproksima urbo Ŝan, kie mi konas neniun.

“Fanhua, mi amas vin, vi estas tiel aminda. Vi estas mia alia duono. Ne, vi estas mia tuta vivo.” Li ekbrakumis min, tiel forte, ke mi preskaŭ ne povis spiri.

Ĉe mia orelo aŭdiĝis lia peza spirado. Lia forta viraodoro ebriiĝis min. Mi estis ravita, la kapo iĝis varma kaj la sento de feliĉo skuis mian koron. Mi fermis la okulojn, senforte falis malantaŭen kaj kuŝis surdorse. Li ekkuŝis ĉe mia flanko kaj kisis miajn lipojn, vizaĝon, okulojn kaj kolon, tiel pasie, ke mia tuta korpo moliĝis. Mi perdis ĉiujn pensojn, ĝuante liajn pasiajn kisasojn kaj karesadon. Lia mano glitmoviĝis sur mia korpo kaj poste ŝtele ŝoviĝis en mian veston. Mia koro abrupte streĉiĝis. Mi volis haltigi lian manon sed ne agis, ĉar mi pensis, ke tio malvarmigis lian entuziasmon. Lia mano ekknedis alterne miajn mamojn, kiuj ekŝvelis. Ho, tiu mano, kiu aspektas forta, fariĝis tre delikata en la momento. Mi tenis la okulojn fermitaj. La tuta korpo sentis plezuran jukadon kvazaŭ varma torento de dolĉeco en la vejno. La mano karesante glitis malsupren, malsupren... Ekstere, la riverakvo frapis la bordon ritme, kaj la plaŭdado penetris en la interferdekon. Malgraŭe aŭdeblis niaj pezaj spiroj. Mi ne konsciis, kiam lia mano malligis mian pantalonon kaj daŭris malrapide malsupren, malsupren... “Ah, ne!” mi zumis kaj la spirado fariĝis pli peza. Mi sentis sufokan streĉiĝon kun la koro batanta rapide.

“Ho, mi amas vin! Por ĉiam!” li flustris. La mano daŭre moviĝis malsupren, malsupren... Ĉi tiu knabo ĉe mia flanko amis min. Ĉu mi amis lin? Jes, mi ankaŭ amis lin. Sed ĉu mi povus kunigi min kun li? Mi ne kuraĝis diri al avinjo. Ŝi eble flamos pli furioze ol lastfoje. Sed mi amis tiun ĉi knabon. Post kiam Ŝja Sonlin mortigis Li Hon, mi estis terure timigita. Nur kiam tiu ĉi knabo akompanis min, mi ne timis. Li estis mia apogilo. Avinjo, kiu vivas sole, ankaŭ bezonis apogilon. Ŝi travivis sufiĉe da suferadoj dum la antaŭa parto de sia vivo... Ho, lia mano, kaj kompakta kaj delikata! Mi subkonscie kunpremis la krurojn, estante multe timigita! Ĉu mi amis lin? Jes, mi amis lin. Liaj fingroj moviĝis inter miaj femuroj. Mi amis lin. Ŝajnis, ke avinjo estos tre ĉagrenita. Mi estas multe timigita! Mi firme ĉirkaŭprenis lian kolon. Mia brusto forte leviĝis kaj malleviĝis dum lia kizado sufokis min. Mia tuta korpo moliĝis. Mi ne volis malfermi la okulojn. Ĉio ĉirkaŭ mi estis silenta. Mi deziris, ke ĉio haltu. Sed nenio haltos. Avinjo ne ĉesigos sian klopodon por mia transposteniĝo kaj mi ne povos resti ĉi tie por ĉiam kun tiu ĉi knabo. Mi ne volis pensi pri ĉi tio, sed ĉi tio estis vera realaĵo. Ho, mi ne povis elteni, mi estis tiel feliĉa, tiel suferanta. Mi vere deziris morti tiumomente. Larmoj elfluis, mi ekploris.

“Kio okazis, Fanhua?” li demandis surprizite.

Mi kuŝis senvorte. Sento de facila jukado ankoraŭ skuis min kaj larmoj daŭre elfluis.

“Pardonu, Fanhua. Mi ne devus fari tion. Pardonu min. Vi batu min. Mi estas kulpa!” li memriproĉis.

Li sidigis min kaj ordigis miajn vestojn. Mi apogis la kapon sur lia ŝultro kaj ploris. Ĉu mi diru al li? Bone, verŝu ĉion al li.

Kiel mi antaŭvidis, li fariĝis tre seniluziigita, kiam li eksciis, ke mi transposteniĝos. Li premis min al sia sino kaj diris, ke li neniam apartiĝos de mi. Li intencis konfesi ĉion al mia avinjo. Mi persvadis, ke ni devas atendi iom da tempo. La afero de Ŝja Sonlin jam sufiĉe ĉagrenis ŝin.

Li promesis ne iri al mia avinjo, kaj mi portempe lasis la ĉagrenojn flanken.

Avinjo petis helpon de multaj oficialuloj per oni-ne-sciis-kiom da donacoj. Baldaŭ post la Printempa Festo en 1985, miaj transposteniĝaj proceduroj preskaŭ plenumiĝis. La transposteniĝa dato estis fiksita por la 8a de majo. Mi falis en dilemon: mi domaĝas Lin Zimin kaj ne volas forlasi avinjon.

Lin Zimin promesis ne ĝeni mian avinjon. Sed kiam la adiaŭa tago alproksimiĝis, li ne povis plu teni sin kaj kuraĝe iris al mia avinjo sen mia scio. Kaj ĉifoje ĉio fariĝis pli malbona.

“Fanhua, vi estas tro malobeema! Kial vi estas tiel ĉagreniga? La afero de Ŝja Sonlin sufiĉe ĉagrenis min. Ĉu vi ne pensas, ke mi estas sufiĉe ĝenita?” Avinjo eksplodis de kolero, kaj mi ne aŭdacis rigardi ŝin eĉ nek spiri.

Avinjo laŭte riprlioĉis min plie: “Vi estas tro facilanima. Ne estas mirinde, ke okazis la afero de Ŝja Sonlin. Vi staris sur du boatoj, konservante amrilatojn kun du knaboj. Neniu povus toleri tion. Kiel vi povus agi tiel?”

Mi ne jam staris sur du boatoj. Mi neniam amis Ŝja Sonlin. Mi fidele amis Lin Zimin, sole lin. Sed mi ne aŭdacis elmeti mian replikon.

“Kial vi foje refoje trompis min? Kiam mi demandis, ĉu vi havas koramikon, vi diris ne. Kiam mi demandis, ĉu vi volas iri kun mi al la urbo Ŝan, vi diris jes. Se vi intencis iri kun mi al la urbo Ŝan, do kial vi havigis al vi koramikon ĉi tie? Se vi frue dirus al mi, ke vi ne volas iri al la urbo Ŝan, havante koramikon ĉi tie, mi farus alian aranĝon. Mi ne klopodis tiel multe por via transposteniĝo, mi mem revenos sola al la urbo Ŝan. Sed vi intence kaŝis ĉion de mi, ĉu vi ne intencis ĉagreni min?” Ŝiaj lipoj iomete tremis. Mi vere ne intencis ĉagreni ŝin. Mi amis avinjon, ankaŭ Lin Zimin. Amo vere estis malfacile klarigebla aĵo.

“Vi nenion diras al mi. Se vi volas havigi al vi koramikon ĉi tie, vi almenaŭ devus konsulti min. Mi opinias, ke tiu knabo Lin Zimin ne estas taŭga. Rigardu lin: la pantalono estas strange, la haroj tiom longaj kaj la ungoj flavaj, certe granda fumanto.” Ho, avinjo tute ne konis lin. Siatempe furoris longaj haroj kaj trumpetoforma pantalono. Li ja fumis, mi kelkfoje admonis lin, li promesis abstini laŭgrade. Tamen mi nur povis silente aŭskulti ŝian bomadon de riproĉoj kun la buŝo fermita kaj la kapo mallevita.

Ŝia bombado daŭris: “Li diris, ke li amas vi kaj vi amas lin. Li petis, ke mi ne transpostenigos vin al la urbo Ŝan kaj lasos vin resti. Ŝajnas, ke viaj sentoj estas sufiĉe profundaj. Mi ne volas disigi vin, por ke vi ne malamu min dumvive. Vi mem decidu. Se vi decidus resti, mi ne devigos vin. Kvankam viaj transposteniĝaj proceduroj estas preskaŭ plenumitaj, tamen mi povas nuligi ilin. Se vi deziras, ke Lin Zimin akompanu vin al la urbo Ŝan, mi ne kapablas fari helpon je lia

transposteniĝo. Mi ne povas ofte ĝeni la helpintojn, mi ne estas oficialulo nek parenco de altrangulo. Nuntempe tre malfacilas transpostenigi homon, precipe transpostenigi ordinaran laboriston de gubernio al granda urbo. Bone, pripensu zorgeme. Vi ankaŭ povos reveni al la kamparo dum la libertempo de la Laborista Tago kaj interkonsiliĝos kun viaj gepatroj kaj avino. Ĉu iri aŭ resti, respondu al mi post unu semajno. Sed atentu, ne lasu via humoro influi vian laboron. Tute egale, ĉu vi iros aŭ restos, vi devas bone plenumi vian laboron.”

Ne necesas unu semajno, nek reveni al la kamparo. Vidinte la blankajn harojn de avinjo kaj pensinte pri ŝia malfacila travivaĵoj, mia koro moliĝis. Ŝi bezonis la akompanion de familiano! Mi ne povis forlasi ŝin, lasante ŝian vunditan koron suferi ankoraŭfoje. Ŝi jam perdis tre multe. Mi decidis: iru al la urbo Ŝan.

Kun larmoj mi diris mian decidon al Lin Zimin. Ankaŭ li eklarmis. En la memoro mi nur konservis liajn ridetojn, neniam liajn larmojn.

La frusomera vento devus esti vigliga, sed sidante sur la ferdeko de la kaduka ŝipo, ni ambaŭ sentis penetran malvarmon. Do ni kune eniris la interferdekon. La sekvan tagon mi estis forironta, kaj ni ambaŭ verŝis dolorajn larmojn. Liaj larmoj pli afliktis mian koron. “Ĉu vi ne povas trovi rimedon transposteniĝi al la urbo Ŝan? Mi atentos vin.” Mi volis lin konsoli, ankoraŭ tenante etan esperon.

Li ekkuŝis sur la planko kun larmoj en la okuloj. Li forte skuis la kapon, dirante amare: “Mi preskaŭ dezirus detrui ĉi tiun ŝipon! Mi preskaŭ dezirus...” Liaj gepatroj estis ordinaraj laboristoj, kiuj tute ne havis kapablon helpi lin.

La nokto falis kaj malĝojo kovris lin kaj min.

“Ĉu vi vere foriros morgaŭ?”

“Jes, morgaŭ mi pakos la aĵojn, postmorgaŭ mi veturos per aŭtobuso al la urbo Sijan, de tie prenos trajnon al la urbo Ŝan.”

“Ho, morgaŭ.” Li diris amare. “Mi dezirus, ke la tempo haltu en ĉi-nokto por eterne! Mi ne volas perdi vin!”

“Ankaŭ mi ne volas perdi vin.” Tio estas vortoj el la fundo de mia koro.

“Ho, estas tro kruela! Kial ni konatiĝis? Se mi scius, ke tiel okazos, kial mi enamiĝis al vi?” Li turnis la vizaĝon.

Se homo povus antaŭvidi sian sorton, kiom bone estus!

La riverakvo senĉese frapis la bordon brue kaj la pala lunlumo senenergie penetris en la interferdekon. La tempo forfluis silente. Morgaŭ, morgaŭ, mi vere deziris, ke morgaŭo ne venu por ĉiam. Mi amis lin, li estis la mia, kaj mi estis lia. Li kuŝas apud mi, lia fortika korpo plenigis min per forto kaj ekscitis min. Mi amis lin, mi estis lia. Mi kviete senvestis la torson kun mamzono ligita kaj kuŝiĝis apud li, avide enspirante lian odoron. Li turniĝis kaj brakumis min, kisante, kisante... Mi deziris, ke la tempo haltu por eterne. Lia fortika korpo ekkuŝis sur mi kaj premis min, tiel ke la spirado fariĝis malfacila. Mi feliĉe fermis la okulojn. Li ekscitite spiradis kaj forigis mia mamzono. Ĉio perdis sian signifon, kaj samtempe ĉio estis tiel bela. Mi amis lin, mi estis lia. Ĝuste en la momento kiam du duonoj estis unuiĝontaj por fari unu tuton, li ekhaltis, senforte kuŝiĝis flanken kaj eklarmis.

“Ne, mi ne povas rezigni, mi ne povas perdi vin. Mi kredas, ke nepre venos la tago, kiam mi leĝe kaj formale posedos vin. Mi volas konservi la unuan fojon. Mi penos ĉiu eblan rimedon transposteniĝi al la urbo Ŝan. Estas pli bone se via avino volus helpi.”



Mi ankaŭ sopiras la tagon. Siatempe estis neeble, ke avinjo konsentas helpi. Ni devis atendi ĝis ŝia humoro pliboniĝos. Avinjo amis min kaj kompreneble ŝi deziris feliĉon al mi.

Avinjo petis forpermeson de la lernejo por persone akompani min al la urbo Ŝan. Enirinte la aŭtobusan stacion, mi rigardis ĉien, sentante, ke Lin Zimin venu. Sed ne troviĝis lia spuro. Mi estis iom seniluziigita. Enaŭtiĝinte, mi hazarde rimarkis, ke li rigardis min tra fenestro de alia aŭtobuso. Mi preskaŭ ekkriis, sed ne, ĉar avinjo sidis senpere apud mi. Ni ambaŭ sekrete interŝanĝis rigardojn kaj ridetojn.

Post atingo al la urbo Sijan, avinjo kondukis min rekte al la fervoja stacio. Lin Zimin subsekvis nin. En la vasta hommaro mia koro kaj la lia estis intime kunligitaj. La trajno al la urbo Ŝan alvenos post unu horo. Avinjo ofte rigardis sian brakhorloĝon, kalkulante la tempon, dum mi en la koro malamamis, ke la tempo pasu tro rapide. Mi subrigardis la familieran figuron for de distanco, dume la dolorplenaj okuloj fikse rigardis min. Tiel proksime kaj tamen tiel malproksime! Mi ne povis elteni la melankoliaj okulojn. Mi elprenis mensogon iri al la necesejo, kaj haste intervidiĝis kun Lin Zimin en angulo. Feliĉo kaj doloro, ĝojo kaj malĝojo interplektiĝis en la koro. Mi forte retenis la larmojn. Ni senvorte tenis la reciprokajn manojn firme, interŝanĝante amarajn ridetojn. Mi ne aŭdacis resti ĉe li longe. Eltirinte la manojn, mi retropaŝis kun larmoj perlantaj. Li flustris al mi: “Skribu al mi. Bonan vojaĝon!”

La trajno alvenis kaj foriris kun mi, sed mia koro restis en la malproksima urbo Jun.

Jam vesperiĝis kiam la trajno atingis la urbon Ŝan. Nin renkontis la fratino de avinjo kun sia tuta familio. Ili ĉiuj gaje salutis kaj babiladis. Kia brua vigleco! La brua vigleco apartenis al ili, sed mi nur havis la malĝojon de disiĝo.

La urbo Ŝan estas fama urbo, tre prospera. Eĉ je tia malfrua horo, estis tiom da aŭtoj kaj pasantoj sur la strato. Ho, en la vivoplena vidaĵo sin trovis nek mi nek Lin Zimin.

Avinjo estis zorgema kaj subtila persono. Ŝi jam delonge aranĝis ĉion pere de sia fratino. Ŝi luigis apartamenton kun du dormoĉambroj kaj salono. Sed pro kio ŝi aĉetigis novajn meblojn? Ĉu ne troviĝas mebloj en la urbo Jun? ♦

daŭrigota



REKTA FUMO

Verkis: *Qin Bazi* Trad.: *Minosun*



Kiam ne blovas, la fumo kiu leviĝas el la kamentubo estas rekta. En la tago, kiam ne sunas, la fumo aspektas ĝuste kiel arbo pentrita sur Xuan-papero*. Tio vere estas amuza, vidi ke sur ĉies tegmento sin plantas tia arbo. Ĉe vesperiĝo foje ventas, tiam la “arboj” moviĝas, libere, kiel salikoj, kiuj flirtas.

“Kiam vi vidos ke rektiĝas la fumo super mia domo, vi iru al la arbaro por min atendi tie.”

Tio estas rendevua signo por knabo, destinita de knabino.

Tiel la knabo kaj la knabino renkontiĝas en la arbaro. Unue, ili parolas pri nesalitaj aferoj el la vilaĝo, poste, tremante flustras dolĉajn vortojn, kaj ankoraŭ poste, jam havas nenion por babili. Fakte, estas silenta tempodaŭro, dum kiu ili parolas per la okuloj. Kaj krome, nature, temas pri kareso kaj kiso, kiel imitaĵo el iu sceno el televido. Sed la tempo mallongas, kaj la movoj delikatas, sen enhavo pli profunda kaj pli substanca. Tiam denove la du paroj da okuloj longe rigardas unu al la alia.

La knabino diras, “estas tempo por reveni.” Sekve ŝi unuavice foriras. Post kiam la knabino jam iras sufiĉe malproksimen, la knabo faras grandan ĉirkaŭiron kaj rehejmiĝas per alia pado. Ĉiufoje, kiam la knabino deiras, la knabo havas iom da tempo por remaĉi la guston postlasitan sur la lipoj kaj la fingroj. Ĉe tio li facile zumas melodion, forte emociita de la belo de la vivo.

Efektive, la distanco inter domoj lia kaj ŝia ne estas granda, kaj la dompordoj situas unu kontraŭ la alia. La du povas mansigni al si reciproke, komplete ne bezonante preni fumon, ĉu rektan, ĉu malrektan, por motivo de rendevuo. Sed kiam la knabino proponis tian rendevuan metodon, la knabo sentis tion interesa kaj guste romantika. Kaŭze de tio, en ĉiu posttagmezo la junuleto tre zorgeme rigardas, ĉu vento blovas, ĉu fumo rektiĝas.

Sed la fumo foje ne estas fidinda.

Iufoje li estas, sed ŝi ne venas. En lia korfundo fluas neafabla humoro. Li iras ĉirkaŭe en la arbaro, kaj tiam lin trafas freŝeco, kiam subite ĉeestas vento. Li pensas, ke li devas diri al ŝi tiun eltrovon. Li eĉ pensas, ke estus pli bone, se la rendevuo okazus en aero fluanta. Sed li tuj timas, ke ŝi ne akceptus la proponon. Ĉar ĉi tie estas pli multe da ventaj tagoj, ol da senventaj, ĝuste kiel oni diras kutime: ĉi tie ventado okazas nur dufoje unujare, sed ĉiufoje preskaŭ dum duonjaro. Per tio ni scias, ke por tiu duopo maloftas sola kunestado.

En iu tago la knabo demandas al la knabino, “kial vi ne venis lastafoje?”

“Tiun tagon blovis orienta vento. Ĉu la fumo ĉe vi ne kliniĝis okcidenten?”

“Mi klare vidis, ke la fumo ĉe vi estas rekta, tiel rekta kiel flagostango.”

“Ĉe via domo blovis, sed ĉe mia, ne.”

La duo ridas: la fumo foje ne estas fidinda.

En la tago, kiam alvenas vento, la fumo lante disbloviĝas. Dum la tuta printempo la knabo senespere gapas al la kamentubo de la knabina domo.

Kiam la printempo svenas, la fumo finfine rektiĝas iutage. Li rigardas jen la kamentubon ĉe ŝi, jen tiun ĉe si, kaj senpacience kuras al la arbaro.

La knabino jam estas tie.

“Mi pensis dumprintempe. La fumo ne estas certa, ni do preferinde nuligas tiamanieran rendezvuon”, diras la knabino.

“Ĉu ne estus alia metodo?” demandas la knabo.

“Poste mi informos al vi,” ŝi diras.



Ĉifoje la junulino ne lasas lin rapide intimiĝi al ŝi, kaj sidas sur arboradiko, flufrante al si, “kiel estus bele, se eblus esti en urbo! Ĉe ni estas tiel monotone, ke eĉ la fumo ne emas ŝanĝiĝi. Kiel seninterese!”

“Mi ne emas aliri. Urbanoj malsimplas. Mi sentas, ke tiu ĉi maljuna arbaro estas tre bona. Mi ŝatus, ke la fumo staru, rekte kiel fosto,” diras la knabo.

La knabino rigardas al la malproksima vilaĝo kaj al la fumo leviĝanta super tegmentoj. Li ŝin rigardas, ambaŭ ne parolas. Poste la knabo komencas karesi kaj kisi la knabinon.

“Mi devas reveni,” ŝi diras,

Senhelpe li rigardas ŝin, “kiel renkontiĝi en la venonta fojo?”

Ŝi ankaŭ rigardas lin, “mi informos vin.”

La knabo havas ankoraŭ iom da tempo por promeni ĉirkaŭe en la arbaro kaj remaĉi la guston postlasitan sur la lipoj kaj la fingroj. Ĉifoje li ne zumas melodion. Tiam li ekkomprenas, ke li faris eraron, logikan eraron.

La knabino estas takta. Unuavice ŝi nuligis la destinitan rendezvuon, kaj poste diris, “mi informos vin.” La knabo konscias, ke ne estos alia fojo. Sed dum la tuta somero, kiam la fumo estas rekta, li obstine iras al la arbaro. En despero li serĉas iom da eblo kaj espero.

Aŭtune, la knabo vidas biletan lasitan de la knabino sur la arbo, al kiu ili kutime sin apogis. Sur ĝi jenaj vortoj: mi fartas bone, la urbo estas interesa, la kamentuboj malmultas, la fostoĵ tre rektas, dum la fumo ĉiam estas konfuza. ◆

Qin Bazi (1960 -), ĉina poeto, verkisto kaj eseisto.

Xuan-papero*: ŝjŭan-papero, specife destinita por ĉinaj pentrado kaj kaligrafio, fama pro tio, ke ĝi estis origine produktita en Xuancheng (ŝjŭan-urbo) en Anhui-provinco, Ĉinujo.

Ŝvebanta Veturado

Trajno fajfas, vento tremas,
nebulo vualas montojn dormajn.
Erhai lago* spegulas lumon ŝveban,
vojoj serĉas mutan remilon.



Jado

Vilaĝoj—perloj disĵetitaj,
tegoloj—polvo de tempo.
Suno karesas lagon lantan,
ondoj tremas arĝentume.

Fiŝistoj ĉe bordo silentas,
ombroj fluas en retoj longaj.
Knabino rigardas, vento pasas,
okuloj serĉas, serĉas...

Kaj mi...
Ĉu vi memoras la venton ĉe kajo,
rideton perdiĝintan sub mevoj?
Se iam vi venos laŭ vojo sensona,
ni vagos en silenta feliĉo,
kie spiro varmigas la horon forgesitan.

Tempo fluas, lumo dissolviĝas,
tuneloj glutas pasintecon.
Pasaĝeroj dormas, mi songas—
horoj, ombroj ne plu tuŝas.

Post mallumo fajrero lumas,
Lijiang* kuŝas en krepusko.
Fumo leviĝas super dormo,
mondo velkas en susuro.

Kaj mi...
Ĉu vi memoras la kajo-rideton,
florojn tremantajn en manoj solaj?
Vento disŝovas la noktan hararon—
kaj relo finiĝas.
Sed mi restas.



* Erhai Lago: Lago situanta en Dali, Yunnan, Ĉinio. Ĝi estas fama altmontara lago konata pro sia kristalklara akvo kaj ĉirkaŭaj montoj Cangshan. Erhai estas unu el la ĉefaj allogaĵoj de Dali kaj simbolo de la regiono.

Fora vojaĝo

*La maro de Valencio brilas klare,
sed mia ŝipo sopiras senmare.*

Vi foriras al la foro.

La maro, blua kaj varma,
Lavas la havenon, ne la koron.

Montaro leviĝas.
Nia vojo dividiĝas
en la nebulozo.

Via kompasso montras al la Verda Edeno.
Mi aŭskultas la resonon
de viaj paŝoj.

La distanco teksas nian sorton.
Ni flugas, kun unu koro,
al la renkontiĝo super nuboj.



Jado



La estro de la Elementa Lernejo ĉe Baiyangshu-strato Taiyuan, Ĉinio, Jado (Wei Yubin) estas pioniro en enkonduko de la instruado de la lingvo internacia en la lernejo. Li ricevis la titolojn “Nacia Elstara Laboranto pri Malgrandaj Fremdaj Lingvoj” kaj “Gvidanto de Fako en la Provinco Ŝanŝjio”, kaj samtempe estas sperta esperantisto.

Sur la ebenaĵo de Orienta Afriko


John Huang



Jen elefantoj de la sovaĝejo,
kun haŭto kiel sulka roko.
Jen antilopoj de la ebenaĵo,
glitas tra la vent' sen spuro.

Sub la senkompata suno,
la stepo sonĝas pri eterne —
sur la vasta tero de Afriko,
daŭras milionjara eĥo.





Ranja Zafinifotsy

🌿 Ĉapitro 1 – Naskiĝo el la Tero

Iam, kiam la mondo fariĝis tro maltrankvila, la Tero ploris en silento. Ĝi vidis la homojn batali, la arbarojn morti kaj la riverojn sekiĝi. Tiam, ĝi prenis pugnon da polvo, miksis ĝin kun akvo el la pura fonto, varmigis ĝin per la suno kaj flustris spiron de espero.

El la polvo leviĝis knabo. Li havis mildajn okulojn kiel floroj, harojn kiel la sunsubiro kaj haŭton faritan el ĉiuj koloroj de la mondo. Lia voĉo estis dolĉa kaj trankvila.

— Mi estas Fanilo,
Lumo kaj Mesaĝisto de
la Tero, li diris.

— Mi parolos kun la
homoj, kun la birdoj,
kun la arboj. Mi kun-
igos ĉiujn per amo, per
paco, per Esperanto.

Li ricevis terglobon,
saketon kun semoj de
espero, gutojn de paco,
kaj fluton el bambuo.
Kaj li ekiris... por
resanigi la mondon.



*Fanilo
(malagasa vorto)
signifas "Lumo"



Teksto: **Ranja Zafinifotsy**

Ilustraĵoj: **Csaba Németh**
(per AI)

Ranja Zafinifotsy, naskita en 1996, estas esperantistino kaj lerneja direktorino loĝanta en Antananarivo, la ĉefurbo de Malagasio.

"Ĉiu eta ago, kiu fontas el la koro, ŝanĝas la mondon."

Por multaj esperantistoj, nia lingvo estas parto de pli ampleksa idealo. Ranja montras tion per tiu ĉi rakonto pri Fanilo - knabo, kiu aperas por resanigi nian mondon.

Per 25-paĝa rakonto kaj 19 paĝoj da ekzercoj, ni konatiĝas kun ideoj por estonto pli humana kaj pli paca: protekti la naturon, malhelpi la tervarmiĝon, dialogi en familioj kaj inter la popoloj.

Fanilo, la Mesaĝisto de la Tero, kuraĝigas infanojn per optimismaj vortoj:

"La espero kreskas. Kaj ĝi havas viajn manojn."


Ulrich Matthias

Eldonejo Lemuro
Wiesbaden, Germanio
1-a eldono 2025



En Zagrebo, Kroatio

Zhang Changsheng (Longarko)



La malfrua somero en Brno portas freŝan aeron kaj oran koloron. Post okhora vojaĝo per turisma buso el Brno, Ĉeĥio, ni fine alvenis en Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio. La longa vojo postlasis iom da laciĝo, sed antaŭ la vizito al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo, la antaŭatendo kaj ekscitiĝo forigis la lacajn sentojn.

La folioj en Zagrebo jam iom post iom flaviĝis, kaj la malpeza vento flirtigis ilin sur la vojo. Elirinte el la busstacio, ni prenis taksion kaj direktiĝis al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo laŭ la konata adreso. La veturado tra la stratoj de Zagrebo montris urbon kun mikso de historia kaj moderna – malnovaj arkitekturaj konstruaĵoj interplektiĝis kun viglaj kafejoj kaj butikoj. La ŝoforo afable konfirmis la celon, kaj post proksimume dek minutoj, ni alvenis.

Tuj post nia alveno ni malkovris, ke la oficejo estis fermita. Pro manko de laboristoj, ni decidis unue trovi loĝlokon. Apud la oficejo, ni trovis Ĝardenan Hotelon, kiu aspektis trankvila kaj agrabla. La ĝardeno malantaŭ la hotelo estis prizorgata, kun diversaj floroj kaj verda herbo, kiu donis refreŝigan senton. Ni eniris la hotelon kaj enregistriĝis. La akceptisto estis afabla, kaj la ĉambro estis pura kaj komforta, kun fenestro direktita al la ĝardeno. Ordinte niajn bagaĝojn, ni ripozis iomete kaj refreŝiĝis per trinkado de teo.

Je la kvina posttagmeze, ni denove iris al la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo. Ĉi-foje la pordo estis malfermita. En la oficejo akceptis nin eleganta sinjorino, kiu ŝajnis ĵus alveninta. Ŝi surportis veston kaj ĉapelon, kiuj ne estis luksaj, sed donis imponan kaj gracian impreson. La vesto estis simpla sed eleganta, kaj la ĉapelo harmonie kompletigis ŝian tutan aspekton. Ŝiaj manieroj estis naturaj kaj ĝentilaj, kaj ŝia rideto donis varman kaj bonvenan senton.

Kiam ni eniris, ŝi tuj parolis al ni en flua Esperanto. La sono de Esperanto elfluis en la tutan ĉambron, kiel dolĉan muzikon. Ŝi sin prezentis kiel Spomenka Ŝtimec, la ĝenerala sekretario de Kroata Esperanto-Ligo. Ŝia parolo estis klara kaj vigla, kaj ŝiaj vortoj plenis je entuziasmo kaj amo por Esperanto. Ŝi afable demandis pri niaj vojaĝoj kaj spertoj, kaj montris grandan intereson pri nia vizito. En la interparolado, ŝi menciis la historion kaj aktivaĵojn de Kroata Esperanto-Ligo, kaj esprimis sian deziron antaŭenpuŝi la disvastigon de Esperanto.



La oficejo estis plenplena sed iom malorda, kun libroj kaj materialoj pri Esperanto sur la bretoj. Sur la muroj pendis fotoj de diversaj Esperanto-renkontiĝoj kaj aktivuloj, registrante gravajn momentojn en la kroata Esperanto-movado. Spomenka Ŝtimec montris al ni ĉi tiujn fotojn kaj klarigis la historiojn malantaŭ ili, per kiu ni profunde perceptis ŝian sindonon kaj kontribuon al Esperanto.



Poste, ŝi proponis montri al ni la ĉirkaŭaĵon. Ni promenis tra la stratoj de Zagrebo kaj ĝuis la ĉarmon de ĉi tiu urbo. Spomenka Ŝtimec ne nur enkondukis la historiajn kaj kulturajn fonojn de la urbo, sed ankaŭ menciis la aktualecon de la Esperanto-movado en Zagrebo. Ŝia scipovo kaj pasio impresis nin, kaj ni sentis ŝian aŭtentan varmecon kaj gastamon.

Promeninte, ŝi proponis regali nin en itala restoracio. Dum la manĝado, ni plue interŝanĝis opiniojn pri Esperanto kaj la internacia kulturo. Spomenka Ŝtimec emfazis la gravecon de Esperanto por internacia komunikado kaj kulturo-interŝanĝo, kaj kredis ke per komuna klopodo, Esperanto povas pli bone servi al la mondo. Ŝiaj vortoj estis profundaj kaj inspiraj, lasante al ni multe por pripensi. Mi ankaŭ faris simplan intervjuon kun ŝi pri kiam ŝi esperantistiĝis, kiel ŝi lernis nian lingvon, ktp. La intervjuo estis registrita de mia poŝtelefono.



Antaŭ la adiaŭo, Spomenka Ŝtimec donis al ni iujn Esperanto-librojn kaj informfoliojn kiel memoraĵojn, kaj esprimis siajn bondezirojn por nia posta vojaĝo. Ni dankis ŝian varman akcepton kaj signifoplenan interŝanĝon.

Forirante el Zagrebo, ni sentis plenan kaj feliĉan koron. La tuta renkontiĝo ne nur profundigis nian komprenon pri la kroata Esperanto-movado, sed ankaŭ donis al ni neforgeseblan renkontiĝon. ♦



Zhang Changsheng (Longarko), (naskiĝinta en 1956) devenas el la provinco Ŝandong kaj posedas kolegian diplomon. Li eklernis la lingvon internacian en 1984. Ekde tiam li aktive partoprenas kaj kontribuas en la kampo de Esperanto, servante kiel prezidanto de la ĉina sekcio de IKEF. Li ankaŭ estis ĝenerala sekretario kaj vicprezidanto de la Esperanta Asocio de Changzhou, kaj publikigis plurajn artikolojn en la revuoj *El Mondo* kaj *Esperanto*.

La dento

Zhang Changsheng (Longarko)



Post naskiĝo de sia infano, Jiayu sentis sin spertomanka kaj maltrankvila pri infanprizorgado, tial ŝi venigis sian patrino el la kamparo. Tiam ŝia maljuna patrino jam 65-jaraĝis.

Unu tagon, Jiayu trovis, ke blanketa dento elkreskis el la ruĝeta gingivo de ŝia filo. Ekscitite ŝi kriis: "Panjo, venu rigardi! La bebo havas unuan denton!" Sed post longa vokado, neniu respondis. Ŝi turnis la kapon kaj vidis, ke la patrino fikse rigardas la mantoon en sia mano.

"Kion vi rigardas?" Jiayu kruele demandis.

La patrino flustris: "Mia kardio dento."



Jiayu alproksimiĝis kaj efektive vidis denton enigitan en la mordita mantoo. Subita naŭzo venis, ŝi forprenis la mantoon kaj fortjetis ĝin en rubujon, donante alian mantoon: "Prenu novan."

La patrino deprenis la ceterajn protezajn dentojn kaj suspiris: "Jen mia lasta originala dento." Tiam ŝi turnis sin al la bebo kaj ridetis: "Li kreskigas denton pli frue ol vi je pli ol monato. Via unua dento aperis en 11-a monato, la unua falo okazis kiam vi estis sepjara kaj duona. Via unua denteto ankoraŭ kuŝas en mia pudrujo."

Dum la patrino dolĉe rememoris, Jiayu rimarkis ke en la malfermita buŝo de la patrino videblis nuda gingivo. Subita kora doloro trafis ŝin - ŝi neniam rimarkis ke la patrino jam perdis ĉiujn originalajn dentojn.

Jiayu prenis la rubujon de la banĉambro, kaptis la patrinan denton kaj zorgeme lavis ĝin sub akvokrano. Poste ŝi metis ĝin en juvelan skatolon.

Ŝi sciis ke venos tago kiam ŝi rakontos al sia filo pri lia unua denteto. Tiam, ŝi samtempe rakontos la historieton pri la lasta dento de sia patrino. ♦

Bonfaro Ŝanĝas Sorton

Miao Hui



Hieraŭ estis la 109-a naskiĝtago de mia kara avino, kiu forpasis pace kaj kviete antaŭ dekelkaj jaroj. Do mi volas skribi pri ŝia ĉefa travivaĵo malfacila sed inspira kiel memoraĵo al mi kaj aliaj samideanoj por koni la vivon kaj **sorton** pli bone.

Laŭ la plej frua memoraĵo de mia avino, kiam ŝi estis kvarjara, ŝia tuta familio vagis tra Yanmenguan Pasejo (雁门关) en la nunan hejmlokon ne malproksime de Wutaishan Montaro (五台山). Ŝi memoris, ke ŝia avo portis la havaĵon de sia tuta familio per vektstango dum ŝia patro per unu rada ĉarumo portis ŝian tutan familion krom ŝia pliaĝa fratino, kiu piediris post la patro. Nestante en la sino de sia patrino, ŝi estis portita kune kun siaj patrino, pliaĝaj fratino kaj frato. Tiam ŝi estis nur kvar jara, kaj tiu bildo profunde gravurita en ŝian plej fruan memoron, pri kiu ŝi ofte rakontis al ni.

Ŝiaj avo kaj patro estis vagantaj komercistoj, kaj fariĝis kamparanoj post kiam ili fiksloĝiĝis en nia hejmloko. Ŝia patro estis fama pro siaj erudicio kaj kapablo. Li estis klerulo, kaj ankaŭ lerta pri komerco, kuracado kaj aŭguro, tamen liaj kapabloj ne povis lin riĉigi. Nia rakonto komenciĝas de lia aŭguro por siaj familianoj.

Kiam mia avino estis sep jara, ŝia patro faris aŭguron por siaj gefiloj inkluzive de mia avino. La sorto de la gefratoj estas iom pli bona, sed de ŝi estas la plej mizera laŭ la aŭguro. Ŝi suferos de malriĉo, batiĝo, vidvineco, perdo de infanoj kaj morto en mizero. Aŭdinte tion, mia avino ploregadis longe kuŝante sur la planko. Tiam ŝia patro diris al ŝi ameme:

“Aŭskultu min, mia kara! Homa sorto estas ŝanĝebla. Se vi firmvole faru ĉion favoran al aliaj kaj kaŭzu nenion malfavoran al ili, vi havos sorton ne malpli bonan ol de viaj gefratoj.” Ŝi tenis la averton de sia patro profunde en la memoro, vere praktikis ĝin en sia tuta vivo kaj pruvis per sia travivaĵo, ke la instruo de ŝia patro estas tute prava.

Pro malriĉeco, ŝiaj gepatroj edzinigis ŝin al kamparana familio el vidvina patrino kaj du orfaj gefiloj kiam ŝi estis nur sep jara. En la antaŭa malfacila tempo tia fenomeno estis tre ordinara en Ĉinio. Mia avo estis pliaĝa ol ŝi je unu jaro kaj preskaŭ ĉiutage nutris ŝin per bato. Poste, ŝia bopatrino trovis malespere, ke mia avo estas tro frandema kaj mallaborema, kaj li tute ne kapablos vivteni familion. Do ŝi instruis sian arton de mato-farado al mia avino kun espero ke tiu povu vivteni la familion per si mem. La bopatrino de mia avino vidviniĝis de sia juneco, kaj ŝi vivtenis sian malgrandan familion per mato-farado. Pri la morto de mia praavo mi jam skribis, kaj eble vi jam legis ĝin en mia blogo.

Post kiam mia avo estis plenaĝa, li famiĝis en la ĉirkaŭa regiono kiel granda mallaboremulo. Foje, najbarino rakontis pri li. Ŝi diris, ke mia avo ofte vizitis najbarojn tuj kiam ili malfermis sian pordon post la ellitiĝo. Tie li sidadis kaj babilis ĝis mantenmanĝo, kaj tuj post la manĝo kun siaj familianoj, li denove forglitis el sia hejmo por eviti eventulan laboron. Li kutime sin kaŝis ĉe diversaj familioj, kaj estis tre malfacile trovi lin se iu bezonis lin. Laŭ ŝia memoro, li diligentiĝis nur foje, kaj mirigis ĉiujn, ke li iris en sian kampon portante ŝpaton tuj post la mateniĝo. Sed kiam oni serĉis lin pro io, ili fine trovis, ke lia kampo estis bone ŝpatita nur iom ĉirkaŭe lasante la mezan parton ne prilaborita. Anstataŭ daŭrigi la laboron, mia avo kuŝis sur la kampo kaj ronkis en profunda dormo kun ŝpato sub la kapo.

Tiel mia avino vivtenis sian familion per mato-farado sen helpo de mia avo. Krom sia hejma kaj kampa laboroj, ŝi ankaŭ fervore helpis aliajn laŭeble, do ŝi plaĉis al ĉiuj en la vilaĝo. Kiam miaj geavoj havis du filojn, mia avo malfeliĉe eksuferis de furunko en iu mano. Trovinte nenian kuracmetodon, li povis fari nenion alian ol fumi opion por mildigi la doloron. Poste, kvankam iu sukcese kuracis lin, tamen li neniam sukcesis sin deteni de opiofumado. Kvankam en malriĉeco, li konsumis laŭeble por la fumado. Kiam li ne plu povis trovi monon en la hejmo, li do prenis havaĵojn de sia familio por vendi aŭ bati mian avinon por la kaŝita mono. Li fariĝis komuna ŝtelisto de sia familio, kaj ĉiuj familianoj kaŝis vendeblajn objektojn for de li. Kvankam li ŝtelis ĉion vendeblan el sia propra familio, li neniam tuŝis havaĵojn de aliaj homoj, do li estis bonvena en ĉiuj familioj. La najbaroj kutime lasis mian avon gardi pordon por ili, se ili devas forlasi hejmon. La afero daŭris ĝis la milito kontraŭ japana agreso. Li partoprenis en la helpantaro de ĉina armeo, kaj estis mortigita de japanaj agresantoj. Post morto de mia avo, mia avino vivis sole kun siaj bopatrino kaj du filoj. Kiam ŝi estis tro malriĉa por vivteni la familion, ŝi devis forlasi sian bopatrino kaj edziniĝi en vilaĝo ne tre malproksime. Kvankam ŝia bopatrino havis filinon, kiu estas kromedzino de riĉulo en la najbara vilaĝo, tamen la patrino ne povis akiri helpon de la filino. Foje, la maljuna patrino loĝis ĉe la filino dum kelkaj tagoj, laborante kiel servistino, tamen fine elpeliĝis de la bofilo, ĉar pro sia maljuneco, ŝi ne povis labori tiel multe kiel junaj servistinoj. Mia avino ne forlasis la devon vivteni sian bopatrino eĉ post sia refoja edziniĝo. Ŝi frekventis al sia bopatrino kaj ĉiufoje donis al ŝi monon aŭ grenon por ke la maljunulino tenu sian vivon. Kaj eĉ se mia avino prokrastis la viziton pro okupiteco, ŝia bopatrino kutime vendis havaĵojn iom post iom por sin vivteni.

Kiam mia avino revenis por viziti sian bopatrino, ŝi kutime reaĉetis la elvenditajn havaĵojn de la aĉetintoj. Ĉiuj en la vilaĝo sciis bone, ke ili ne povos longe uzi la objektojn aĉetitajn de la kompatinda maljunulino, kaj la pago de mia avino estas iom pli alta ol la prezo postulita de ŝia bopatrino. Do kiam la maljunulino bezonis helpon, ĉiuj volonte aĉetis ŝiajn vendaĵojn eĉ se ili tute ne bezonis tion. Post du jaroj la nova edzo de mia avino forpasis seninfane, do ŝi forvendis ĉiujn havaĵojn de la nova edzo, kaj revenis al sia bopatrino. Tiel ŝi filinece prizorgis la bopatrino ĝis ties lasta momento. Ŝia bopatrino ofte diris al ŝi: “Mi ne spertis helpon de mia propra filino krom de vi, mia filineca bofilino, do en via maljuneco vi ne suferos de malfacilaĵoj kaj ankaŭ vi havos filinecan bofilinon.”

La antaŭdiro de mia praavino estis prava. Mia patrino vere prizorgis mian avinon filinece kaj estis laŭdata en nia regiono.



Ekde infaneco mi vivis ĉe mia avino, kaj en mia memoro ĉiuj en la vilaĝo respektis ŝin, kaj ĉe ŝi neniam mankis najbarinoj. Se okazis malagrablo kaj konflikto inter geedzoj aŭ najbaroj, ili ofte venis al mia avino por peti konsilon kaj konsolon. Post la interpacigo de mia avino, ili konvertis sian rankoron en amikecon.

Post la edziĝo de mia onklo (patra frato), ŝi eksuferis de mia onklino, kiu transversadis koleron kontraŭ mia onklo al mia avino. Tamen mia avino toleris ĉion milde kvazaŭ amema patrino. Se iuj plendis por mia avino, mia avino kutime admonis ilin: “Mia dua bofilino estas ankoraŭ knabino. Ŝi distingos bonon kaj malbonon post sia maturiĝo.” Vere, post la hazarda morto de mia onklo, mia onklino reedziniĝis en najbara vilaĝo kaj havis duan bopatrinon. Tiam ŝi konsciis la patrinecan amon de mia avino, kaj komencis frekvente viziti ŝin kiel filino. Eĉ se iu donacis al ŝi iom da bongustaĵo, ŝi speciale piediris kilometrojn por ke mia avino gustumu.

Post la morto de mia onklo, mia avino estis trafita de kordoloro. En la 90-jaraĝo, ŝi ekpraktikis budhismon laŭ la konsilo de mi, kiu eklernis budhismon kelkajn jarojn pli frue, kaj iom post iom ĝuis mensan pacon kaj kvietecon. Tiam ŝi ofte diris, ke ŝi ĝuas grandan feliĉon en sia maljuneco bone prizorgate de la familianoj kaj registaro. Laŭ sia antaŭa sorto ŝi vivus mizere sen ido, sed ŝi havis filon, filinecan bofratinon kaj aron da nepoj. Kvankam ŝi ne spertis prizorgon de mia avo kiam li vivis, tamen ŝi ĝuis lian helpon pro la subvencio de registaro kiel edzino de martiro. Tio estis la rezulto de ŝia bona konduto. Ŝi tute konsentis kun mia deziro, ke mi fariĝu monaĥo por tutkore praktiki budhismon kaj helpi aliajn laŭ mia plej granda eblo. Nelonge post mia monaĥiĝo, ŝi forpasis pace kaj feliĉe kun neniu malsano aŭ sufero.

Laŭ instruo de budhismo, ni ĝuas la rezultojn gajnitajn per nia antaŭaj kondutoj kaj samtempe kultivas por niaj estontaj rezultoj per nia nuna ago. La travivaĵo de mia avino estas bona pruvo por tio. ◆

Iom pri Miaohui

Miao Hui



Miaohui estas unu el miaj budhanaj nomoj, kaj same mia esperanta nomo.

En 1962 mi naskiĝis en kampara vilaĝo de Provinco Shanxi, proksime al Monataro Wutaishan. Mi estas legema kaj scivolema pri diversaj aferoj kaj scioj ekde la juneco. Mi eklernis la anglan en la lasta duono de mia studjaro en la supermeza lernejo, kaj abiturientiĝis en 1979 ĵus post mia ekinteresiĝo pri la memlernado de la angla lingvo. Do mi daŭrigis la anglan memlernadon en la libera tempo de miaj kamapranaj vivo kaj laboro. Kvar jarojn poste, kiam mi kapablis legi anglajn novelojn kaj rakontojn en la meza nivelo, mi sentis grandan enuon pri la angla lernado, kaj ekdeziris lerni alian lingvon por mildigi mian enuecon. Tiam mi hazarde legis artikolon pri Esperanto en provinca ĵurnalo pri scienco kaj tekniko (山西科技报). La idealo kaj facileco de Esperanto tuj kaptis mian intereson, kaj mi decidis lerni ĝin se mi povos havigi al mi tekstlibron. Feliĉe antaŭ ol mi sukcese trovis la esperantan tekstlibron, la “facila lernolibro de Esperanto” (世界语初级课本) kompilita de Zhao Yunfeng (赵云峰) kaj Zhang Deyuan (张德元) ekaperis serie en la supremenciita ĵurnalo. Do mi lernis esperantan lecionon ĉiu semajne per la ĵurnalo. Post la lernado de la facila tekstlibro, mi atendis du aŭ tri jarojn ĝis mi aĉetis tekstlibrojn de korespondaj lernejoj. Mi prenis la aĉetitajn tekstlibrojn kiel legaĵojn ĝis la fondiĝo de Esperanta Eldonejo. Poste mi legis plej parton de ĝia esperantaj eldonaĵoj, kies prezoj ne estis tro multaj. Poste mi prove partoprenis en la traduka konkurso okazigita de s-ro Wen Jingen (温晋根) per la gazeto “La Mondo” (世界) kaj pro liaj propono kaj kuraĝigo mi ekpraktikis esperantajn verkadon kaj tradukadon. Post kiam La Mondo serie publikigis miajn verkaĵojn per mia plumnomo Hao Fenzi (郝风子), mi ekinteresiĝis pri religio. Unue mi lernis kristanismon pere de Esperanto, kaj poste, deziris lerni budhismon same per Esperanto. Tamen en tiu tempo mi tute ne povis trovi budhismajn legaĵojn en Esperanto. Do mi revis, ke iutage mi mem tradukos budhisman literaturaĵon en Esperanton post kiam mi lernos ambaŭ sufiĉe bone. Post tio mi tradukis Budhismajn Fablojn (百喻经故事) en Esperanton kaj publikigis ilin parte en La Mondo.

Ĉirkaŭ dek jarojn post mia lernado de Esperanto, mi progresis multe en la lernado kaj praktiko de budhismo. Do mi fariĝis budhisma monaĥo en Monaĥejo Tiefosi (铁佛寺). Poste mi eklernis tibetan budhismon en Monaĥejo Duobaojiangsi (多宝讲寺), kaj tie hazarda okazaĵo iniciatis, ke mi esperantigu libron pri amo al bestoj el la angla. Do mi denove lernis la anglan kaj Esperanton. Post kiam mi retrovis mian memfidon kaj kapablon por esperanta tradukado, mi sukcese esperantigis la libron AMO AL LA VIVJOJ (戒杀护生故事集) rekte el la angla versio. Post tio, mi daŭrigis la esperantigadon de budhismaj libroj kaj ĝis nun, kelkaj tradukoj jam estas pretaj. Mi ege dankas sinjoro Zhao Jianping pro sia voĉlegado de kvar libroj el miaj tradukoj. La voĉlegitaj libroj estas Budhismaj Fabloj(百喻经故事), Amo al la vivoj (戒杀护生故事), La antaŭvivaj rakontoj de la Budho (佛本生故事集), kaj La vivo de la Budho (佛陀的一生). Se vi havas intereson, vi povas legi miajn esperantajn tradukojn en la retejoj BRE (budhana retejo esperantista <http://www.budhano.cn> <http://www.budhano.com>)

Antaŭ la monaĥiĝo mi iam instruis la anglan en mezlernejo kiel dungita instruisto. Ĉar miaj lernantoj havis preskaŭ saman sperton eklerni la anglan en la lasta duonjaro de sia lerna periodo, mi do devis instrui la tutan ĉefan scion por la tri lernojaroj, do mi kreis mian propran instruan metodon, por ke la lernantoj lernu la tutan enhavon en limigita tempo. Poste, mi aplikis la rapidan metodon en la instruado de Esperanto, kaj okazigis multajn esperantajn kursojn en la monaĥejoj, kie mi loĝis tiutempe.

Mi estas membro de budhana ligo esperantista, esperantaj ligoj, kaj ligoj de esperantaj instruistoj aparte internaciaj kaj enlandaj, tamen anstataŭ honoron, tio donas al mi pli grandan motivaĵon pri aplikado de Esperanto. La celo de mia aktivado estas “apliki Esperanton en budhismo kaj disvastigi budhisman ideon pri paco per Esperanto”. Do mia klopodo ankoraŭ daŭras. ◆

Aŭtuno

Kara aŭtuno,
dankon ke vi forpelis
teruran varmon!

dankon pro viaj
malvarmeta ventblovo
kaj milda pluvo!

dankon pro via
ĉiel' pli alta, blua
kun blanka nuboj!

dankon pro via
lun' pli ronda kaj brila
kun imagigo!

dankon pro ke la
matenaj roseroj sur
herboj brilperlas!

dankon pro ke la
ruĝaj folioj samas
printempajn florojn!

dankon pro viaj
orecaj kampoj vastaj
kun rikoltriĉoj!

aŭtun' homviva
estas ankaŭ plej bona
kun multa ĝojo!



Gajo



~ VIVO ~

Oldiĝo

*iom post iom
ronĝadas nian vivon,
kiel la vermoj — tute,
ĝis fin', nenio!*



Gajo



Memore al mia amiko sro Petro De Smedt el Belgujo



Verkis *Gajo*

Antaŭ kelkaj jaroj, okaze mi kaj sro Petro fariĝis amikoj, do korespondado komenciĝis inter ni ambaŭ. Mi supozas, ke almenaŭ kelkcent leteroj aŭ retmesaĝoj interflugis inter Belgujo kaj Ĉinio skribitaj de ni ambaŭ.

Jen estas la lasta letero al mi skribita de Petro :

Iom strange, sed subite ĉiu el mia najbaraĵo, kaj ankaŭ Kjoko, ŝajnas konsideri min kiel baldaŭ mortanto! Mi ne komprenas! Nu ja, mi mem ne vere "vidas" min... sed mi ne povas imagi ke mi tuj iĝis tiel kaduka!

Post kelkaj tagoj (la 4an de majo, ĉu merkrede?) mi iĝos 89-jara. Kaj nun, antaŭ kelke da tagoj, oni konstatis ke mia arteria sistemo, ke mia koro, ne plu estas kiel ĝi devus esti, ke estas iom (nu ja, eble multe?) da uziĝoj, iom da kalko ktp... Nu, kiom da viroj okdeknaŭjaraj vivas kun tute cent elcente sana koro? Mi supozas ... ke tre malmultaj! Mia najbaro, kiu bonege helpis nin kaj kondukis nin per aŭto, tridekon da jaroj pli juna ol mi... ĵus rakontis al mi ke li ĉiutage glutas kvin pilolojn! ... Inter kiuj ankaŭ sangofluigaj... eble eĉ samaj kiujn mi devas gluti, ĉar jes... mi matene devas gluti kvin pilolojn, kaj vespere ankoraŭ unu plian...

Mi klopodos daŭrigi la vivon kiel ĝi estis antaŭ unu semajno! Mi ne suferis iun krizon!

Nur ĉar mi konsultis la kuraciston, pro sento de malfortiĝo... oni malkovris la mankojn, kaj trovis necese tuj agi. Ĉu necesis? ... Fakte, tro malfruis... ĉar oni en kliniko, post ĉiuj esploroj kaj ekzamenoj, konkludis (eĉ estis neniu interparolo, neniu interkonsento, neniu preparolo!) ke mi estis tro aĝa por esti operaciita, ĉar la operacioj estus tro riskaj. Kaj mi relative kontentas, ĉar mi jam serioze pripensis la eblecon rifuzi ĉiun plian traktadon. Mi ne speciale "suferis" en la kliniko, sed ... la tuta situacio tamen tute ne plaĉis al mi Mi tamen sentis min traktita kiel objekto. Ne flanke de la flegistinoj kaj flegistoj... ĉar ili estis multe pli afablaj, ĝentilaj kaj eĉ amikemaj ol mi iam ajn povis supozi.

Nun mi klopodos batali por reakiri la rajton daŭrigi mian vivon kiel antaŭe. Mi sciigos al vi ĉu mi sukcesos... ĉar logike mi tamen devus sperti iun ĝeneralan plibonigon de mia sistemo pro la medikamentarado... kaj mi vere esperas ke mi povos ankoraŭ tamen kelkajn jarojn daŭrigi.

Sciu ke, ĝis nun, (kaj ankaŭ nun ne!) neniam montriĝis, ĉe mi, iu el la klasikaj simptomoj! Neniam dikiĝo de maleoloj, neniam korbatoj aŭ kordoloro... nur spirmanko ĉe marŝado...
Dankon pro via simpatio!

Petro
2023/4/28

Leginte la lastan leteron supran de li, mi tuj respondis al li per la malsupra mesaĝo:

Saluton, kara amiko Petro!
Akceptu de mi karesan konsolon!
Unue, mi donas al vi koran gratulon ke vi sukcese fuĝis el korkrizo helpe de kuracistoj kaj flegistinoj antaŭ kelkaj tagoj!
Antaŭe vi iom ignoris la atakon de gravaj malsanoj! poste vi ne estu tiel!
Vi devas ripozi kun bona animstato !
Vi sendube povas pluvivi multe da jaroj kaj ofte korespondi kun mi en Esperanto !
Bone ripozu kaj obeu al via Kjoko !
Ne necesas respondi al mi !
Ĉion bonan !
Feliĉan naskiĝtagon en 4/majo!
Aŭskultu al via kuracisto !
Kore
Gajo via
2023/4/29

Mi antaŭsentis ke lin trafis tre danĝera malsano, mortiga krizo! Do mi antaŭdeziris al li feliĉan naskiĝtagon en la 4-a/majo! Mi supozis, ke li certe povas legi mian respondon... sed de tiam mi ricevis neniun mesaĝon el li, kaj mi ne sciis kiuj aferoj al li okazis.


Poste, la kvara de majo 2023 finfine alvenis, lia naskiĝtago! Do mi denove skribis jenan leteron al li por diri al li feliĉan naskiĝtagon. Jen mia letero, la lasta letero de mi skribita al nia samideano Petro el Belgujo!

Saluton ,kara amiko Petro!
Hodiaŭ estas la kvara de Majo, ĝuste via naskiĝtago, tamen en nia lando estas la Tago de Junularo, do mi nun kordeziru al vi: Feliĉan naskiĝtagon kaj estu ĉiam pli juna!
Bonan sanon kun vi!

Kore kaj fratece !

Gajo

2023/5/4



La supra estas mia bondezira letero al la naskiĝtago de Petro je liaj 89 jaroj. Post sendo de la letero mi sentis nenion tuttempe! Nur regis eterna silento, kvazaŭ ŝtono falus en maron.

Post pli ol unu jaro, ŝajne komence de 2025, mi informiĝis de unu el amikoj, ke sro Petro jam forpasis en maljunulejo de sia urbo en la dekdua de majo, 2024, je siaj naŭdek jaroj kaj ok tagoj!

Sro Petro estas unu el la eminentaj esperantistoj en la mondo. Li verkis multe da libroj, ekz. Granda Vortaro en la hollanda lingvo kaj Esperanto, Proverbaro en Ok Lingvoj. Li ŝatis korespondi en Esperanto kun geamikoj el diversaj landoj de la tuta mondo. Li estis ankaŭ sinologo, scipovis la ĉinan lingvon kaj havis belan amikecon al la ĉina popolo. Li havis multe da geamikoj el Ĉinio, laŭ mia scio, el ili estas almenaŭ tri: Liu Xiaozhe, Wang Yun kaj Gajo. Sro Liu Xiaozhe (Solis) kaj sro Wang Yun ambaŭ estas elstaraj esperantistoj en nia lando. Inter mi kaj Petro leteroj aŭ mesaĝoj estas ĉirkaŭ pli ol tricent. Por diskonigi la ĉinan kulturon al la mondo pere de Esperanto, li skribis ankaŭ multe da artikoloj al Verda Reto mastrumata de la ĉina eminenta esperantisto Solis.

Kvankam s-ro Petro forlasis nin jam tiom longe, mi tamen ofte memoras pri li. Li vivas ankoraŭ en mia koro!

Bonan ripozon en paradizo, kara mia amiko Petro! ◆

Li Chuanhua, kies esperanta nomo estas Gajo, eklernis Esperanton memfine en la 1980-aj jaroj. Li ŝatas krei per Esperanto poemojn, rakontojn kaj eseojn.

Sayonara*

—al japana knabino



Verk. de *Xu Zhimo**



Trad. de *Gajo kaj Minosun*



Plej teneras vi ĉe l' kapa kliniĝo,
ĝuste kiel timida lotusfloro kiun blovetas friska vento,
kun granda amo,
dirante adiaŭ.
En tiu adiaŭo sin trovas dolĉa tristo —
Ĝis revido!

Klarigoj:

Sayonara*: vorto japanlingva, kiu signifas adiaŭ en Esperanto.

Xu Zhimo* (1897-1931) : mondfama moderna poeto de Ĉinio.





Verk. de *Xu Zhimo*

Al Ŝajonara – Adiaŭa Notturmo



Poezie rekreis: *Batalanto*

Plej bele estas ŝia kliniĝo —
kiel lotuso antaŭ ventiĝo,
kiu hontas, sed ne kaŝi povas
sian dolĉan, treman fleksiĝon.

Ŝi flustras: “Estu feliĉa.”
Reflustras: “Estu feliĉa.”
En la voĉo miel' fermentas,
Luno sin verŝas preskaŭtute;
Mi trinkas dolĉon, sed pli forte
Gustumas senrevenajn noktojn.

Lotus-ombro iĝas stel' dissuta,
Vento la lagon tiras lulante,
Kaj sur mia brusto, kaŝe kreska,
Leviĝas maro samkoloranta;
Oni ĝin nomas en la kanto
Per unu vort': adiaŭdoloro.



Ĉuĝang-Kantiko – Luma Luno Brilas



Trad. *Batalanto*

川江谣—月亮光光

Folkstilo

Teksto: *He Weijia*

Muziko: *Yuan Qi*

I. Luno brilas, rivero fluas,
Boato rapidas al Jiĉango.
Du soluloj puŝas bambuston,
Kun kanto de malriĉeco sonoras.
Hej-ho, hej-ho.

II. Luno palas, lumo kaŝiĝas,
Boato haltas ĉe Ĉaotjanmen.
Festas du-faman edzecon,
Hej-ho, hej-ho,
Vualo leviĝas —
belo senfina.

III. Luno brilas, rivero fluas,
Boato rapidas al Jiĉango.
Hej-ho, hej-ho,
Du soluloj puŝas bambuston,
Kun kanto de malriĉeco sonoras.

IV. Luno palas, lumo kaŝiĝas,
Boato haltas ĉe Ĉaotjanmen.
Festas du-faman edzecon,
Hej-ho, hej-ho,
Vualo leviĝas —
belo senfina.

V. Luno brilas, rivero fluas,
Boato alvenas en Fenĝion.
Morgaŭ trapasos la Mortan Pordon,
En brakoj de edzino, bel-songo kreskas.
Hej-ho, hej-ho.

VI. Luno kurbas, ĉielo ridas,
Tra frosto kaj flamo, preter danĝeroj,
Preskaŭ en inferan palacon.
Hej-ho, hej-ho,
Remiloj rompiĝis dekfoje,
Preskaŭ en inferan palacon.

VII. Luno brilas, rivero fluas,
Boato trankviliĝas en Jiĉango.
Tra miloj de ventoj kaj ondoj,
Fil' bela naskiĝas, feliĉo plenas.
Hej-ho, hej-ho.

.....



Yi Shaomin (Esperant-nome **Batalanto**), esperantisto naskiĝinta la 19-an de majo 1966 en Wanzhou, Ĉongĉingo (Ĉinio). Li eklernis Esperanton en 1984 kaj de tiam aktive okupiĝas pri la movado, mempriskribante sin kiel “esperantisto kreanta komunisman estontecon”. Li estas membro de UEA, ĈEL kaj Esperanto-Asocio de Ĉongĉingo (konsilianoro).

REFLEKTOJ PRI LA VIVO

Verkis: *Chen Fan*

Trad.: *Yang Haichun*



Yang Haichun

01

Unufoje la sago el la pafarko ne revenas. Do kiam ni streĉas la pafarkon de la vivo, unue ni ne pensas pri kiom da ringoj ni trafos la revojn—sed pri tio, ĉu ĉi tiu sago devas esti pafita, kaj al kie. En la mondo ne ekzistas rimedo por penti, nur herbo kiu disŝiras la intestojn: ĝi faras vin penti ĝis la kojloj. Ne diru "senpento kaj senrimorso"—kiu ne havas penton? Kiu ne havas rimordon? "Senpento" estas nur medikamento por vundoj de glavo, post kiam vi estis tranĉita de la hazardaj sagoj de la vivo.

02

La sulkoj sur la frunto estas klifoferoj elfosataj de la tempo; la sulkoj en la koro estas malgrasoj kreskantaj en tiuj klifoferoj. Fine ni ne povas rezisti la sorton de maljuniĝo—ni nur povas protekti koron senmorta per la forto de la praaj tempoj, kaj forĝi ĝin en stangon de la vivo. Ĉar ĉi tiu koro elsendos al ni esperon, forton kaj ĝojon, por subteni nian vivon, kiu iom post iom fariĝas pli peza.

03

Hodiaŭ estas la plej malnova tago el la pasinteco—sed la plej juna por la estonteco. Tial ĉiu hodiaŭ meritas esti tenata en la palmo. La vivo estas granda renkontiĝo kaj adiaŭo—incluzive adiaŭon al la tempo mem. La tempo povas meti nian vivon, sed ankaŭ malfortigi ĝin po kvarono. Ni ne povas retenigi ĉu unu colon de ĝi—ni nur povas akcepti ĝojon kaj malĝojon donacitan de la tempo per respekto kaj dankemo, kaj vidi ĝin foriri. Mi petas nur: ke la postsilueto de la tempo estu plena de la vorto "indas".

04

En la vivo ne estas tiom da okazoj, kiam gruo flugas rekte al la ĉielo—plej multe ni havas estas kokinoj sur la tero. Purigi ilin estas kapablo; uzi ilin por ni estas kuraĝo; teksu ilin al tapiŝo kaj sidadi trankvile por trinki teon—jen persistemo. Se vi estas fragilema, neniu anstataŭigos vin por esti forta. Se vi estas nervoza, neniu anstataŭigos vin por esti kalmeca. Se vi dancas kiam aŭdas la kokon kanti kaj staras sur unu kruro kiel ora koko inter kaoso—vi eble iam flugos kiel gruo al la ĉielo.

05

"En la ludo de la vivo ne ekzistas malsukceso—nur spertopunkto +1." Ĝi ŝajnas havi la spiriton de Ah Q, sed fakte ĝi estas moto de kuraĝo. Se vi falas sur fanga vojo, leviĝu kaj premu la koton el vi per la menso de ludo kun koto. Se vi frapas vian kapon sangantan kontraŭ suda muro, retiriĝu unu paŝon kaj transsaltu ĝin per stanga salto. Malsukceso estas tomoŝtono por malsukcesuloj—sed monumento por tiuj, kiuj ne volas kapitulaci. Rekomencu: provu la efikon de via "spertopunkto +1", kaj vidu kiel ĝi faros vian vivon superpotenca.

06

Kiu ne serĉas pleneco? Mi same. Sed se plena vivo estas ronda pilko, kaj vivo kun fendoj estas kruta roko—mi elektos la lastan. Ĉar mi serĉas la moviĝemon, elastecan kaj profundeco de la vivo. La vivo estas por ĝui feliĉon kaj sperti belecon—tiuj tri ecoj (moviĝemo, elasteco, profundeco) estas ja parto de tio. La signifo de la vivo estas elekti unikan manieron: esti sin mem, plenumi sin, realigi sin.

07

Mi ne scias, kiu blanka kranio lasis plumon apud Bai'e Tan en Guangzhou. Maroj levigas kaj falas, homoj venas kaj iras—mi restas silenta, ne dancante plu. Sed tiu plumo estas incarnacio de la spirito kaj korpo de la kranio, fiksita bildo de ĝia flugo en la ĉielo. Tamen la mondo estas nur loko, kiun ni preterpasas—ni ne lasas ion, ne portas ion. Ni laboras dum tutvivo, ĝis ni atingas la finon—ni simple vivas la verson de Tagore: "Ne estas spuro de birdo en la ĉielo, sed mi jam flugis." Estas bone, ke ni flugis: vidis ion, renkontis ion, faris ion, ne faris ion. Jen la vivo.

08

La vivo mem ne estas amuza—sed pro amuzaj homoj kaj aferoj, ĝi fariĝas amuza. Seemne ni vivas nur por tiuj—alikaze la sperto de la vivo estus seninteresa. Fakte, amuzo (kiel feliĉo kaj ĝojo) ne estas nur sento: ĝi estas kapablo. Ĝi permesas al ni senti belan akvon kaj flaron inter senmova akvo, kaj trovi neordinaran en la ordinara. Ne elĉerpu via amuza sento—perdi ĝin estas vere elĉerpi la vivon.

09

Blua papilio-floro estis tiel malgranda, ke mi ignoris ĝin—post kiam mi preterpasis, mi rimarkis: ĝi similas al papilio pli ol papilio mem. Floro kiel papilio, papilio kiel floro—tre spirita, igante min sonĝi kiel Zhuang Zhou (kiu sonĝis pri papilio). Blua papilio reprezentas ne nur liberecon kaj ĝojon—sed ankaŭ amon kaj romantikon. En ĉina tradicio, ĝi sendas sonĝojn de prapatroj, transdonante benojn kaj gvidon. En Kristanismo, ĝi estas simbolo de transiro de homa vivo al eterna vivo: reprezentante amon, reenkarniĝon, belecon, ĝojon kaj esperon.

10

Mi revidas la floron de Lycoris—denove mi estas ravita ĝis la fundo de mia animo. Ĝi estas la "floro de la alia flanko" (Manjusaka). Ĝia nomo devenas de Sanskrito: ĉar ĝi floras sen folioj, kaj havas foliojn sen floroj—oni nomas ĝin "floro de la alia flanko". Ĝi simbolas disigon de vivo kaj morto, nenian renkonton. Mi ne scias: ĉu la reala floro senintence fariĝis la legenda "floro de la alia flanko", aŭ ĉu la legenda floro posedis la realan? Mi nur scias: ĝia soleco kaj ekstrema beleco respondas al sola kaj bela animo. "La floro de la alia flanko floras sur la alia flanko—mi atendas vin ĉi tie!" Tio estas bela konfeso. Ĝi kreskas sur la vojo al la subtera mondo—veki memorojn de la antaŭa vivo, reprezenti reenkarniĝon. Kiel mi povas atendi ĝin ĉi tie? Sed mi kredas: la floro, kiun mi ne povas atendi ĉi tie—mi povos atendi ĝin sur la alia flanko.

11

Oni pensas, ke kompatato estas nur por aliaj—sed fakte, ami sin estas kompatato al si mem. La plej granda krueleco al vi mem ne estas ne protekti vin—sed ne liberi vin. La plej bona lageto por liberigi vin estas trankvila kaj kalmeca koro. Ĝoji por forgesi malĝojon—jen kapitalo por reklari vin.



12

La plej multekosta ĉambro en la mondo estas la ĉambro de via koro. Permesi al la plej inda persono en via vivo enloĝiĝi—jen la valoro de tiu ĉambro. Dum via tuta vivo, vi devas havi almenaŭ unu nekompareblan heroaĵon—eĉ se temas nur pri konstrui paradizon el oro en via koro. Vi devas havi almenaŭ unu volontan silentan gardadon—eĉ se vi ne vidos la sunon post nuboj. Vi devas havi almenaŭ unu senpentecan persiston—eĉ se vi devas persisti ĝis la floro de la alia flanko floru.

13

La faro de la vivo ne estas konstruita de aliaj—vi devas konstrui ĝin brikon post briko. La lumo de la vivo ne estas ekbruligita de aliaj—vi devas fari ĝin per frotado de ligno. Ne vivu en la ombro de aliaj—vivu en via propra sunlumo. Se ne estas sunlumo, eĉ la ombro malaperos. Sur via propra scenejo, vi estas la unika dancisto.

14

Profundi vian koron, plantu arbojn por vi mem. Havu viajn proprajn arbojn por ŝirmi vin de la suno—ne apogi vin sur la arboj de aliaj por ombri. La plej bona ekologio de la vivo ne estas serĉi flugantan palacon en la arbaro de aliaj—sed konstrui arban kabanon en via propra arbaro. Kiam ni revenas de la brua homamaso al la sola koromaro—tio, kio protektas kaj nutras nin, estas la arbojn, kiujn ni plantis por ni mem.

15

Eĉ se vi havas koron libera de la mondo, vi ne povas eliri el la reto de la mondo. Se vi ne volas subiri, ne volas esti eltirita de aliaj—tiam elektu vian vivmanieron, sekvu vian propran vojon, plibonigu vian spacon, kaj vivu komfortan kaj liberan vivon. La plej bona maniero, kiun mi povas imagi: esti fluga fiŝo—rompi la reteton de via koro, flugi al la direkto de via revo, kaj krei senlimajn eblecojn por libereco kaj ĝojo. ♦

Yang Haichun, esperantiĝis en 1964, fondis la Huainanan Esperantan Grupon, redaktis la bulteneton *Voĉo de la Karb-urbo*, kaj servis kiel prezidanto de la Huainana Esperanta Asocio. Li verkis la lernolibron *Elementa Esperanto* kaj estis membro de UEA kaj ILEI.

Momenteto

Luo Shuigen

Daŭrigante la enhavon de numero 004



Mi atingis la aĝon por eniri infanĝardenon. En suna tago dum la plej varma periodo de somero, mia patrino kondukis min tien por enregistriĝo. Ŝi neniam frekventis lernejon kaj sciis nur kelkajn vortojn; ŝi povis mallerte skribi sian nomon, kiun ŝi lernis en analfabetisma kurso en la kvartalo. Kvankam ŝi estis hejmopatrino sen profesio, ŝi tre emfazis edukadon kaj ofte instigis siajn infanojn studi diligente kaj lerti vivajn lecionojn. "En libroj troviĝas oraj domoj kaj belulinoj" - mi estis tro juna por tute kompreni, sed la vortoj "studu diligente" profunde enradikiĝis en mian menson.

Dum la vojo, mia patrino ripetadis: "Kiam la instruisto demandos vian nomon, diru ke vi estas Luo Shuigen: Luo kiel la karaktero por 'retaro', shui kiel 'rivero', gen kiel 'radiko'." Tiu klarigo restis ĝis nun. "Se oni demandos vian aĝon, diru ke vi havas kvar jarojn laŭ tradicia kalkulo, naskiĝinte en la 26-a de la 5-a monato laŭ luna kalendaro (1951)." Mi memoris ĉion.

Ŝajne mi havis destinon kun temploj: mia naskiĝo rilatis al la urbodio templo, mia infanĝardeno estis en la Help-Sanktula Templo Infanĝardeno, kaj poste mi frekventis la Princo Xiao Templan Lernejon. La infanĝardeno estis adaptita el templo dediĉita al Konfuceo, kiu iam estis tre populara pilgrimloko. Studentoj ofte faris votojn tie, kaj multaj poste sukcesis en imperiaj ekzamenoj.

La infanĝardeno estis ĉirkaŭ 1 kilometro for de nia hejmo, alirebla tra kvar stratetoj: Nova Ponto Transversa Strato, Perlo-Feniksa Aleo, Distanca Botelo Strateto kaj Help-Sanktula Templo Strateto. Ni havis ses tagojn de lernado semajne, kun dimanĉa libertempo. En tiu pura socia etoso sen infanŝtelado, mi ĉiutage iris sola tre frue sen maltrankviligo por la familio.

Estis nur unu miksitaj klaso kun ĉirkaŭ tridek infanoj de diversaj aĝoj - ne multaj familioj tiam sendis infanojn al infanĝardeno. La du instruistinoj, S-ino Zhao kaj S-ino Gan, ambaŭ en siaj dudekaj jaroj, loĝis apude. Kelkfoje mi alvenis tro frue kaj atendis ĉe iliaj hejmoj. S-ino Gan havis palan, iom stagnan filon, kiu kelktage akompanis ŝin sed poste ĉesis veni. S-ino Zhao havis saĝan filinon kun grandaj okuloj kaj plektitaj haroj, kiu ofte kunhavis frandaĵojn kun mi.

La instruado estis simpla: matene S-ino Gan rakontis historiojn el bildstrioj, foje inventitajn aŭ aŭditajn. Unu rakonto pri "nekuracbla leŭkemio kun blanka sango, haŭto kaj haroj" longe timigis min pri albinoj. Posttagmeze ni ludis - rullingon, skuteretojn, pilkoludadon - mi estis la plej fervora ludanto.

Post tri jaroj, mi jam povis mem respondi demandojn ĉe la enregistriĝo al la Princo Xiao Templara Lernejo (poste renomita Tria Centra Bazlernejo de Xiacheng). Pro administra eraro (nia hejmo estis okcidente de ponto, sed oni supozis oriente), mi estis la sola lernanto venanta de la "malĝusta" kvartalo, loĝante plej fore. Tiu lernejo tiam rangis tria en instrua nivelo en Hangzhou, post Anĝi-voja kaj Fervoja lernejoj.

Post registriĝo, mi ĉiutage sopiris al la tago kiam la lernejo malfermiĝos. Mia patrino frue preparis por mi lernilojn. La lernosako estis arme-verda kanvasosako, kiun mia patro uzis dum sia infanaĝo, kaj la skatoletoj por kraĵoj estis ligna, farita de mia patro mem, multe pli granda ol la metalaj skatoletoj aĉeteblaj en vendejoj. Mi uzis mian tutan monŝparon kaj novjaran monon por aĉeti kraĵojn kaj gumojn, plenigante la skatoleton ĝis la rando, kredante ke pli da kraĵoj signifas pli da saĝo.

Ĉirkaŭ unu monato antaŭ la lernokomenco, en la komenco de Aŭgusto, subite okazis incendio en la Xiaĉeng Tria Primarlernejo. Ĉi tiu lernejo origine estis la templo Xiaŭang, kun lignaj konstruaĵoj malnovaj kaj sekaj, do la fajro disvastiĝis rapide kun krakaj sonoj. Mia patrino sendis mian duan fratinon, A-Feng, kun la aliaj gefratoj fuĝi al la ponto Baoŝan, kiu situis du liojn for de la Nova Ponto. Ŝi mem kun mia plej aĝa fratino, A-Min, restis sur la Nova Ponto por observi la incendion, dum mia patro grimpis sur la tegmenton por kontroli ĉu fajreroj falis sur ĝin. Feliĉe la fajrobrigado ne estis malproksime, kaj post ĉirkaŭ horo la fajro estis kontrolita. Post la incendio, la lernejo estis en terura stato.

La kaŭzo de la incendio restis mistero: iuj diris ke estis malnovaj elektraj instalaĵoj, aliaj suspektis intencan bruligon, sed pro manko de pruvoj, nenio pruviĝis. Dum la Kultura Revolucio, oni denove akuzis la lernejan administranton, instruiston Ĉen Xuanjuan, pri ekonomiaj malbonfaroj kaj intencata bruligo por kaŝi pruvojn. Li estis kondamnita al 10 jaroj en malliberejo, sed post la Kultura Revolucio, oni trovis ke estis erara juĝo kaj senkulpigis lin. Tiutempe ne ekzistis ŝtata kompenso, do la fakto ke li ricevis sian honoron kaj rajtojn estis jam konsiderata granda favoro. Instruisto Ĉen estis majstro de ĉina ŝako, fama kiel Liu Yici el Hangĝou, kaj atingis bonan rangon en naciaj konkursoj.

Post la incendio, la riparo de la lernejo postulis tempon, do malfrua malfermo estis neevitebla. Dum tiu periodo okazis strangegega evento. Aŭgusto estis varmega, kaj vespere homoj kutimis sidi eksterdome ventumante per bananfolioj ĝis la 8-a aŭ 9-a horo, ĉar ili devis labori la sekvan tagon. Infanoj plej ofte ludis kaŝludon ("kaŝi-kaŝi") en difinita areo limigita per stratoj Qinglong, Xinqiao Zhijie kaj la 7-forma strateto Xiahou, kiu havis nur unu malhelan stratlumon kaj antikvan puton el la Dinastio Song.



Tiu vespero, nubkovrita kaj senluna, mi kaj kamarado estis la serĉantoj kontraŭ ok kaŝintoj. Kiam ni alproksimiĝis al la puto, subite el ĝi elrampis nigre vestita homo, montrante al ni kaj blekante "a-ba-ba". Tio tre timigis min, kaj mi forkuris hejmen. La sekvan tagon policianoj venis kaj demandis min pri la okazaĵo. Kelkajn tagojn poste, oni trovis du pafilojn sub la tegmento de pavilono ĉe la proksima templo Wanŝeng, sed ne certas ĉu tio rilatis al la nigra figuro. Poste, neniu plia informo aperis.

La legendo diras, ke la templo Vansheng estis konstruita dum la Ming-dinastio kaj iam ĝuis florantan kultadon. En 1958, oni vokis grandskale produkti ŝtalon kaj establi kolektivajn manĝejojn, por 'kure eniri komunismon'. La argilaj budhoj en la Vansheng-templo estis disbatitaj, kaj oni konstruis altan fornon, transformante ĝin en ŝtalproduktejon. Loĝejaj funkciuloj iris hejmen post hejmeno, instigante homojn donaci ĉiujn neuzatajn ferajn objektojn. La loĝantoj montris grandan entuziasmon kaj aktive respondis. Post monatoj de tia vigla agado, la ŝtalforno en la Vansheng-templo fine ĉesis fumi, ĉar la krudmaterialoj elĉerpiĝis - multaj familioj fine havis nur unu feran kaserolon, kelkaj eĉ donacis sian lastan kaserolon, dirante ke en la kolektivaj manĝejoj ili ne bezonas kuiri hejme. Ankaŭ la brulaĵo mankis: la limigitaj karbo-rezervoj ne sufiĉis eĉ por grandaj fabrikoj, kaj tute ne povis provizi malgrandajn ŝtalproduktejojn kiel tiu en Vansheng. Krome, la kvalito de la produktita ŝtalo estis tre malbona - la elirantaĵoj estis simple amasoj de senvaloraj skorioj. ◆

daŭrigota

Luo Shuigen, Dumviva Membro de UEA (Universala Esperanto-Asocio)
Dumviva Membro de ĈEL (China Esperanto-Ligo)
Estrara Komitatano de Zhejiang-a Esperanto-Asocio
Honora Prezidanto de Hangzhou-a Esperanto-Asocio Internacia Komercisto. Ekonomikisto

Birdo Jingwei Plenigas la Maron

Arbsemo



Antaŭ tre longa tempo, la plej juna filino de la Imperiestro Yandi, nomata Jingwei, loĝis apud la maro. Ŝi plej ŝatis rigardi la bluan maron kaj la blankajn ondojn. Unu tagon, Jingwei ekveturis per malgranda boato por amuziĝi sur la maro. Subite, la serena ĉielo kovriĝis per malhelaj nuboj, kaj ondoj alte kiel montetoj ekbatis ŝian boaton. La boato renversiĝis, kaj kvankam ŝi baraktis kiel eble plej energie, la malvarmaj maraj ondoj fine englutis ŝian malgrandan korpon. Kiam la suno leviĝis la sekvan tagon, Jingwei transformiĝis en birdeton kun ruĝaj beko kaj piedoj, ondecaj desegnaĵoj sur sia kapo. "Mi estas Jingwei," ĝi diris, flirtante siajn flugilojn kaj flugante al la arbaro. "La maro forprenis mian vivon, mi plenigos ĝin per ŝtonetoj!" La birdo Jingwei ekprenis la unuan ŝtoneton kaj flugis kiel blanka fulmo super la maron. La ŝtoneto falis en la ŝaŭmajn ondojn.



Maratestudo mokridetis: "Tiom eta ŝtoneto – kiam vi iam povos plenigi la tutan maron?" Jingwei silentis kaj daŭrigis flugi al la bordo. Printempe, pluvego malsekigis ĝiajn plumojn, sed ĝi simple skuis la flugilojn kaj daŭrigis porti ŝtonojn. Somerte, la brula suno preskaŭ senkonsciigis ĝin, sed ĝi ripozis momente en la ombro kaj poste rekomencis. Mevo ankaŭ alvenis por konsili ĝin: "La maro estas senfina – ĉu tio, kion vi faras, havas iun sencon?" Jingwei faligis branĉeton en la maron kaj diris: "Hodiaŭ iomete, morgaŭ iomete, iam tago venos kiam mi sukcesos ŝanĝi ĝin!" Pasis la tempo, kaj apud la maro kresketis amaseto da ŝtonetoj. Kiam la ondoj frapis ilin, ili ŝprucis arĝentajn gutojn, kvazaŭ respondante al la persistemo de Jingwei. Aliaj birdoj kortuŝiĝis. Pigo helpis porti etajn branĉetojn, kaj petrelo alportis konkajn por plifortikigi la bordon. Post kvincent jaroj, la ŝtona strando kreita de Jingwei ĉirkaŭis la golfeton kiel kolĉeno. Fiŝkaptistoj rimarkis, ke kie estis la ŝtona strando, la ondoj fariĝis pli mildaj, kaj ili ne plu devis timi, ke grandaj ondoj renversos iliajn boatojn. Ĝis hodiaŭ, oni povas ankoraŭ vidi la birdon Jingwei laborante inter la maro kaj la ĉielo. Kaj ĉiu diras: "Jen Jingwei, kiu instruas al ni neniam rezigni!" ♦

Arbsemo (Li Zhongmin), naskiĝis en septembro 1947. En la fruaj 1980-aj jaroj li memlernis Esperanton. Li partoprenis en la verkado de kelkaj retaj lernolibroj pri Esperanto.

Esperanto, ne nur lingvo: el la dublado de “Olda Fan kaj la roboto-edzino” pri arto, socio kaj artefarita inteligenteco



Fabina Yu Ximei

Resumo

La artikolo esploras la interrilaton inter teknologio kaj la evoluo de Esperanto pere de la AI-filmo *La edzino robota de sinjoro Fan*, laŭ la novelo de la ĉina esperantisto Yin Jiaxin, kiu gajnis la ĉefan premion en la Internacia Novelo-Konkurso (INK) 2025, organizita kadre de la Universala Kongreso de Esperanto (UK).

La filmo estis plene generita per artefarita inteligenteco (AI), krom la homaj voĉoj registritaj de kvar esperantistoj.

La verkintino dublis kvar virinajn rolulinojn – la filinon Xiaomei, la patrinon Sufen, la robotan edzinon Lan Sufen kaj la najbarinon Onklinjo Zhang.

La verko montras ne nur artan novigon, sed ankaŭ reflektas sociajn fenomenojn kaj elmontras la forton de Esperanto kiel ponto inter teknologio, emocio kaj kulturo.

Enkonduko – Kiam teknologio renkontas lingvon

Ni vivas en epoko kiam artefarita inteligenteco profunde ŝanĝas la manieron, kiel homoj komunikas, kreas kaj pensas.

Lingvo – la plej baza ilo de interkompreno – frontas novajn defiojn kaj eblecojn.

Esperanto, kun sia racia strukturo kaj egaleca spirito, nature partoprenas en tiu nova dialogo inter homo kaj maŝino.

La projekto *La edzino robota de sinjoro Fan* fariĝis viva ekzemplo de tiu interago: verko naskita el homa imagemo, realigita per AI, kaj esprimita per homa voĉo – en Esperanto.

Pri la kreo kaj kunlaboro de AI-arto

La projekto naskiĝis el la ideo de s-ro Li Zhongming, kiu spite al sia alta aĝo kunordigis la tutan produktadon.

La scenaro estis verkita de la kanadano John Huang, kaj la voĉlaboro realigita de Zheng Jianxin, Chen Jiansheng kaj mi.

La filmo, krom la voĉoj, estis plene generita de artefarita inteligenteco – lumo, mimiko, movoj kaj scenoj.

Tiu kombino inter teknologio kaj homa arto montras novan paradigmon de interagado inter kreado kaj inteligenteco.



Pri la voĉaj defioj kaj emocia esprimo

Mi dublis kvar virinajn rolulinojn – la filinon Xiaomei, la patrinon Sufen, la robotan edzinon Lan Sufen kaj la najbarinon Onklinjo Zhang.

Por pli klare montri la diferencojn inter ili, mi elektis unu reprezentan frazon por ĉiu rolo, prenitajn el la filmeto.

La tempoj referencas al la publikigita versio de la filmo *La edzino robota de sinjoro Fan*.

1.Filino Xiaomei – la junuleca rezisto kaj emocia reten

[1:12] “Paĉjo, mi ne volas kaĉon.”

La voĉo estas klara, iom nazala, kaj la fino de la frazo leviĝas – signo de interna kontraŭstaro kaj neelparolita malĝojo.

Ŝi estas junulino, kiu ne volas montri sian malforton antaŭ la patro.

2.Patrino Sufen – la adiaŭa dolĉeco kaj malforteco

[0:22] “Fan, prizorgu Xiaomei bone...”

La spiro estas pli aŭdebla ol la vortoj mem; ĉiu silabo estas preskaŭ rompiĝanta.

Mi celis, ke la aŭskultanto sentu la lastan vibradon de amo antaŭ la morto.

3.Robota edzino Lan Sufen – la transiro inter programo kaj sento

[6:01] “Saluton! Mi nomiĝas Lan Sufen, la edzino de sinjoro Fan Zeli.”

La voĉo komenciĝas senemocia, kun preciza dikcio kaj maŝineca ritmo, sed post kelkaj sekundoj ĝi varmiĝas – la resonanco transiras el la nazalo al la brusto, kio simbolas, ke la roboto komencas “senti.”

4.Najbarino Onklinjo Zhang – la kompata realismo de ordinara virino

[2:04] “Olda Fan, vidvo kun filino vivas malfacile. Mi svatos vin al virino, ĉu bone?”

La tono estas pli malalta, la ritmo paŝa kaj parenca; ĝi donas senton de ĉiutaga varmo kaj zorgemo.

En tiu rolo, mi uzis malpli da emocia vibrado, sed pli da homa ĉeesto – kiel najbarino, ne kiel dramheroino.

Ĉi tiuj kvar momentoj montras la ampleksojn de la voĉa esprimo en unu sola buŝo.

De infana ribeleco ĝis patrino dolĉeco, de maŝina logiko ĝis homa kompato – la voĉo fariĝas ponto inter teknologio kaj sento.

Tio estas ankaŭ la potenco de Esperanto: eĉ sen patrujo, ĝi povas porti ĉiujn homajn emociojn.

Pri la sociaj temoj kaj homa resonado

La rakonto ne nur temas pri roboto, sed pri la maljuniĝo de la socio kaj la bezonoj de amo kaj akompanado.

Ĝi demandas: kiam maŝino lernas memori kaj senti, ĉu ĝi jam iĝas homo?

La verko tuŝas etikan nivelon, kie scienco renkontas kompatan moralecon.

Per tiu temo, la romano kaj la filmo pontas inter teknologio kaj etiko, inter la virtualo kaj la vivo mem.

Pri la teamo kaj kunlaboro

Sen la team-spirito la projekto ne estus ebla.

S-ro Li Zhongming zorgis pri muntado kaj sinkronigo; s-ro Zheng Jianxin kontrolis scenojn kaj donis konsilojn.

La projekto montras la forton de intergeneracia kunlaboro – maljuna reĝisoro, junaj voĉaktoroj kaj AI kiel silenta partoprenanto.

Ĉi tiu sinergio inter sperto kaj novteknologio spegulas la tutmondan spiriton de la esperantista komunumo: kunlabori sen baroj de aĝo, nacio aŭ lingvo.

Pri Esperanto kaj la estonteco

Ĉi tiu projekto montras, ke Esperanto povas kunekzisti kun la plej moderna teknologio.

Ĝi estas ne nur lingvo, sed vivanta kultura sistemo dialoganta kun la cifereca mondo.

En la epoko de AI, lingvoj riskas komercigon kaj dividiĝon laŭ algoritmoj, dum Esperanto restas modelo de egaleco kaj reciproka respekto.

La etikaj principoj de Esperanto – paco, frateco, justeco – estas des pli gravaj nun, kiam teknologio tuŝas la homan internon.

AI lernas la voĉon de homo; Esperanto lernas la koron de homo.

Se AI estas la cerbo de la nova epoko, Esperanto estas ĝia konscienco.

Ambaŭ kunportas inteligenton kaj empatian.

La estonteco, kiun ni deziras, ne estos malvarma monda de datoj, sed kunvivado de homo kaj teknologio por kompreno kaj paco.

Esperanto estos la komuna kodo de tio – lingvo de interkultura justeco kaj emociaj resonoj.

Tiel la projekto montras, ke teknologio povas servi ne al malvarmo de maŝinoj, sed al varmo de interkultura homaro.

Konkludo – La homa voĉo kaj la lingvo de sincereco

La dublado de *La edzino robota de sinjoro Fan* fariĝis arta eksperimento pri la kunekzisto de teknologio kaj homa sentemo.

Ĝi montras, ke eĉ en la epoko de artefarita inteligenteco, la plej sincera sono restas la homa voĉo – kaj ĝia plej pura lingvo estas Esperanto. ◆

余惜福: Fabina (Yu Xi Mei) Lernis Esperanton ekde 1982, Aktive disvastigas Esperanton per kursoj, prelegoj kaj sonprojektoj.

Granato

Fajreras grena branĉar',
Ruĝa frukt' kvazaŭ juvel'.
Ĉu plantoj nenion signifas?
Mem pendigas ŝminkon sur kortel'.




Viktoria



Dueto sur la tegmento


Du birdoj sur la tegmenta trabo sidas:
Unu la mondon, alia la fenestron vidas.
La unua kun la nuboj kune kantas,
Sub flugil' vento kaj revita gren' resonas.



Viktoria Chen Weiqin estas esperantistino el Chaozhou, Guangdong, Ĉinio.

Ŝanĝitaj kaj malaj

Lu Jixin



ŜANĜITAJ KAJ MALAJ

Perdiĝis morgaŭa zefira susuro,
Eĉ isa nubaro jam ŝvebis sen spuro.
Purece sintenas ruĝa lotus-flor'.

La tempo forlekis multe da belfloroj,
Nebulo englutis multe da vel-gloroj.
Ĉarmece sintenas ruĝa lotus-flor'.

Kiom da aspiroj mortis en sufero,
Kiom da vejetoj vepras pro mizero.
Aspire sintenas ruĝa lotus-flor'.

Kiom da ĵuroj jam en pluvo gangrenis,
Kiom da konitaj vizaĝoj forsvenis.
Espere sintenas ruĝa lotus-flor'.

改变与没有改变

轻风已不再是过去的舒缓，
昨日的白云也已悄悄飘远，
荷花的出泥不染没有改变。

时间抹掉多少花朵的灿烂，
迷雾吞噬多少昨日的风帆，
荷花的纯洁秀丽没有改变。

多少激情已在沉寂中冷淡，
多少豪言也已经贬值破烂，
荷花的热情红艳没有改变。

有多少热望未能走过苦难，
有多少笑脸如今知向谁边，
荷花的悠悠清香没有改变。



Hazarda renkontiĝo

Lu Jixin



HAZARDA RENKONTIĜO

Mi estas ruĝa lotusflor' el nigra koto,
Aŭskulti flustron de matene briza odo.
Vi estas ronda ondetaro en junio,
Kaj milde skui lagan helon kun ario.

Ĉu ruĝa ombro de mi rompus vian revon?
Ĉu skuo de vi ĝenus mian pacan ŝvebon?
Silente flora ombro dirus ion al vi?
Ondetoj povus alsekreti ion al mi?

Ondetaĵ ringoj diskoloras en balanco.
Fandiĝas flora ombro en stimula danco.
Hazarda renkontiĝo en somera verdo
— Interpretata lage romantika hel' do.

Sed l' ombro kaj ondetoj baldaŭ tute svenas.
Nur basa kanto pri hazardo dispromenas.



偶 然

我是出自淤泥的一朵红莲，
静静地倾听着晓风的呢喃。

你是生于水面的一荡涟漪，
轻轻地摇晃着晨光的灿烂。

是我的投影扰乱你的梦幻？
是你的波纹晃裂我的静娴？

默默的花影能否为你解语？
层层波纹可否助我悟禅？

闪亮的波心在起伏中斑斓。
绯红的花影在激动中零乱。

邂逅在这浮苍滴翠的夏天，
悄悄演绎着荷塘里的浪漫。

转瞬之间波平影散，水面上
只依稀缱绻一段吟诵——偶然

La patrina amo

Ŝi paciencis naŭ monatojn
por naskigi min.
Ŝi ĉiam pli laboras
pro mia bonfarto.
Estis ŝi, kiu gvidis
mian unuan paŝon.
Mi ne scias, kion fari
por ĝojigi ŝin.
Ŝi multe suferis pro
mia kreskado kaj maturiĝo.
Neniu estas kiel la patrino.
Ŝi edukas min
por mia estonteco.
Ŝi estas mia ekzemplo —
mi volas esti kiel ŝi.
Tre helpema kaj pardonema estas ŝi,
ĉefe ŝi estas kuraĝema kaj laborema.
Nenio superas la patrinan amon.



Kelly Muteke



Esperanto

Kelly Muteke

Mi serĉis neŭtralan lingvon,
kiam mi perdis la esperon.
Mi klopodis retrovi ĝin,
kaj, surprizite, mi ĝin trovis.
Ĝi estas tio, kion ĉiuj bezonas;
per ĝi mi rericevis la esperon.
Mi povas esprimi miajn opiniojn
kaj min senti tute sekura.
Ĝi helpas min komuniki,
ĝi estas vera kunigilo.
Certe, ĝi alportas esperon –
tial oni nomis ĝin Esperanto.



LA MILITA KONTINENTO

Mi demandas min:

Ĉu mi forkuru de mia kontinento?

Kien ni iru?

Ni ne havas kien iri,

Krom esti delokitoj en nia propra patrujo.

Oni prirabas en niaj hejmoj niajn malmultajn posedaĵojn.

La ribeluloj devigas nin forlasi la

Kampojn dum la rikolto-sezono.

Ĉiojn ili rabas, kaj ni restas perdantoj.

Pro la senĉesaj militoj, homoj suferas pro kronikaj malsanoj.

Infanoj suferas pro kvaŝiorkoro pro la milito.

Se mi estus kolombo, mi forflugus kaj alportus pacon.

Se mi estus pelikano, mi kaŝiĝus por kompreni la misiojn de la mondaj potenculoj kaj malkaŝi ilin.

Kien iri?

Ni ne havas rimedojn,

krom du groŝojn.

Kion eblas aĉeti per ili?

La malsato turmentas nin.

Vivu pacon

Kaj kunvivado.



Jean de Dieu Kikako



Tempo

Rigardu ĝin

Tiu trorapida vento ol ĉio, kio konas neniun
Eĉ ombreloj, forblovas ilin
Kiel hormontrilo, ĝi instruas nin
Danĝera, la mondo, ĝi konas ĝin
Bildoj fuĝas, timas ĝin



Malekera bonne idée, Ĵumbo

Tempo, estas malmola
Lulinda kaj spitenda,
Kiel virino, ĉiu devas prizorgi kiun,
Infano, oni devas lavi kion,
Amiko, kiu konas neniun,

Ĝi estas kajto
Kion oni fabrikas,
Blovas kaj surfalas vin,
Tranĉilo, kion oni akriĝas
Sed fortranĉas nin
Kaj kontraŭ-ridas nin

Braĝo, kion ni ŝaltas
Sed brulante baldaŭ nin,
Ĝi estas senamika, tion ni scipovas
Sufiĉas nur sufoki ĝin
Kaj ŝajni, ke ni ne vidas
Tamen vere amas kaj malamas ĝin



Infaneco, ponto de la futuro

Malekera bonne idée, Jumbo

La sonĝo rolis grave antaŭen
frue-matene ellitiĝis infano rapiden
parolante raŭkante certe
rakontante pri la sonĝo inteligente.

Se mi revis, mi gvidas
La grupon
Se mi revis mi dancis
La kanton
Se mi revis, mi paŝtas
La bestaron :
Mi iĝos gvidanto
Fariĝos kantisto
Estos paŝtisto

Morvo venas el nazoj
Cerumeno el oreloj
Puso el vundoj
Sed sonĝo el Dio
Por infaneco
Ponto de la futuro

Sonĝo estas pluraj
Kompreneble
Malsamaj
Sed
Oni estu atentaj
Pri ili jes
Infaneco estas amuza
Akra
Kelkfoje danĝera
Tiel kiel sonĝo



MIA LANUGO

Mi diru

Tiun mondon Dio kreis

Por ni

Sciu

Neniun alian mi pensas

Ol vi

ĉiu

konas, vi estas ikono sur la ekrano, eĉ ni.

vi estas littuko

kiun mi devas mildege prepari

luno, kiu heligas mian vivon por senvelkiĝi

dolor'-ĉesigo, mia inko

atenco, kontraŭ malbonintenca min mortigi

vi estas mia lanugo

vi kvazaŭ elŝtelis mian koron

vi estas la unua, en mia vivo, mia glavingo

vi kreis miellunan vojaĝon

mi estas en senfina nokto

kun vi, vi freŝigas mian korpon

mi sentas sveniĝi


via amo estas freneza, amuzigi

min, por vi, estas ludo.

Tia estas la mondo

Kia ĝojo esti en tiu atmosfero !

Mia dieto, mia lanugo



Malekera bonne idée, Jumbo

Preter la silento

Kiam morto proksimiĝas, ofte sen averto,
Ĝi ne frapas, ĝi eniras kviete kaj certe.
Ĝi forprenas amatojn, haltigas la tempon,
Ĝi postlasas vakuon, pezan kiel plendon.

La paŝoj haltas, la voĉo silentiĝas,
La spiro formortas, la rigardo perdiĝas.
Sed en tiu trankvilo, en tiu lasta spiro,
Restas lumo, restas rideto – kvazaŭ miro.

Ĉi tio ne estas adiaŭ, sed milda revido,
Sekreta transiro al espero kaj ripozo.
Tie, kie doloroj ne plu ekzistas,
Kaj la animo kviete en paco ripozas.

Tiuj, kiuj foriras, ne estas for tute,
Ili marŝas kun ni, kvankam nevideble mute.
En vento, en ombro de vespera ĉiel',
Ili ankoraŭ ĉeestas, malantaŭ la ŝtel'.

Iliaj voĉoj sonas en niaj silento,
Iliaj ridoj vivas en la memorevento.
Kaj kiam nia koro ploras senbrue,
Ili flustras: "Mi estas kun vi, ne timu, fakte."



Jerubbesheth Banyanga



Neniu scias kio vere estas la fino,
Sed la amo transpasas ĉiun destinitan linion.
Eĉ morto ĝin ne povas disŝiri,
Ĉar amo ĉiam restas, sen perej aŭ foriri.

Levu viajn okulojn, ne klinu la kapon,
Rememoru la feliĉon, ĉiun feston, ĉiun trapason.

Ĉar tiuj, kiujn ni amas, fariĝas lumo – eterna, hela. Preter
la Silento

Kiam morto proksimiĝas, ofte sen averto,
Ĝi ne frapas, ĝi eniras kviete kaj certe.
Ĝi forprenas amatojn, haltigas la tempon,
Ĝi postlasas vakuon, pezan kiel plendon.

La paŝoj haltas, la voĉo silentiĝas,
La spiro formortas, la rigardo perdiĝas.
Sed en tiu trankvilo, en tiu lasta spiro,
Restas lumo, restas rideto – kvazaŭ miro.

Ĉi tio ne estas adiaŭ, sed milda revido,
Sekreta transiro al espero kaj ripozo.
Tie, kie doloroj ne plu ekzistas,
Kaj la animo kviete en paco ripozas.

Tiuj, kiuj foriras, ne estas for tute,
Ili marŝas kun ni, kvankam nevideble mute.
En vento, en ombro de vespera ĉiel',
Ili ankoraŭ ĉeestas, malantaŭ la ŝtel'.



Iliaj voĉoj sonas en niaj silento,
Iliaj ridoj vivas en la memorevento.
Kaj kiam nia koro ploras senbrue,
Ili flustras: "Mi estas kun vi, ne timu, fakte."

Neniu scias kio vere estas la fino,
Sed la amo transpasas ĉiun destinitan linion.
Eĉ morto ĝin ne povas disŝiri,
Ĉar amo ĉiam restas, sen perei aŭ foriri.

Levu viajn okulojn, ne klinu la kapon,
Rememoru la feliĉon, ĉiun feston, ĉiun trapason.


Ĉar tiuj, kiujn ni amas, fariĝas lumo – eterna, hela.



La Vilaĝo je Tagmezo

Jeroubbesheth Banyanga

La vilaĝo je tagmezo. La ora muŝo zumas
Inter la kornoj de la bovoj.
Ni iros, se vi volas,
Se vi volas, en la monotona kamparo.
Aŭdu la kokidon... Aŭdu la sonorilon... Aŭdu la pavanon...
Aŭdu tie, malproksime, la azenon...
La nigra hirundo glitas.
La poploj foriras malproksimen kiel rubando.
La puto, kovrita je musko! Aŭskultu ĝian sitelon
Kiun grincas, grincas denove,
Ĉar la knabino kun la haroj de oro
Tenas la malnovan nigran sitelon, el kie arĝento pluvas.
La knabineto iras per paŝo kiu preskaŭ kliniĝas
Sur ŝia ora kapo la kruĉo,
Ŝia kapo kiel ruĝo
Kiu kunfandiĝas kun la suno sub la floroj de la persikarbo.
Kaj en la urbeto jen la nigre tegitaj tegmentoj ĵetas
Sur la ĉielan bluo flokojn de blanko;
Kaj la pigraj arboj
Ĉe la horizonto, apenaŭ moviĝante, svingiĝas.



Amo kaj ĝeno

Verkis: *S-ro Long*



Trad.: *John Huang*

Virin' amas viron,
Vir' amas virinon,
Dir' kaj far' — amo fortiĝos,
Virin' "ĝenas" viron,
Vir' "ĝenas" virinon,
Tro da ĝen', tro da dolor' — disiĝos,
Nun la vivo bonas,
Divorc' kreskas pli kaj pli,
Sen atento edziĝ', ŝi foriros,
Lakto kaj pano ja sufiĉas por amo,
Kverel' ne helpas, nek bonigas,
Virin' ridetas,
Vir' brakumas,
Ridetu, brakumu,
Ĝis la feliĉa fino!




Rakonto de Georgo

John Huang



Komikso pri Pipi

Rakont-adaptado kaj AI-pentraĵ-kreado fare de *John Huang*, inspiritaj de la taglibroj de *Pipi*.





Taglibro de Pipi

1a, julio, 2024

Kara s-rino Miora,

Saluton!

Helpe de s-ro Huang Xiaolong (John Huang) mi havas la honoron konatiĝi kun vi.

Mi estas nomata Pipi. Mi estas 52-jara. Laŭprofesie mi estas instruisto de la angla lingvo. Mi ŝatas legi librojn, precipe literaturajn verkojn kaj improvizi ion en Esperanto.

Mi tre ĝojas, ke vi voĉlegis la kiĉojn de mi improvizitajn. Al mi tre plaĉas via voĉo, kiu estas tre dolĉa, milda kaj fascina.

Ĉi tie mi esprimas al vi koran dankon.

Bonfarton kaj ĉion bonan!

Sincere via,
Pipi

27a, junio, 2025

Ŝi estas nomata Miora, madagaskarano. Ŝi estas juna, bela, kvieta kaj plena de la suko de la juneco. Sed la plej belaj estas ŝiaj melankoliaj kaj ĉarmaj okuloj, kiuj radias firmvolajn kaj decidemajn brilojn. Mi plej ŝatas vidi ŝin vestitan blue, kio montras ŝin ĉasta, pura kaj maltriviala. Antaŭ du jaroj, pere de John Huang mi konatiĝis kun ŝi. Ŝi estas la unua, kiu deklamis miajn verketojn. Tio min ĝojigas kaj fierigas! Mi dankas ŝin! Ŝi havas dolĉan voĉon, kiu, tikla, ĉiam ravas min. Mi adoras ŝin! Mi amas ŝin!

Titolo: Flora

Filminto: Pipi

Verkinto: Pipi

Deklamanto: Miora (Madagaskaro)

Subtitolo: Z. Drakido

Produktoro: Z. Drakido

Asistantoj: Xiong Linping, Solis

Eldonistoj: John Huang, Z. Drakido



Pipi



Flora

Frue en la mateno, je la sesa kaj duono mi ellitiĝis. Ekstere opakiĝis. Mi trarigardis la fenestron. "Ho, la neĝo rekomenciĝas!" Tio estas la dua neĝo en la vintro. Neĝo kirliĝis pelata de la vento kaj dense disflugis tra la tuta ĉielo. Ĉio estis envolvita en blanka neĝo.

Mi kaj Flora ambaŭ forlasis la hejmon cele al la holmo. Al mi tre plaĉas fari promenon kaj preni freŝan aeron en neĝa tago.

Mi estis antaŭe, Flora malantaŭ mi, kun pendola lango, jen trotante jen haltante por snufi trunkojn jen levante sian postan kruron por pisi.

Sur la sinua pado kuŝis dika tavolo da neĝo. Subite mia piedo glitis kaj mi falsidiĝis. Mi falis sur la kokcigon! "Aj —" mi grimacis pro la doloro.

"Helpon! Flora, helpu min! Venu al mi, tuj, tujtuj!" mi manvokis en la direkton de Flora.

Aŭdinte min, Flora unue konsterniĝis dum iom da tempo, poste kuregis plenrapide miadirekten. Ĉirkaŭsaltinte min kelkfojojn, ŝi alproksimiĝis al mi, poste snufis mian manon kaj lekis ĝin per sia tenera lango, fine ovris sian buŝon, firme tenis mian manikon per siaj dentoj, tiregante min.

Mi ŝtoniĝis de mirego. Mi neniam atendis, ke ŝi tiom komprenas homan aferon.

Mi sidiĝis, prenis ŝin en la genuojn. Miaj okuloj malsekiĝis. Mi ŝin lulis kaj glatumis, softante, "Bona filino, obeema filino, mi amas vin por ĉiam!"

.....

Kiam mi hejmenrevenis kaj rakontis la okazintaĵon al mia edzino, ŝi, duone dube, duone surprizite, kvazaŭ ne kredante siajn orelojn, diradis, "Ĉu vere? Ĉu vere?"

"Mi ne mensogas!" mi diris firme. "Tio estas reala, ĝuste kiel vi kaj mi!"

5a, novembro, 2024

Titolo: Ĉarma buŝeto

Verkinto: Pipi

AI-ilustrinto: John Huang

Deklamanto: Miora (Madagaskaro)

Subtitolo: Z. Drakido

Produktoro: Z. Drakido

Asistantoj: Xiong Linping, Solis

Eldonistoj: John Huang, Z. Drakido

Ĉarma buŝeto

Ŝi estis knabino ĉiele bela, kun ovala vizaĝo, tufaj brovoj, grandaj okuloj, gracia kaj elasta talio, pufaj pugo kaj brusto. Sed la plej bela estis ŝia ĉarma ronda buŝeto, kiu estis simila al maturiĝinta ĉerizo elgutigonta dolĉan sukon. Kia tantaliga buŝeto! Ĉe tiu vido, viroj ne povis rezisti la tenton leki siajn lipojn kaj gluti buŝplenon da salivo, kaj eĉ havis soifon premi kison sur ĝin. Armeo da junuloj kun flamo en la brusto petis ŝian manon, aspirante pri edziĝo kun ŝi, sed ŝi donis sian manon al neniu el ili.

Kvankam ŝi atingis jam aĝon de 30 jaroj, ŝia mano estis ankoraŭ libera.

Kian edzon ŝi deziris? Edzon kun monto da mono!

Ŝi kredis je tio, ke mono estas ĉio, cetero estas nenio, tio, ke ŝi kun flora aspekto kaj luna vizaĝo estas inda riĉulon kaj indas altan rangon kaj grandan riĉecon, kaj tio, ke malriĉulo ne meritas ŝin. Ŝin interesis nur mono, kiu estis la unua kondiĉo por viro se li volis edziĝi kun ŝi.

Kun pacienco ŝi atendis, ke la ĉielo donu al ŝi miliardulon.

La ĉielo ne trompis ŝian atendon.

Finfine falis en ŝiajn okulojn miliardulo, kiu estis ravita de ŝia bela aspekto. Kaj ŝi plaĉis al liaj okuloj.

Ĉe la unua renkontiĝo, ili korinkliniĝis unu al la alia.

Ŝi decidis doni sin al li.

Li invitis ŝin en sian vilaon.

Plezure ŝi akceptis lian inviton.

Tio estis ilia unua rendevuo.

Ili ambaŭ vizaĝalvizaĝe interbabilis longan tempon. Dume li jen turnis flanken la vizaĝon jen fingre ŝtopis la nazon jen premis la lipojn.

En la fino, li diris la lastan vorton kaj donis al ŝi belan forregalon.

Ŝi fortrotis, deprimita kaj trista, kun penda kapo.

Pro kio? Je kio ŝi estis kulpa?



Ŝi estis kulpa nenion. Nur pro la kaŭzo, ke ŝi havas teruran halitozon. Sed tion li ne malkaŝis al ŝi, konsidere ŝian memrespekton.

Kvankam ŝia buŝo ĉerize freŝis, ĝi elspiris netolereblan fetoron.

Li ne povis elteni ŝian fiodoron. Kiel li kiskus ŝin kaj akceptus ŝian kison en la estonteco se li prenis ŝin kiel edzinon?

Li ne povis malhavi kison. Li amis kisi kaj esti kisata. Amo tamen sen miela kiso, ĉu tio estis amo?

ĜIS REVIDO! 2024.11.5◆



La Aŭtunmeza Festo

Pipi



La Aŭtunmeza Festo havis lokon hieraŭ.

Mi kaj mia edzino hejme celebris ĝin.

Matene mi aĉetis kokon, bovaĵon, porkaĵon, krabojn, salikokojn, kukumojn kaj aliajn materialojn por tagmanĝo.

Tagmeze mi kaj mia edzino okupiĝis per preparado de manĝo. Ni havis abundan festenon.

Post la manĝo ni faris sieston.

Posttagmeze ni estis sur la kulmino de monto panoramante la urbon en aŭtuno.

Vespere ni faris ĝiaŭziojn farĉitajn per spicita vianda-kaj-legoma haketaĵo.

La nokto falis antaŭ ol ni prenis manĝon. Mi glutis glason da vino kaj mia edzino lipis botelon da biero.

Kiam la luno elŝoviĝis sur la ĉielon, ni promenis laŭ la sinua ŝtone mozaikita aleo ĝis la lageto kilometre dista de nia hejmo. Ĉirkaŭirinte la lageton du fojojn, ni estis forpelitaj de regimentoj da moskitoj.

Ni, banataj de la lunbriloj, mano-en-mane, lante repromenis hejmen laŭlonge de la ĵus irita aleo.

Post kiam ni rehejmiĝis, la luno jam staris sur la ĉielo.

Mi kaj mia edzino, iom lacaj pro la promenado, eksidis kune sur la sofon, kaj faris paŭzon.

Momenton poste, ni sur la balkono surtabligis kukon, pomon, persikon, melonon, vinberaron, bananon, plenmanon da kuiritaj arakidoj kaj freŝaj sojfabloj, kaj lumigis kandelojn kaj bruligis incensaĵojn por kulti la dion de la luno.

Tion aranĝinte, ni komencis frandi kukojn kaj ĝui la belan plenlunon.

La luno klara, la zefiro dolĉa, la ĉielo pura, la tero kvieta, la ambrozio abunda, la kandelflamoj flagrantaj, la incensaĵoj aromaj, la homoj feliĉaj. Kia etoso!

Se temas pri la lun-kukoj, mi amas manĝi jujubpaste farĉitajn kukojn, sed mia edzino preferas kukojn kun farĉo konsistanta el sezamgrajnoj, arakidsemoj, heliantsemaj kernoj, melonsemaj kernoj, pinnuksaj kernoj, abrikotaj kernoj, juglandaj kernoj, rosinoj kaj sekigitaj fruktopecetoj.



Rigardante la lunon kaj maĉante la kukon, mia edzino jen kaj jen ellasis longan suspiron. Ŝajnis kvazaŭ la festo vekas nostalgion ĉe ŝi, kiu foras de siaj hejmloko kaj parencoj. Ĝuste kiel dirite, en bela festo duoblas la nostalgio!


Post luna aprecio, mi kaj mia edzino havis teruran dormemon, kiu senprokraste ekspedis nin enliten. Por doni balzamon al ŝia nostalgio, mi ekdormis kun ŝi ĉe la brakoj. Baldaŭ ni trovis nin en la brakoj de Morfeo.

Hodiaŭ matene, mi ne vekigis de mia dormo ĝis la tago leviĝis. Mi malkovris, ke mia edzino ankoraŭ katete nestas en mia sino. Ŝi, trankvila kaj milda, similis al infano en profunda dormo. Serio de memoroj drivis kun malhasto tra mia menso. Mi bildigis min, kiu unuafoje renkontiĝas kun ŝi, kiu estas juna kaj bela, kun rozaj vangoj, densaj haroj, sveltaj brovoj, grandaj brilaj okuloj kaj ĉarmaj lipoj ĉiam kun petola rideto. En la fino mi enmanigis ŝin kaj malligis ŝian zonon en lunluma nokto. De tiam ŝi sekvis min kiel mia ombro ĝis nun. Sed la jaroj malkompate plugis sulketojn sur ŝia vizaĝo ...

Ĉe tio, mi ne povis rezisti la tenton ŝteli kison al ŝi sur la frunto. Poste mi milde lulis ŝin, kaj metis mian manon konke al la buŝo, zumante en ŝian orelon, ke estas tempo ke ni ellitiĝu.

Leviĝinte el la lito, ŝi okupis sin per matenmanĝa pretigado, dum mi okupiĝis akuŝante kaj fajlante ĉi tiun folion da ĵurnalo, kiu en la fino kostis al mi preskaŭ du horojn.

*La Aŭtunmeza Festo estas pli grava el la tradiciaj festoj de ĉinoj. Ĝin la ĉinoj festas en la 15-a tago de la oka monato laŭ la ĉina kalendaro. Lun-kuko estas ilia fest-manĝaĵo. ◆



Lunkuko

Fotoj: *Semio*

Verkis: *Pipi*



Rigardu la lunkukon kun presitaj desegnaĵoj kaj Esperantaj vortoj kaj ĉinaj ideogramoj! Kiel bela ĝi estas!

Mi opinias, ke ĝi estas perfekte desegnita kaj farita.

Mi povas klare vidi sur ĝi la desegnaĵojn kaj Esperantajn vortojn kaj ĉinajn ideogramojn.

Fronte: Esperanto-Muzeo; kvinpinta stelo; kolombo; la Granda Muro.

Kaj dorse: Verda stelo; Esperanto.

Ĝi aspektas ĉiele tikla. Mi taksas ĝin ambrozio. Kiu desegnis ĝin? Tio estas rafinita artaĵo!

Ŝajnas, kvazaŭ ĝi elspirus apetitan bonodoron. Kiel mi soifas frandi ĝin!



De maldekstre: Sun Mingxiao, Cui Guoqing kaj Sun Lijun dum sia vizito al Daming-lago en 1983.

En 1983 ili estis 19-jaraj belaj junuloj, kun ebonaj haroj kaj plenaj de energio. La tempo forflugis rapidege! Jam pasis pli ol 40 jaroj. Nun ili ĉiuj maljuniĝas, kun grizaj haroj. Ili dediĉis sian junecon al Esperanto. Mi admiras ilin. ♦

Sun Mingxiao (Semio), naskiĝis en januaro 1964, eklernis Esperanton en 1983, kaj diplomiĝis en 1987 en Anhŭi-a Esperanto-Kolegio. En 2011 li ekinstruis Esperanton en Zaozhuang-a Universitato kaj en 2013 li fondis internacian Esperanto-Muzeon en la universitato. Li estas ĉefredaktoro de serio da libroj pri *Esplorado kaj disvastigo de Ĉina Kulturo*, kaj redaktis aŭ tradukis la jenajn librojn:
Esperanto kaj Interkulturo,
Historio de UEA,
Historiaj Restaĵoj pri Ĉina Esperanto-Movado,
"Pri la Historio de la Japana Esperanto-Movado,
Bazo de Esperanto,
Evento pri Esperanto-Movado,
Silenta Ŝipo: Ĉinigitaj elektitaj literaturaĵoj el Esperanto.

